

esperanto

OKTOBRO 1990 • 83-A JARO • N-RO 1018 (10)

ISSN 0014-0635



- Eventoplenaj kongresoj en Rumanio kaj Bulgario
- Akademio Internacia de la Sciencoj vastiĝas orienten
- Poeto futbalas, insektoj koitas en la Belartaj Konkursoj '90!

Azio eliras la infanaĝon

Enhavo

- 177 Azia movado: Ĉu jardeko de la tigro?
Tajvano nun havas Esperanto-asocion (Joachim Werdin); 40-jara jubileo de *El Popola Ĉinio* (Dai Song-en); Pekino ricevos scienc-teknikan instituton (Ŝen Ĉenĵu)
- 179 Landa agado: La rumana fenikso ekflugas (Ignat Bociort); "Milda revolucio" revenigas Todorov (Hektor Alos i Font)
- 181 Faka agado: Fervojistoj elprovas la norvegan gastamon (Wilhelm Barnickel); Preskaŭ senpena informado (Peter Danning)
Edukado: Peresperanta kursaro lige kun 78-a UK
- 182 Regiona agado: Per Esperanto miaj gefratoj ekkomprenis la francan; Ĉu vi korespondas afrike?
- 183 Distribuita Lingvo-Tradukado: DLT en financaj problemoj
- 184 Fondaĵoj: Du novaj bazoj por trejni kaj instrui
- 185 Fondaĵo Antoni Grabowski: Brazila, franca, japana eldonejoj kaptas ĉefpremiojn (Ulrich Lins, Aldo de'Giorgi, Herbert Mayer)
Intervjuo kun Helmar Frank: "Mi ne povas atendi kelkajn jarcentojn."
- 187 Kalendaro (internaciaj Esperanto-aranĝoj ĝis julio 1991)
- 188 Laste aperis . . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto)
- 189 Reagoj: Pacaj batalantoj (István Ertl, Cynthia Libby, Ionel Onet); La belo de (ne-)Ruslando (Kris Long); Sensolve (Emilija Lapenna); Reakciaj konkludoj (Ralph Dumain); Ankoraŭ kelkaj . . . (Louise Marin); Demokrataj denuncoj (Bernard Golden); Kelkaj korektoj (Mine Yositaka; Rejna de Jong; Lasse Kivistö)
- 190 Membrokampanjo: Anojn plej sukcese varbas . . . anoj! (Mark Fettes)
- 191 Kotiztabelo de UEA por 1991
- 192 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 194 Kongresa komuniko 1 de la 76-a Universala Kongreso en Bergen
Oficiala informilo
- 195-204
- Speciala sekcio: Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio, 1990*
- 195 Poezio: Unua Premio: El "La vivo de poeto" (Timothy Brian Carr)
- 196 Prozo, Unua Premio: Kia la semo (Georgo Kamaĉo)
- 198 Poezio, Dua Premio: Ĉies . . . (Georgo Kamaĉo)
Prozo, Premio Nova Talento: Rezolucio 11.59.h (Ulrich Becker)
- 199 Eseo, Premio Luigi Minnaja: Ĝoje sonu mia kanto:
La vivo kaj verkoj de Marie Hankel (Krys Ungar)

Vi trovos,

la trian kaj lastan fojon ĉi-jare, 28-paĝan numeron: la finpagon de nia ŝuldo je dekduopa jarkolekto. Ĉi-foje la aldono aspektas literature, kun premiitaj verkoj el la Belartaj Konkursoj – bedaŭrinde nur eta sortimento, konvena por veki apetiton al la plena festeno proponota sur la paĝoj de *Fonto* kaj aliaj revuoj. Sed tiujn vi ja abonas, ĉu ne? Vi rimarkos ankaŭ konstantan alfluon de novaj eldonaĵoj tra "Laste aperis...", invitantaj al aĉeto aŭ donaco, same kiel alipaĝe la prezenton de du novaj kaj ege subtenindaj fondaĵoj, kaj speciale la pledon sur p. 190-191 por via kunlaboro kun la membrokampanjo. Ho ve, multas la bezonoj. Bonvolu toleri kaj kompreni la klamantajn voĉojn, kiuj tiel dispostulas vian atenton kaj monon: en tiu Babelo estas vivo kaj agado. Kiel profesoro Frank (p. 185-186) kaj la du Germanioj (mi tajpas la 3-an de oktobro), ankaŭ ni preferas nunajn malfacilajn faktojn al revoj pri estonta venko.

La kovrilo: Malgraŭ longa historio de Esperanto en kelkaj aziaj landoj, ni nur nun komencas vidi la maturiĝon de tutregiona movado, en kiu la fortaj landoj helpas la etajn kaj la rapidaj instruos la hezitemajn. Post dek jaroj, ĉu jam plenkreskos la lernantaro? (Foto: Shi Jun-cheng)

esperanto

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 105 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 48,75; US\$ 23; GM 43; enoj 3600; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn. Anonctarifo (gld.): 1 p. 1540, 1/2 p. 850, 1/4 p. 470, 1/8 p. 260, 1/16 p. 150. Movada rabato 50%. Ekstera-kovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de la Centra Oficejo de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +3110 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telefakso: +3110 436 17 51.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag).

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: vakas.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigado, planado): prof. d-ro John C. Wells, 5 Poplar Road, London, Britio SW19 3JR; tel. (081) 542 0302; telefakso (071) 383 4108.

Vicprezidanto (regiona agado, turismo, Fondumo Zamenhof): s-ro Roman Dobrzyński, u. Majdańska 13 m 91, PL-04-088 Warszawa, Pollando; tel. (22) 10 35 05.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj, esperantologio): d-ro Ulrich Lins, Gemarckenstr. 150, D-5000 Köln 80, FR Germanio; tel. (0221) 680 32 50.

Ĝenerala Sekretario: s-ro Osmo Buller, Suksitie 4 B 15, SF-93400 Taivalkoski, Finnlando; tel. (988) 51 003; telefakso (988) 51 681.

Estrarano (informado): s-ro Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, B-2520 Edegem, Belgio; tel. (03) 440 30 92.

Estrarano (financo, junularo): s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Estrarano (landaj kaj fakaj asocioj): s-ro Oszkár Princz, Sallai u. 4. II.3, H-1136 Budapest, Hungario; tel. (HEA) (1) 15 60 244.

Estrarano (azia agado, aplikado en scienco): prof. d-ro So Gilsu, Yangchon PO Kesto 11, Seoul - 158-600, Korea Respubliko; tel. kaj telefakso (02) 646 5413.

Estrarano (kulturo): s-ino Spomenka Štimec, Nova Ves 87, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio; tel. (041) 42 92 51; telefakso (041) 42 12 94.

Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ro Edward Symoens, Putsesteenweg 131A, B-2180 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (03) 666 62 66.

Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ro Jan Koszmaluk, 32 rue Pajol, F-75018 Paris, Francio; tel. (1) 42 05 88 26.

Azia movado:

Ĉu jardeko de la tigro?

Honkongo, Singapuro, Tajvano, Malajzio ĉiam estis blankaj makuloj sur la mapo de Esperantujo. Nia konscio pri orienta Azio ampleksis la insulan Japanion, la popolan Ĉinion, la baraktantan Vjetnamion kaj – pli lastatempe – la kvietan Koreion. Ekster ili troviĝis mardrakoj kaj dezertoj, malgraŭ fojfoja krio el iu verda insulo aŭ oazo.

Joachim Werdin komencis montri al ni la maladekvatecon de niaj mapoj. Ni mem inventis la ondojn kaj la sablon: fakte ĉie troviĝas fekundejoj. Jam de kelka tempo famiĝas la “tigretoj de Azio”, ekonomiaj dinamoj de la regiono. Saman dinamecon ekhavas la tieaj E-movadoj: Baldaŭ ne necesos vojaĝi al Eŭropo por ĝui internacian renkontiĝon! Jam kvin tajvananoj partoprenis en la ĉi-jara Komuna Seminario de Korea kaj Japana Junularoj, kaj aliajn spurojn de vigliĝo vi trovos en la subaj tekstoj. Temas tamen pri longdaŭra evoluo. Ĉinio kaj Irano jam instruis al ni, ke eĉ eksplodo de entuziasmo ne signifas venkon; nur per pacienca (kun)laboro ni definitivigos kaj detaligos tiujn novajn aldonojn al nia mondmapo.

Tajvano nun havas Esperanto-asocion

La destino decidis, ke dum unu monato (majo-junio 1990) mi laboru en Tajpejo. Jam por solvi la vizan problemon helpis la kerno de la tiea movado – kvar geesperantistoj, kiuj renkontis min en la flughaveno. Ilia bonkora akcepto tuj sentigis min “en sekuraj manoj”. Fakte la sindediĉa helpo de la lokaj movadanoj estis eksterordinare grava en tiu lando, kie oni povas esti bone komprenata nur kiam oni parolas la ĉinan lingvon. Tiu situacio ekzistas malgraŭ la fakto, ke la angla estas ĝenerale konata kaj ĉie devige lernata – mi sentis, ke Tajvano estas usona lingva kolonio. Kompreneble, estas profito: Tajvano rapide evoluas, kaj multaj homoj, antaŭ kelkaj jaroj ne riĉaj, nun povas aĉeti aŭton kaj vojaĝi eksterlanden.

Onidire, antaŭ pli ol dek jaroj pastro instruis Esperanton en tajvana universitato. Laŭ tiu diro, ĉirkaŭ ok cent personoj tiam (ek)lernis la lingvon, sed mi renkontis neniun el ili. La ordinara tajvanano, demandite pri “monda lingvo” (la traduko de “Esperanto” en la ĉina lingvo), respondas, ke temas pri la angla. Dum mia restado helpis precipe Bradjo V. Moro III kaj Sabira Ståhlberg, ambaŭ eksterlandanoj portempe vivantaj en Tajpejo. Sed jam kelkaj tajvananoj iom scipovis la lingvon, kaj la diskonigado de Esperanto montriĝis ne malfacila. “Tio estas mirinda, mi neniam konsciis pri io simila,” diris mia lernintino, demandite, kial ŝi volas lerni Esperanton. Ĉu tio estas pruvo pri la bezono de pli vasta informado?

Ni sukcesis organizi kurson en la Bahaa Centro de Tajpejo, kiu senpage disponigis al ni la lokon. Dek kvin kursfinintoj aliĝis al la ĝis tiam seppersona esperantistaro, kaj la grupo fondis Tajvanan Esperantistan Asocion la 17-an de junio. Ĝia oficiala adreso: Wang Chung-Yi, No. 13, 2 Alley, 40 Lane, Chung Yung Street, Shih Lin, Tajpei, Tajvano.

Dek procentoj plu aktivas

Antaŭ ol iri al Tajvano mi gastis plurajn semajnojn en Singapuro. Kiel vi eble memoras, pasintjare ĉ. 400 singapuranoj anoncis sin por lerni Esperanton, sed miaj fortoj sufiĉis nur

por instrui ducenton. Al la ceteraj ni promesis organizi plian kurson poste. Pro la burokrateco de Oficejo por Eksterlandaj Aferoj, nur post dek monatoj mi ricevis la instrupermeson. Tamen valoris atendi. Venis multaj lernemuloj, kaj mi disdonis proksimume 75 atestilojn al kursfinintoj. Pluraj el tiuj komencis partopreni en la kunvenoj.

Singapura Esperanto-Asocio ankoraŭ ne estas registrita. Oni esperas, ke tio okazos baldaŭ: sen registriĝo la asocio ne havas bazon por publika agado. Sed dume, proksimume dekono de la ducent homoj, kiuj finis la kursojn ĝis nun, venas al la regulaj kunvenoj. Singapuranoj volontege lernas ion novan, precipe senpage; Esperanto estas io nova, eĉ kurioza, kaj tial ili ekinteresiĝas. Tamen konstatinte, ke Esperanto donas malmultajn ŝancojn por financa profito, la plimulto revenas al siaj plentempaj okupoj.

Post partopreno en la Universala Kongreso en Havano, mi restis unu monaton en la Centra Oficejo de UEA. Tie mi interalie pretigis kaj dissendis la duan numeron de *Esperanto en Azio*. Tio estas bulteno nur por aktivuloj; ĝi ne estas abonebla. Tamen ni volonte sendas ĝin ankaŭ al homoj, kiuj finance subtenas la azian movadon. Estas bezonata mono por membrigi homojn en nepagipovaj landoj (sendu al Fondaĵo Canuto kun indiko “por Azio”) kaj por alispeca helpo pere de la Fondaĵo Azio.

Oni prefere sendu siajn ideojn kaj proponojn pri la azia movado al estrarano So Gilsu (adreso en la kolofono), ĉar ekde la komenco de oktobro mi denove vojaĝos en Azio. Tamen se iu nepre volas kontakti min, jen mia vojaĝplano: **oktobro-novembro 1990:** ĉe Masahiro Marc Ono, United Nations Building, PO Box 1187,

La tajvananoj estas malmultaj sed entuziasmaj.



pulchowk, Lalitpur, Nepalo (telefakso 997-1-523-991); decembro 1990-januario 1991: ĉe Marcel Perray, GPO Box 1846, Bangkok 10501, Tajlando; februaro-marto 1991: ĉe Margaret Fidow, Accountancy Department, City Polytechnic, 88 Tat Chee Avenue, Kowloon Tong, Honkongo; aprilo-junio 1991: en Tajvano, adreso supre.
Joachim Werdin

Ŝanĝo de la vivo 2

Kvankam mi skribis en mia antaŭa raporto (junio, p. 112), ke mi ne havas planon pri la diskonigo de Esperanto en Malajzio aŭ pri ĝia instruado, tamen mi agas tute kontraŭe al tio kion mi diris. Mi revenis hejmen la 22-an de marto kaj eksciis, ke Malajzia Esperanto-Asocio ne kunvenis dum mia trimonata foresto. Ni rekomencis kunveni meze de aprilo 1990. Mi multe pensis kaj subite mi ekkonsciis, ke mi povas multe fari por nia loka movado.

Mi decidis prelegi pri mia vojaĝo al Pollando kaj skribi artikolojn pri Esperanto en la angla por ĵurnaloj. Unu el miaj artikoloj aperis en ĵurnalo sub la titolo "Esperanto eble estas la plej bona solvo". Iu persono skribis kontraŭ mia artikolo kaj mi skribis ankoraŭfoje al la ĵurnalo por klarigi kelkajn punktojn, kiujn li tuŝis. Tiu dua artikolo aperis fine de junio sub la titolo "Esperanto estas neŭtrala lingvo". Pluraj homoj telefonis al mi kaj demandis pri ĝi kaj ĉu estas kurso. Alia ĵurnalejo kiu ne aperigis miajn artikolojn intervjuis min pro mia persisto. Mi opinias ke nun entute centmiloj da homoj en Malajzio kaj Brunejo almenaŭ iom scias pri nia lingvo.

Miaj prelegoj altiris kelkajn homojn, kiuj antaŭe ne venis al niaj kunvenoj. Poste ni revivigis nian novaĵleteron, kiun mi redaktas kun la prezidanto. Nun ni sendas ĝin ankaŭ eksterlanden por ke Esperantujo sciu pri nia movado. Mi sendis leteron al UEA por peti la regulojn pri aliĝo de nia landa asocio.

Jila Saheb-Zamani diris, ke post la foriro de eŭropaj E-instruistoj maldaŭras la entuziasmo. Ŝi estas prava. Post la foriro de Werdin restas malpli ol dek membroj, kiuj estas aktivaj. Krome la manko de bona literaturo malhelpas la movadon. Ni bezonas trejnadcentrojn en Azio por trejnado de aziaj esperantistoj. Oni povas diri, ke Esperanto estas facila lingvo, sed se oni volas profunde regi ĝin ĝi ne estas tiom facila.

Chan Sook Wai

40-jara jubileo de *El Popola Ĉinio*

En ĉi-majo *El Popola Ĉinio*, legata en 142 landoj kaj regionoj, iĝis 40-jara, kaj ĝia redakcio jubileis en Pekino la 24-an de majo en la Halo de Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco.

La jubilean kunvenon kun 370 partoprenantoj honoris per sia ĉeesto veterana esperantisto s-ro Hu Sheng,

vicprezidanto de Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj prezidanto de Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj, s-roj Cai Zemin kaj Chen Haosu, vicprezidantoj de Ĉina Popola Asocio de Amikeco kun Eksterlando, s-ro Liu Deyou, vicministro pri kulturo, s-ro Ĵelezo, honora prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo, s-ro Chen Yuan, prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo, kaj s-ro Yosimi Umeda, eksvicprezidanto de UEA kaj malnova amiko de ĉinaj esperantistoj.

En la jubilea kunveno ĉeestis ankaŭ

Festa etoso kunigas Tan Xiuzhu (maldekstre), gaston Yosimi Umeda, kaj ĈEL-estrojn Chen Yuan kaj Zhang Qicheng.



Pekino ricevos scienc-teknikan instituton

La Esperanto-sekcio de la Ĉina Akademio de Sciencoj organizis la trian fojon Internacian Akademian Konferencon pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto, de la 25-a ĝis la 30-a de majo en Pekino. Pli ol mil homoj ĉeestis la inaŭguron – la plimulto en Ĉinio, kompreneble, sed kun individuoj kaj grupoj el Sovetunio, Pollando, Japanio, Francio, Jugoslavio kaj Belgio.

En la inaŭguro parolis pluraj eminentuloj el la politika kaj scienca vivo de Ĉinio. Specialan impreson faris la anonco de Jiang Shuyun, vicrektorino de la Ĉina Scienc-Teknika Administra Universitato, ke la universitato aŭspicias la starigon de Scienc-Teknika Instituto de Esperanto en Pekino. Ekde aŭtuno

1990 ĝi akceptos ĉinajn studentojn por la studfakoj bioinĝenierado, ekologio, akupunkturo kaj masaĝo, dietiko kaj internacia komerco. Post du- ĝis kvar-jara studado, dum kiu ili lernos utiligi Esperanton por scienc-teknika interŝanĝo, ili ricevos diplomon. S-ino Jiang samtempe esprimis subtenon al la fondo de internacia Esperanto-universitato, kiu varbu studentojn tra la tuta mondo.

La konferenco ricevis 306 referaĵojn, el kiuj la plimulton oni laŭtlegis en grupaj kunvenoj pri la diversaj fakoj. Tre sukcesa estis la kunveno pri medicino, kiun ĉeestis pli ol 90 konferencanoj inkluzive de kvar poloj kaj kvin sovetianoj (el Moskvo, Litovio kaj Armenio). En la kunveno oni

karavano de japanaj kaj koreaj esperantistoj estrate de s-ro Nishikawa Toyozo kaj s-ro Kim Pan Sool; karavano de francaj esperantistoj estrata de s-ino Zorka Enizan; s-ro Davor Štimec, anstataŭanto de jugoslavia peranto s-ino Spomenka Štimec; kaj aliaj samideanoj el Belgio, Jugoslavio, Pollando, Sovetunio kaj Svedio.

En la kunveno vicĉefredaktorino Tan Xiuzhu donis parolon nome de la redakcio de *El Popola Ĉinio*. Ŝi retro-rigardis la historion de EPC kaj atribuis la brilajn sukcesojn de EPC kaj al la komprenemo kaj subteno al Esperanto fare de la ĉina registaro, kaj al la helpo kaj kunlaboro de la perantoj kaj legantoj. Nome de la kolegaro, ŝi promesis fari ĉion eblan por igi EPC pli enhavoriĉa kaj vere unuaklasa en Esperantujo.

Ankaŭ koncernaj gvidantoj kaj reprezentantoj de la alilandaj gastoj faris paroladojn plenajn de gratuloj, laŭdoj kaj espero.

Varman bonvenon rikoltis gratulaj mesaĝoj de UEA, de s-ro Bakin, kaj de aliaj Esperanto-organizaĵoj kaj gravaj personoj.

En la Internacia Vespero, okazinta la 25-an, la stabanoj de EPC kaj samideanoj el aliaj landoj amuze ĝuis, prezentante buntajn artajn programojn.

Unu el la menciindaj sekvoj de la jubileado de EPC estas, ke amas-komunikiloj inkluzive de Ĉina Centra Televida Stacio vaste konigis EPC kaj raportis pri ĝiaj festaj aranĝoj, kio ŝuldiĝis al la gazetara konferenco kun pli ol 30 ĵurnalistoj, la 22-an de majo.

Dai Song-en (Ĉinio)

prezentis 32 referaĵojn. En la natur-sciencia kunveno oni prezentis 21 referaĵojn, en la grupo pri lingvo kaj edukado oni sukcesis legi 51 el la 74 ricevitaĵoj, dum al la kunveno pri teknika kaj komerca kunlaboro venis pli ol 250 homoj el 64 diversaj lokoj. En pluraj kazoj la interŝanĝo de ideoj startigis aŭ plifortigis kunlaboron inter ĉinaj kaj eksterlandaj specialistoj.

En siaj fermaj resolucioj, la konferenco alvokis por pli vasta aplikado de Esperanto en scienco kaj tekniko, por tutmonda kunlaboro por la fondo de Internacia E-Universitato, kaj por partopreno en la 4-a IAKSTE. Tiu okazos jam venontjare en Qingdao.

el la raporto de Ŝen Ĉenĵu

Landa agado:

La rumana fenikso ekflugas

Inter la 13-a kaj la 15-a de julio okazis en Rumanio rapide planita kaj realigita kongreso, kies rezultojn mi deziras klarigi.

Unue permesu al mi prezenti la gravegan atingon de la rumana movado en la monatoj majo-junio, kiu donis la fonon por ĉio kio poste sekvis. Okaze de interkonsento pri kunlaboro inter la Ministerio de Klerigado kaj AIS San Marino, oni ne nur nuligis la iaman malpermeson de E-instruado en la rumana eduksistemo, sed principe aprobis la enkondukon de Esperanto (samrajte kun aliaj lingvoj) en ĉiujn universitatojn kaj superajn institutojn de la lando.

Tamen per tio nia sukceso ne estis ekster danĝero. La interkonsento ekvalidos nur en septembro, kiam jam estos fiksita la studprogramo. Tial ni ege urĝe tradukis la dokumentojn el la germana kaj Esperanto kaj prezentis ilin en la ministerio, kun la peto ke ĝi tuj dissendu oficialan klarigon pri la ebleco enkonduki Esperanton jam en la preparatajn studplanojn. Per la helpo de juna bukareŝta kolego, tia klarigo estis jam la sekvan tagon en la poŝto. Similan komunikon al la popoluniversitatoj sendis la Ministerio pri Kulturo.

Sekve ni mem informis pri la afero eblajn instruantojn en diversaj universitataj centroj. Niaj rektaj kontaktoj kun la universitatoj mem tamen montris, ke nur ie kaj tie efektiviĝas io taŭga. Ofte la universitatoj ne mem iniciatis ion, aŭ foje eĉ neglektis la komunikon pro la nesufiĉa prestiĝo de Esperanto; kaj kompreneble ili postulis instruantojn kun superaj studoj kaj atestiloj pri altnivela regado de Esperanto, krom lernolibroj kaj vortaroj. Evidentiĝis la

neceso tuj plifortigi nian akiritan pozicion kaj havigi al ni novan apogon.

Kun la rektoroj kaj vicrektoroj de la Universitato kaj Politekniko de Timișoara ni atingis interkonsenton pri tri paŝoj: a) **starigi filion de AIS en Timișoara** kaj plifortigi la E-instruadon en tiuj du superaj lernejoj; b) **organizi internacian kaj kulturan semajnon** en majo 1991, kiel movadan kaj ekster-movadan aranĝon; c) **gastigi tutlandan renkontiĝon aŭ kongreson de esperantistoj**. Tio tamen eblis nur inter la 12-a kaj 15-a de julio kiam disponeblis la studenthejmoj kaj manĝejo.

Rekolekto de fortoj

Nun necesas priskribi la staton de la rumana movado en la unua duono de ĉi tiu jaro. Post 1981 (la lasta tutlanda renkontiĝo en Timișoara) la esperantistoj ne plu povis legitime renkontiĝi; malmultaj havis okazojn interkonatiĝi krom perletere, kaj ankoraŭ pli malmultaj okazojn paroli esperantlingve. La 5-an de marto 1985 ĉiuj E-kursoj en la lando estis malpermesataj (sen iu ajn klarigo). Iam Rumana Esperanto-Asocio havis junularan, turisman, kulturan, tradukan kaj organizan sekciojn, sed pro la malpermesoj, ĉikanoj kaj persekutoj ili reduktiĝis al kelkaj homoj. Nekunordigitaj iniciatoj de individuaj bonintencaj esperantistoj ofte malutilis al la movado, ĉu per netaŭgaj leteroj kaj memuaroj, ĉu per eraraj por-esperantaj argumentoj. Fine, la financa situacio estis apenaŭ kredebla: nia grandvalora kolego kaj kunbatalanto Cezar Apreotesei, bedaŭrinde forpasinta en 1989, kalkulis ke la membroj de la iama Kolektivo Esperanto kaj

RUMANA ESPERANTO-ASOCIO

La 7-an de januaro 1990 okazis en Timișoara la renkontiĝo de esperantistoj en Timișoara kaj ilia decido pri la estigo de REA. La oficiala registriĝo okazis en Bukareŝto la 23-an de januaro, per renaskiĝo de la antaŭ jardekoj ekzistinta REA.

Laŭ decido de la Tutlanda Kongreso de Esperanto (13-15 julio 1990), la adreso de REA estas: Bd. V. Pârvan 4 (Universitate), R-1900 Timișoara. La adreso CP 37-146, Bukarest ne plu validas.

La nove elektita prezidanto de REA estas prof. d-ro Ignat Bociort, Bd. Eroilor 7/D, Timișoara. Vicprezidantoj estas Ioan Sîrbu (Brașov), inĝ. Dorin Hehn (Timișoara) kaj d-ro Marian Constatinescu (București). Ĝenerala sekretario estas Dorin Cosma, kaj kasisto Elena Ostoia. La nova estraro havas 27 anojn kaj trijaran mandaton.

Interlingvistiko en Timișoara estis pagintaj el propra poŝo – ĝis 1984 – pli ol tridek mil leojn.

Jam ekde pasinta januaro Rumana Esperanto-Asocio havis provizoran konsilantaron, spontane kaj sen klaraj ŝarĝoj dividitan inter nur du centroj (Timișoara kaj Bukareŝto), kvankam ĝi rolis "tutlande". Malgraŭ la pli favoraj kondiĉoj, en la unua duonjaro en malmultaj centroj estiĝis filioj de REA; kaj ĉar malmulte okazis pri Esperanto, en diversaj urboj la esperantistoj komencis organizi en "sendependaj" strukturoj. Estis do grandega aro da solvendaj problemoj kaj neniuj tutlanda renkontiĝo aŭ kongreso povus tuj solvi ilin ĉiujn. Por ni ege gravis nun ne ĝuste la solvo de ĉiuj problemoj, sed la plifortigo de la ĉefaj pozicioj novkonkeritaj. Por tio tutlanda kongreso montriĝis la taŭga rimedo.

Agemo, pasio, sinofero

Ni ricevis plenan apogon en Timișoara: favorprezajn tranoktejojn, bonegajn manĝkondiĉojn, kaj la uzon de du el la plej belaj salonegoj de la urbo, sed krome la tujan represon de E-lernolibro fare de la universitato, afiŝojn, inivitilojn kaj legitimilojn. La inaŭguron ĉeestis distriktaĵaltranguoj, sciencistoj, universitatanoj, verkistoj, gestudentoj ktp. Pluraj eminentuloj salutis la kongreson ne per simplaj ĝentilaĵoj sed per vere sciencaj, kulturteoriaj referaĵoj apogantaj Esperanton, pri kiuj la amaskomunikiloj poste informis, ofte citante la esperantlingvajn enkondukajn frazojn. La inaŭguro larĝe malfermis la pordojn por la internacia scienc-kultura aranĝo de venonta majo.

Pli ol 30 personoj sukcesis trapasi ekzamenon por atestilo pri la rajto instrui Esperanton. El inter la kongresaj decidoj, substrekindas la ŝanĝo de la centra sidejo de REA al Timișoara, almenaŭ por la venontaj tri jaroj. Pro lia longa agado en la movado kaj fideleco al la ideo, la kongreso deklaris prof. d-ron Aurel Boia honora prezidanto de REA (pri ceteraj postenuloj vidu la apudan kadron). La kongreso rolis ankaŭ kiel ĝenerala provo rilate la funkciadon de ĉiuj strukturoj, kaj dank' al la favoraj interkonsentoj kun la universitato ĝi alportis ankaŭ fincan profiton. La gvidantaro de lernejoj ĉiurangaj kaj de aliaj scienc-kulturaj institucioj eksciis per radio kaj televido, ke Esperanto en Rumanio ekzistas, legitimas kaj funkcias en supera forumo. Kaj nia esperantistaro montris sin agema, pasia, preta por sinofero.

Ignat Bociort

"Milda revolucio" revenigas Todorov

De la 29-a de junio ĝis la 1-a de julio okazis la regula 42-a kongreso de Bulgara Esperantista Asocio. Tiu kongreso tamen ja fariĝis, kiel facile divenis ĉiuj aŭguristoj, eksterordinara, vera mejloŝtono en la agado de niaj bulgaraj samideanoj.

Sed kiel priskribi la agitan preparon de tiu aranĝo, tute laŭ la instruoj de la modernaj politik-kampanjoj? Februare okazis en Vraca, la nova ideologia ĉefurbo de la movado en Bulgario, kunveno de la malkontentaj pensantaj kapoj en BEA. Tie naskiĝis la diskutklubo "La dua jarcento de Esperanto kaj ni", kiu tuj ellaboris tre konkretan kaj detalan platformon pri la problemoj de nia movado en Bulgario enkadre de la demokratiigo de la soci-politika vivo en la lando. Fakte tiu alvoko havis tiom enorman reĥon en la asocio, ke ĝi estis ĝis la kongreso subskribita de kelkcentoj da asocioj, inkluzive de la tuta malnova estraro.



Todorov: populara

La klubo faris ankaŭ sian proponon por la statuto de Bulgara Esperanto-Asocio (tiel nomota – rimarku la simolan nom-ŝanĝon), kiu, denove sub la ekstera politika influo, kreas prezidantan institucion en la asocio, tute novan en Esperantio: la kongreso elektas prezidanton, kiu proponas estraron al la komitato, same elektita de la kongreso.

Fine la klubo mem faris sian proponon por prezidanto: Petar Todorov, tre ŝatata persono en BEA, ĝia vicprezidanto ĝis la puĉo de 1987, iama estrarano de UEA.

Grave estas atentigi, ke la klubo komencis dialogon kun la malnova estraro, kun kiu ĝi interkonsentis definitivan proponon de statuto, kaj

ankaŭ kun la ordinara esperantistoj. En ĉiuj aranĝoj tra la tuta lando klubanoj prezentis kaj diskutis siajn proponojn por platformo, statuto kaj prezidanto, tiel ke en la kongreso mem ĉiuj delegitoj bone konis ilin. Krom tio la revuoj de BEA, Esperanta kaj bulgarlingva, publikigis la platformon kaj plurajn artikolojn de klubanoj. Kune kun la kongresaj dokumentoj, ĉiuj delegitoj kaj gastoj ricevis flugfolion prezentantan la kandidaton de la klubo Petar Todorov. Kiel dirite: ĉio laŭ la moderna varbado.

Elektioj ĝis la kvara matene

La kongreso mem tute ne estis kvieta. Kvarcent kvindek delegitoj kaj pli ol cent gastoj plenigis la teatron de Ŝumen. Ĉiu havis siajn ideojn, ĉiu deziris paroli. La rezulto estis, ke la balotoj por prezidanto, komitato kaj revizia komisiono ekokazis noktomeze. El tri kandidatoj por prezidanto, Petar Todorov ricevis 99% el la voĉdonoj. La kalkulo de rezultoj por la komitato, kie konkuris 70 kandidatoj por 45 lokoj, daŭris ĝis la kvara matene. Ankaŭ tie ĉi elektiĝis preskaŭ ĉiuj kandidatoj prezentitaj de la diskutklubo, same kiel en la asocia arbitracia organo, kiu antaŭvideble havos ne malmultan laboron en la proksimaj monatoj. La rezultojn oni anoncis en la nacia radio jam antaŭ la fino de la kongreso.

En la unua komitata kunveno estis aprobita la propono de la prezidanto pri sia estraro kaj pri la junulara observanto. Ŝoke estas, ke la estraro malgrandiĝis al naŭ membroj kaj perdis almenaŭ dudek jarojn, ke ĝin konsistigas intelektuloj el la tuta lando, ĉiuj spertaj en la internacia movado. La politika ĉefurbo Sofio perdas sian troan pezon, tamen sukcesas havi tiom da reprezentantoj kiel Vraca. Substrekinda estas la decido, ke neniuj dungito enposteniĝis kiel estrarano, kio komplete minis la asocion dum la pasintaj jaroj. Ni fine menciuj, ke la unua neorganiza decido de tiu komitato estis investi unu milionon da levoj por modernigi la asocian presejon – dum la meza monata salajro en la lando estas 230 levoj.

La diskutklubo same reorganizigis. Estos anstataŭitaj la proparolantoj, kiuj aniĝis en la estraron, tial ke ĉiam tiu klubo restos avangardo de la opozicio, kun novaj ideoj de la intelektularo.

Nun komenciĝas la laboro: dek mil esperantistoj en Bulgario atendas ne vortojn, sed ŝanĝojn.

Hektor Alos i Font (Katalunio/Bulgario)

Faka agado:

Fervojistoj elprovas la norvegan gastamon

La norvega urbo Hamar gastigis de la 2-a ĝis la 8-a de junio 1990 preskaŭ 400 fervojistojn el 22 landoj. Estis la 42-a kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF), unu el la fakaj organizaĵoj aliĝintaj al UEA. Lokan akcenton metis, krom vizito al la tiea fervojmuzeo, prelego pri la novkonstruita centra stacio de Oslo. Miregis la teknika kaj arkitektura solvo krei el du apartaj stacioj unu solan stacion inkluzive la relaron. Reprezentantoj el naŭ landoj referis, subtenate per videofilmoj kaj diapozitivoj, pri fervojaj kaj trafikaj aktualaĵoj. Komisionoj por fakprelega kaj terminara laboroj raportis pri sia agado. Germana

Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) prezentis la tradukaĵon de internacia reglamento por la fervojtransporto de varoj (CIM) aldone al la jam tradukita reglamento por la fervojtransporto de pasaĝeroj kaj pakaĵoj (CIV).

Post 22-jara sukcesplena gvidado la germano J. Giessner transdonis la prezidantecon de IFEFF al sia posteulo, la norvego P. Engen. Krom diversaj kulturaj aranĝoj kaj inaŭguro de



Esperanto-strato okazis du tuttagaj ekskursoj, unu al la iama kupromineja urbo Røros kaj alia al Lillehammer kaj ĝia subĉiela muzeo de antikvaj lignodomoj. Bone sukcesis la postkongreso al Bergen, urbo de la venontjara UK.

En majo 1991 la IFEFF-kongreso okazos en Brno (Ĉeĥoslovakio) kaj en 1992 en Münster/Vestfalia (FR Germanio).

Wilhelm Barnickel (FR Germanio)

Preskaŭ senpena informado

Komence de julio okazis en Stokholmo konferenco de *International Lesbian and Gay Association* (Internacia Lesba kaj Geja Asocio), kiun partoprenis 252 delegitoj el 31 landoj. Proksimume 90% el la kunsidoj estis en la angla lingvo, sed en diversaj anguloj tradukistoj flustris al apuduloj en hispana, franca, litova, ĉeĥa kaj aliaj lingvoj. Fojfoje tradukistoj devis ekkrii "*More slowly, please!*" (malpli rapide). Delegito de la konferencurbo por 1991, nome Guadalajara en Meksikio, parolis hispane nur.

Ceestis ses esperantistoj – po unu el Belgio, Britio, Ĉeĥoslovakio, Germana DR kaj Italio, kaj franco loĝanta en Svedio. Ni ne trudis per fanfaronado pri nia lingvo, sed nur ĝentile komentis pri la lingva ĥaoso per la angla (kvankam granda plimulto bone scias la anglan – eble delegitiĝis pro tio). Sed inter ni, ĉe manĝoj, dum paŭzoj ktp, ni – ĉiuj fluaj parolantoj – malkrokodilis. Reago de apuduloj: *miro!* Konstato, ke oni ja povas interparoli per Esperanto! "*Ĉu vere vi lernis ĝis tia nivelo per nur unujara studado? Nekredeble!*" Aliaj volis kunaŭskulti la miraklon. Radiointervjuisto kun magnetofono intervjuis min – en tiu momento, hazarde preterpasis du aliaj el la esperantistoj kaj ni povis registri kelkajn frazojn en Esperanto.

Kie ni rimarkis veran interesiĝon, ni fordonis informilojn.

Ĉu ni eltrovis novan ideon propagandi? Eble jes, tamen malfacile organizeblan. Bezonataj estas: ia internacia kunveno kun lingva problemo; malgranda nombro da kapablaj esperantistoj (balbutantoj tute detruus la efikon), kies aliaj lingvoj estu malsamaj, kaj kiuj ofte estu aŭdataj paroli Esperanton inter si; preteco disdoni informilojn sen ŝajni trudema; kaj hazarda bonŝanco.

Peter Danning (Britio)

Edukado:

Peresperanta kursaro lige kun 78-a UK

Per informbulteno de majo 1990, Antonio Alonso Nuñez – matematikisto, E-instruisto kaj la nuna prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio – unuafoje publikigis la detalojn de projekto pri Internaciaj Preuniversitataj* Somerkursoj en Esperanto. La preparlaboroj jam daŭris kelkajn jarojn. Nuñez sukcesis havigi subtenon de la hispana edukministerio, la Universitato de Santiago de Compostela kaj la registaro de la Aŭtonoma Komunumo de Galegio; sur tiu bazo "la projekto povas eniri sian unuan fazon de oficiala realigado."

La ideo estas jena: En unu kursejo en Santiago de Compostela oni kolektos 100-150 gelernantojn el diversaj landoj, ĉiujn jam kompetentaj pri Esperanto. Al ili oni proponos aron da elekteblaj kursoj, ekz. pri matematiko, fiziko, kemio, biologio, geografio, historio, juro, filozofio, literaturo, esperantologio ktp. Por ĉiu studebla temo ekzistos studkajero 50-ĝis 100-paĝa, verkita kaj kontrolita de teameto de esperantistaj fakuloj. La materialon en ĉiu kajero prezentos dum

po unu semajno docentoj el kiel eble plej da landoj. La kursoj celos universitatkomencan nivelon: unue ĉar je tiu nivelo ekzistas ĝenerale utilaj scioj, aplikeblaj en iu ajn lando; due "por provizi ponton inter la jam iom abunda instruado de Esperanto je elementa aŭ meza nivelo kaj la ekfloranta universitata kaj similnivela laboro per Esperanto"; trie ĉar "la terminologia laboro estas pli abunda kaj pli facile farebla ĝuste por la preuniversitata nivelo".

En la nuna stadio de la projekto, precipe bezonataj estas kunlaborantaj fakuloj kaj instruistoj. Unuaperiode oni dependos de libervola aliĝo, kvankam iom post iom evoluos regularo kaj kunordigantaro. La unua kursaro, somere de 1993 (kiam oni planas okazigi la 78-an Universalan Kongreson en Valencio), estos nur komenca provo: se ĝi montriĝos valora, ĝi povos fariĝi ĉiujara evento aŭ eĉ okazi en pluraj lokoj en unu sama jaro.

Se vi deziras kunlabori pri la preparado de studontoj, la verkado de studkajeroj aŭ aliaj flankoj de la projekto, bonvolu skribi al: Dirección: Curso de Esperanto, Instituto de Idiomas, Praza de Mazarelos s/n, E-15703 Santiago de Compostela, Hispanio.

*preuniversitata kunigas la signifojn de "antaŭuniversita" kaj "universitatprepara"; vidu ankaŭ la priskribon en la dua alineo.

Per Esperanto miaj gefratoj ekkomprenis la francan

La esperoj pri Kubo estis trompaj. Antaŭ unu-du jaroj oni multe parolis pri la ebleco, ke la kubanoj povos subvencii la vojaĝon de afrikaj esperantistoj al la 75-a UK. Havano fariĝus la plej granda afrika kongreso de post Varsovio. Sed ekonomiaj kaj organizaj problemoj nuligis la revon.

Afrikanoj do ne venis al Havano. Sed du el ili venis al Eŭropo. Bruno Randrianarivelo, el Madagaskaro, sukcesis akiri stipendion de la Junulara Fakto de Unesko por dumonata "trejnado". Kaj Emmanuel Djikoune, el Senegalio, ricevis malavaran helpon de kvar finnaj esperantistoj, kiuj elĉerpis siajn ŝparkontojn por venigi lin al someraj Esperantaj kaj skoltaj aranĝoj.

Pri Emmanuel mi aŭdis jam antaŭ lia vojaĝo. Jen "simpla" kamparano, loĝanta kun sia patrino kaj nevo en eta vilaĝo, kiu pene vivtenas sin kultivante legomojn kaj kaptante fiŝojn. Sed li, kvankam tute izolita de aliaj esperantistoj, instruis al si legi, skribi kaj paroli Esperanton je mirinde alta nivelo.


Subteno de Unesko

Ni parolis telefone pri liaj vojaĝspertoj. "Komence mi sentis min tiel sola. En la Kvinpinta Semajno ŝajnis, ke nur mi konas neniun alian personon, kaj la etoso en Eŭropo estas tiom malsama al tiu en Senegalio. Mi sentis min fremdulo. Sed iom post iom fariĝis pli bone. Estis sensimila okazo al mi gustumi por la unua fojo la Esperantan etoson, loĝante, ludante, manĝante kune, amikiĝante samtempe." Krom en la KPS, Emmanuel – skolta trupestro en sia hejmlandregiono – partoprenis ankaŭ en TERVAS, la plej granda ĵamboreo de la finna skolta movado. "Kvankam ni estis malmultaj esperantistoj (unu germano, unu senegalano, kvin poloj kaj kvin finnoj), ni sukcesis konatigi nin al la aliaj, partoprenante ludvesperojn per Esperantaj kantoj. Estis tre interesa tendaro por aktivemuloj. Kvankam la esenco de skoltismo estas sama en ĉiu lando, estas tamen kelkaj diferencoj, ĉar ŝajnas tute neimageble kapabli organizi en Senegalio, mia lando, similajn aktivadojn, pro la mono kaj necesaj specialistoj."

Emmanuel havis ankaŭ kroman celon en sia vojaĝo: akiri subtenon por agrikultura projekto en sia regiono.

Tio estas ofta kombino, laŭ Hans Bakker, la UEA-komisiito por Afriko. "De multaj jaroj ni sendas subvenciproponojn al la Junulara Fakto de Unesko, kie unu el la postuloj estas, ke la restado en Eŭropo devas utili al la profesio de la koncernato. Fakte ŝajnas al mi ke tio estas reala helpo, kiun ni povas proponi al niaj afrikaj samideanoj. La senlaboreco en Afriko estas plago kiu detruas tutajn generaciojn. Nek varbado, nek instruado egalas al la graveco de la utiligado de Esperanto por ebligi al tiuj homoj labori utile por sia socio, sia familio, sia propra evoluo."

Bruno Randrianarivelo verkas cirkulerojn en la "malriĉa oficejo" de Fiestama, la junulara klubo de Antananarivo.



Jam plurfoje sukcesis tiaj subvencijetoj – kun kulmino en 1988, kiam Unesko pagis la vojaĝojn de ne unu sed du afrikanoj (tanzaniano Mramba Simba kaj zairiano Jabalunta Dila) al Eŭropo. Hans raportas "tre miksitajn" rezultojn. "La elekto de stipendiuloj ne ĉiam estas trafa, kvankam venis ankaŭ mirinde valoraj homoj. Kaj montriĝis multe pli facile aranĝi konatiĝon kun la movado, ol doni al ili vere profundan lingvan spertiĝon. Tio laŭ mi estas esenca afero. Sen intensa kurso, kian aranĝis la hungaroj en 1987, eĉ talentaj homoj povas reiri sen bone skribi kaj

paroli la lingvon. En la roterdama kongreso, ekzemple, niaj afrikaj gastoj simple perdiĝis. Tial por la venontjara UK mi tre insistis pri la bezono de tia lingva preparo."

La ĉi-jara stipendiulo, Bruno Randrianarivelo, estas unu el la nova generacio de madagaskaraj aktivuloj. Dum lia restado en la Centra Oficejo mi povis detale ekscii pri la fono de lia esperantisteco. "Mi hazarde eksciis pri Esperanto de amiko de mia kuzo, ĉe kiu mi laboras pri meblofarado. Poste mi lernis sola, neniuj instruistoj min. Mi devenas el kamparana familio kun 14 infanoj. El ili nur mi faris mezlernejon, kun financa helpo de mia onklo. Sed estas tre menciinde, ke nun kvar el miaj gefratoj konas Esperanton kaj per ĝi sukcesas kompreni la francan, kvankam ili neniam studis ĝin." En Madagaskaro regas tipa postkolonia dulingveco: "Sur la insulo loĝas 18 diversaj triboj, kiuj uzas la malagasan lingvon. Sed tuj kiam oni eniras la lernejon oni ekuzas la francan. La franca estas la lingvo de la registaro, tamen nur ĉ. dek procentoj de la loĝantaro bone regas ĝin. Tio estas por ni hontiga, ĉar ŝajnas ke la afrikanoj povas evolui neniam, ili ĉiam devos uzi la kolonian lingvon."

Sepdek aktivuloj, unu skribmaŝino

Mi levis ĉe Bruno la delikatan demandon de la organizaj konfliktoj, kiuj de jaroj malhelpas la madagaskaran movadon. "Ĉe ni estas kelkaj esperantistoj, kiuj jam de 1960 ludas tre gravan rolon. Pro sia antikveco ĉiu volas estri la movadon, sed malgraŭ tio ili ofte ne bone laboras. Por ili temas pri honoro. Mi de mia apero en 1986 klopodas neŭtrigi ilin kaj aranĝi kunlaboron. Precipe ekde la centjariĝo ni sukcesis allogi multajn gejunulojn: nia junulara sekcio havas jam 521 membrojn, el kiuj ĉ. 70 estas aktivaj. La junuloj prenas grandan rolon kaj ne tre ŝatas la maljunulojn, kiuj nur volas regi laŭ malnova maniero."

Bruno entuziasme rakontis pri la atingoj kaj planoj de tiu junulara movado. "Ni partoprenas en la forumo en la ĉefurbo por gejunuloj. Jen ekzemple ekspozicio, kiun vizitas la ministro," kaj li elfingris foton el granda fasko, kiu prezentis la renkontiĝojn kaj kunvenojn de la esperantistoj. "Ni havas unujaran kurson en nia centro, CNELIE, kaj ni instruas ankaŭ en 15 ŝtataj lernejoj, en la horo por libere elekteblaj kursoj. Ni atingis lernejojn jam 70 kilometrojn for de la ĉefurbo, kaj ni planas plivastigi tion ĝis 200 kilometroj en 1995. Dume ni volas eniri ankaŭ la licean sistemon, kaj finfine, eble ekde



“Estis sensimila okazo”: Emmanuel Djikoune adaptiĝis rapide al la etoso de la Kvinpinta Semajno. (Dekstre: Betty Maul.)

1996, ni esperas aranĝi kursojn en la universitato.” Mi demandis, kiel ili sukcesas varbi lernantojn. “Ni diras unue, ke Esperanto plifaciligas la lernadon de aliaj lingvoj. Mi kaj miaj gefratoj jam spertis, kiel ĝi efikas. Due ĝi helpas por havi internacian rilaton, kaj por vojaĝi eksterlanden. Tiu ĉi mia vojaĝo estas tre grava, ĉar oni vidas, ke Esperanto havas praktikan utilon. Mia familio jam suferis, ĉar ĝis nun ni devis pagi ĉion el la propra poŝo, sed nun ili estas konvinkitaj. Sed tre gravos ankaŭ, ke aliaj aktivuloj, ne nur mi, iru eksterlanden. Madagaskaro estas tiel malproksime, ke malofte venas eŭropanoj. Ni devos oferi por veni al Eŭropo.”

Efektive la aplikado de Esperanto estas la plej malfacila afero por la madagaskara movado. Bruno jam pripensas kelkajn projektojn, realigeblajn ene de relative mallonga tempo. Kiel okazas ankaŭ en Zairio, li emfazas la potencialon de muziko kiel kontribuo de afrikaj esperantistoj al la Esperanta komunumo – kaj kiel fonto de enspezoj.

Ĉu vi korespondas afrike?

Multaj esperantistoj en Eŭropo kaj aliloke nun havas kontaktojn kun la movado en Afriko. Estas tamen ofte malfacile scii pri la kondiĉoj surloke, aŭ decidi kiel reagi al iu peto pri helpo. Se vi sentas bezonon de konsilo, aŭ deziras atentigi pri iu problemo aŭ okazaĵo, bonvolu turni vin al la komisiito pri Afriko: Hans Bakker, Kastelenstraat 231, NL-1082 EG Amsterdam. Ĉiuj demandoj estos traktataj konfidence, laŭ via deziro.

Tre utilus ankaŭ fotokopiilo, kiu laŭ lia takso povus pagi ĉiujn rutinajn elspezojn de la centro en la ĉefurbo. Urĝe bezonataj estas vortaro malagasa-Esperanta kaj kelkaj bazaj ekipaĵoj: “Ni havas nur unu skribmaŝinon, kiu estas tre malnova kaj truas la paperon.” Pli longperspektive, li esperas trovi rimedojn por konstrui aŭ aĉeti gastodomon, taŭgan por loĝigi turistojn, kaj lige kun ĝi iun monumenton al

Esperanto kaj Zamenhof. Sed multo dependos de la subteno de alilandaj esperantistoj. Bruno pledas, ke ili sendu informojn pri Esperanto rekte al la aŭtoritatoj en Madagaskaro: “Poste ili serĉos nin por traduki.” Kaj kompreneble, plej bonvenaj estas gastoj.

Verŝajne, tamen, la plej multaj evoluoj en afrika Esperantujo okazas silente kaj neobserveble. Mi finu per unu esperdona ekzemplo el Benino. Privas Tchikpe estis inter la afrikanoj, kiuj gastis ĉe la 72-a UK en Varsovio. Jam de 1986 li klopodas akiri oficialan permeson por Benina Esperanto-Asocio, kiu dum iom da tempo devis eĉ ĉesi kunveni pro la malaprobo de la aŭtoritatoj. Nun, en septembro 1990, li finfine povis leteri al Hans Bakker: “BEA estas oficiale agnoskita. Entenate kopio de la letero de la ministro pri internaj aferoj. Mi tre ĝojas, ke post tre streĉaj paŝoj la nuna estraro de BEA atingis tian rezulton. Niaj posteuloj daŭrigos la laboron en totala legitimeco.” Samletare li menciis la havigon de biblioteka salono, radielsendojn pri Esperanto, kaj la planojn por la sekva E-kurso. Malgrandaj paŝoj, certe: sed simbolaj pri la malrapida, senhalta disvastiĝo de la internacia lingvo sur la afrika kontinento.

Mark Fettes

Distribuita Lingvo-Tradukado:

DLT en financaj problemoj

En julio 1990 finiĝis la sesjara subvencio de la nederlanda registaro por evoluigo de la DLT-projekto. La projekto, kiu naskiĝis kaj evoluis kadre de la programar-firmao BSO en Utrecht, Nederlando, esploras la uzon de Esperanto kiel interlingvo por perkomputila tradukado. De pli ol unu jaro la projekto serĉas industrian partneron, kiu pretus grandskale investi en la konstruo kaj enmerkato de komerca traduksistemo laŭ tiu modelo. Tia partnero tamen ankoraŭ ne aperis, kaj DLT nun frontas necertan estontecon.

Kiel esplorprojekto, DLT jam montriĝis tre sukcesa. Per proksimume 50 hom-jaroj da laboro, la teamo en Utrecht amasigis originalajn studojn pri komputa lingvistiko, konstruis du prototipojn de la traduksistemo, ellaboris tute novajn konceptojn kaj sistemojn por perkomputila tradukado kaj povis peti plurajn internaciajn patentojn por siaj eltrovoj. La plej grava el tiuj, la dulingva sciobanko, estas

aplikebla al multaj aliaj taskoj krom tiu de simpla tekstotradukado – ekzemple al la kompilado de dulingvaj vortaroj kaj al terminologio. La esploroj plene pravigis la elekton de Esperanto kiel interlingvo, en manieroj ne antaŭviditaj kiam la projekto komenciĝis.

Ekde julio la esplorgrupo, gvidata de esperantologo Klaus Schubert, funkcias sub la nomo “BSO/Language Systems” (“Lingvosistemoj”), kun la celo vendi sian fakan scion al diversaj klientoj. Neniu scias, kiom longe daŭros ĝis la definitiviĝo de kontrakto pri DLT-speca komerca traduksistemo, kaj povus esti ke BSO decidus kunlaborigi la grupon en aliaj lingvoteknologiaj projektoj de eksteraj investantoj. Eĉ ekzistas la eblo, ke troviĝos neniu firmao preta grandskale investi, aŭ ke Lingvosistemoj ne sukcesos vivteni tiel longe sian kernon de homa sperto. Ŝajne temas pri granda malŝparo. Sed tia malŝparo estas ja konata fenomeno en la scienca kaj komerca mondoj.

Fondaĵoj:

Du novaj bazoj por trejni kaj instrui

Apartaj fondaĵoj ĉiam estis bonvenaj en la kapitalo de UEA. Kvankam ili ne mankas (estas tuta dudeko da ili en la kontaro de UEA), pluraj nur vegetas aŭ ekzistas surpapere. Tamen, por ke fondaĵo aktive funkcii, necesas ke ĝi disponu pri konsiderinda kapitalo aŭ pri alia fonto de regulaj enspezoj. Se tiel rigardi, la nombro de la monhavaj fondaĵoj en UEA fariĝas preskaŭ malgranda. Jen eta listo, kun la skizo de ilia nuna stato:

Fondaĵo Afriko tute ne havas kapitalon. Ĝi altiras donacojn je dudekmilo da guldenoj ĉiujare, sed ĝi elspezas duoblon de tio kaj kovras sian debeton el la Propaganda Konto. Estus tamen tre dezirinde krei kapitalan bazon por Fondaĵo Afriko, des pli ke en Afriko dum la lasta jardeko okazas vigla kaj promesplena agado por Esperanto.

Fondaĵo Azio estas riĉa, ĉar ĝia kapitalo de preskaŭ duonmiliono da guldenoj generas ĉiujare interezon de ĉ. 30 000 gld. Feliĉe, tie nun komencas aperi bonaj agad-ideoj por saĝe elspezi la monon.

Mankas en la kontaro **Fondaĵo Sud-Ameriko**? Ne mankas bezono helpi en tiu movade dua plej forta kontinento.

Fondaĵo Canuto ne disponas pri kapitalo. Kelkmilo da donacitaj guldenoj ne sufiĉas por membrigi en UEA plurajn centojn da nepagipovuloj. Tial necesas ĉiujare subvencii la Fondaĵon el la Propaganda Konto per sumo de 11 500 gld.

Fondaĵo Grabowski disponas pri kapitalo de ĉ. 27 000 usonaj dolaroj. Ĝin kreis kaj evoluigis s-ro A. Goralski (Kanariaj Insuloj) kaj ĝi nun post kelkjara interrompo denove funkcias.

Fondaĵo Junularo iasence enhavas jaran spezaron de TEJO. Ĝi malhavas kapitalan bazon sed ricevas regulajn enspezojn el TEJO-kongresoj, kiam ili saldiĝas pozitive.

Propaganda Konto estas (aŭ devus esti) la ĉefa kaj finance la plej potenca el la fondaĵoj, ĉar ĝin enfluas 45% de la kongresaj gajnoj. Tio estas en ordo, kiam la kongresoj saldiĝas kun gajno. La 74-a UK en Brajtono portis ĉ. 65 000 gld. al tiu fondaĵo. Helaj perspektivoj pri granda gajno el la 75-a UK en Havano ne ekzistas.

Triamonda Kongresa Fondaĵo disponas pri kapitalo de ĉ. 50 000 gld. La interezo de tiu kapitalo ebligas kovri

partoprenkostojn de manpleno da triamondanoj Universalaj Kongresoj.

Fondaĵo Wüster disponis pri iom pli ol 30 000 gld. el donacoj de ĉefe unu fervora mecenato. Nun la Fondaĵo kovras konstantajn kostojn de la Terminologia Esperanto-Centro kaj ĝia havaĵo rapide eroziĝas.

Nu, la komenca dudeko da fondaĵoj nun ŝrumpis al nur ok menciitaj ĉi-supre. Lastatempe la Estraro de UEA akceptis proponojn lanĉi du novajn fondaĵojn. Ili jam havas (aŭ komencas havi) bonan financan bazon. Jen pri kio temas:

La dua ĉi-foja lanĉaĵo estas la **Volontula Fondaĵo**. Ĝia iniciatinto estis la forpasinta direktoro de la Centra Oficejo, Neil Salvesen. Li planis revivigi la komencan vervon per kiu UEA lanĉis la Volontulan Servon en 1975. Salvesen entuziasmis pri la ideo, ke tiu Servo funkcii kiel lernejo por trejni movadajn aktivulojn. Se ni nun rerigardas al la 15-jara historio de la Volontula Servo, ni konstatas, ke ĝi ja efike servis kiel movada lernejo. Pri tio konvinku vin manpleno da nomoj de iamaj volontuloj en la Centra Oficejo: Dai Song-en, Giulio Cappa, Ian Jackson, Hisasi Kitagawa, Ian Tarrant, Eva Formaggio, Robert Haddon, Stefan MacGill, Anna Brennan, Alex Humet, Pasquale Zapelli, Probal Daşgupto ... Salvesen volis preventi, ke la Oficejo prenu volontulon nur kiam tion postulas la laboro kaj



La fruktoj de trejnado: Iama volontulo Ian Jackson, en junio edziĝinta al Judith Bormann (supre), ekde januaro estos la ĝenerala sekretario de UEA. La Volontula Fondaĵo atendas similajn talentulojn.

Fondaĵo Saliko estiĝas el komenca kapitalo de 50 000 germanaj markoj. Tiun sumon donacis la gefiloj de Edith kaj August Weide por omaĝi siajn gepatrojn, kiuj dum multaj jaroj okupiĝis pri la instruado de Esperanto. La Fondaĵo celas subteni la instruadon de la lingvo, precipe en landoj sen organizita E-movado. Ampleksigaj donacoj al la Fondaĵo estas tre bonvenaj. La administra adreso de la Fondaĵo estas tiu de UEA. Al ĝi oni sendu klarajn, bone dokumentitajn subvencipetojn antaŭ la 31-a de marto ĉiujare. La donacintoj de la baza kapitalo decidis pri aljuĝo de subvencioj unufoje jare kaj anoncos tion i.a. en ĉi tiu revuo. Bonvolu tamen atenti la specifan celon de la Fondaĵo kaj ne skribi al ĝia adreso, se viaj agadplanoj ne kongruas kun tiu celo. La disponebla interezo por subvencioj estos ĉ. 4000 guldenoj jare.

permesas la buĝeto: la Servo havu propran kapitalon el kies interezo eblos ĉiujare trejni almenaŭ unu volontulon. Malfeliĉe, nur post la morto de Salvesen lia revo komencas realiĝi. Lia familio donacis al UEA la stokojn de lia eldonejo Esperantaj Kajeroj favore al la nova Fondaĵo. Krome, venis kelkmilo da guldenoj el omaĝaj kontribuoj de liaj geamikoj. Alia antaŭa oficisto de UEA, Akiko Ŭusink-Nagata, faris testamenton al UEA kaj s-ro Woessink konsentis, ke ĝi eniru la Volontulan Fondaĵon. Je nur supraĵa mencio de la intencoj krei novan fondaĵon reagis prof. Waringhien per donaco de 500 gld. Ni nun kalkulas, ke la komenca kapitalo de la Volontula Fondaĵo sumas ĉ. 40 000 guldenojn. Espereble, troviĝos pliaj donacantoj, tiel ke la kapitalo grandiĝu kaj ke la lernejo de la volontuloj funkcii kaj prosperu.

sm

Fondaĵo Antoni Grabowski:

Brazila, franca, japana eldonejoj kaptas ĉefpremiojn

La juĝkomisio de Fondaĵo Grabowski (s-roj Ulrich Lins, Aldo de'Giorgi, Herbert Mayer), post longa perkoresponda diskutado, unuanime decidis atribui la laŭregularajn subvenciojn por 1990 kiel sekve, pro la jenaj motivoj:


- 700 US dol. al la eldonejo Fonto, Brazilo, pro ĝia altnivela eldona aktivado dum pli ol 10 jaroj, inkluzive de la beletra revuo *Fonto*, de la filozofia revuo *Simpozio*, plus multnombraj valoraj libroj. Eldonejo Fonto, zorgata praktike de unu sola homo, s-ro Alfredo Gersi Bays, ĉiam aktivis meze de senfinaj malfacilaĵoj, precipe pro la katastrofa inflacio en la eldonlando Brazilo, pro ekspedaj misfunkciadoj kaj transpagaj problemoj, sed tamen sukcesis ĝis nun ĉion superi. La eldonaĵoj de Fonto, krom ĝenerale altkvalitaj el literatura vidpunkto, sin prezentas regule en tre digna vesto, kie preskaŭ tute forestas prezeraroj (kio sufiĉe raras ĉe ni). Interalie Fonto multe helpis diskonigi la Esperantan kulturon ekster Eŭropo, precipe en la sudamerika mondparto.

- 300 US dol. al *La kancerkliniko*, Francio, pro tio ke tiu revuo, kiu ankaŭ estas zorgata de unu sola homo, s-ro Jacques Le Puil, kaj kiu mem naĝas en financaj malfacilaĵoj, plenumis dumlonge apartan rolon en la Esperanta eldonkampo, reprezentante la voĉon de junece alternativa, avangardema, malkonvencia kaj progresiva kulturo, kiaj ekzistas kaj ĉiam havis antaŭenpuŝan funkcion en kiu ajn nacia kulturo. LKK estis (kaj estas) metiejo kaj rivelejo de multaj novaj talentoj, kiuj trovis en ĝi apertan forumon por esprimi libere, sen ajna antaŭkondiĉo aŭ bremsa, siajn pensojn, ideojn, verkmanieron, eĉ se malstereotipajn kaj kontraŭflujajn.

Atribuante al Fonto kaj *La kancerkliniko* la suprajn subvenciojn, la juĝkomisio de Fondaĵo Grabowski tenis en konsideron, ke ambaŭ eldonejoj, kvankam tute privataj, neniam sin metis en poziciojn sterile antagonismajn, polemikajn kaj konkurencajn fronte al la "oficiala" kaj tradicia movado (UEA, landaj kaj fakaj asocioj, *Esperanto*, *Heroldo*, ktp), kiel, male, faris kelkaj similaj entreprenoj kaj organoj.

- 150 US dol. al István Ertl, Hungario, ĉar la juĝkomisio intencis premii aparte reliefigintajn junajn kaj aĝemajn talentojn. István Ertl, ekde kelkaj jaroj, intense aktivis en nia beletra kampo, pere de multnombraj artikoloj, rakontoj, teatraĵoj, poemoj, eseoj, tradukoj, aperintaj en pluraj revuoj. Interalie li gajnis premiojn en la Belartaj Konkursoj de UEA, redaktis la altnivelan revuon *Opus nigrum*,

István Ertl: triumfo de talento.



tradukis hungaren la tutan *Infana raso* kaj aliajn librojn, kaj prelegis diversloke (ekzemple en La Chaux-de-Fonds).

Laŭ la regularo, 35% de la jara rento "estos donitaj al eldonejo aŭ alia kultura instanco de la Esperantomovado". La juĝkomisio elektis por tiu premio la japanan eldonejon Libroteko Tokio, kies gvidanto, s-ino Keiko Syozi, atingis tra la pasintaj jaroj kelkajn kuraĝajn kaj rimarkindajn trafojn, plej laste per la aperigo de bildlibro por Internacia Alfabetiga Jaro kunlabore kun la Azia Kultura Centro de Unesko. Al Libroteko ni ŝuldas ankaŭ i.a. *Bildlibro pri Hiroŝima-Nagasaki* kaj *Nudpieda Gen*, dum ĝi funkcias kiel la komerca peranto de ĉiuj eldonaĵoj de Ludovikito (t.e. la Plena Verkaro de Zamenhof).

Pliaj 15% de la rento estas aljuĝataj al "revuo aŭ instanco de kultura aŭ scienca karaktero". Ĉi tiun premion gajnis *Scienca revuo*, la organo de ISAE, kiu tra jardekoj estis la ĉefa publikigejo por originalaj sciencaj studoj en Esperanto. Post kelkjara organiza krizo, la revuo nun rekomencis aperadi, kaj pli ol ses mil ekzempleroj de pasintaj numeroj estos baldaŭ en la merkato. Per sia decido la juĝkomisio esperas apogi tiun pozitivan evoluon.

Juĝkomisionanoj Ulrich Lins (prez.), Aldo de'Giorgi (sekr.), Herbert Mayer

Intervjuo kun Helmar Frank:

"Mi ne povas atendi kelkajn jarcentojn."

La vestaĵoj estas neformalaj, la etoso feria. Palmoj ombrelas apud sunverŝita naĝejo. La kuba posttagmeza varmo jam dispremis la postkongresanojn, elsuĉis ilian parolemon kaj agemon. Sed io intensa ankoraŭ brilas malantaŭ la okulvitroj de mia intervjuato. Helmar Frank, 57-jara, estas homo posedata de revo.

"Mi taksas, ke ekzistas minimume dek mil homoj posedantaj universitatan diplomon, kiuj scipovas la Internacian Lingvon. Se ni sukcesus kunigi nur 20 procentojn de ili, tio estus jam sufiĉa bazo."

Pasis jam kvin jaroj de post la fondo de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino. Neniu dubas, ke sen Frank AIS ne ekzistus, nek sukcesus travivi la unuan malfacilan periodon. Laŭ sia propra aserto, la kibernetika profesoro el Paderborn, FR Germanio,

dediĉas nur unu tagon semajne al AIS, kaj elturniĝis per la helpo de sia familio. Tragedie, lia talentoplena edzino, Brigitte Frank-Böhringer, forpasis ĉijare, kaj lastatempe ankaŭ lia filino retiriĝis el la laboro por AIS pro siaj studfinaj ekzamenoj. Frank konfesas, ke la laboro kreskegas. "Estas ja malfacile prizorgi ĉion. Ni neniam havis tempon elpensi pli ekonomian laborsistemon, kaj aldoniĝas novaj problemoj – la serĉado de mono kaj kunposedantoj por la konstruotaj centroj en San Marino kaj Bjalistoko, ekzemple. Nun ni havas du novajn polajn helpantinojn, sed ni tre bezonas unu dungitan vojaĝemulon kiu scias plurajn lingvojn kaj povus loĝi en Paderborn aŭ Berlin, eventuale San Marino." Lia rideto malkaŝas memironion. "Se ni laborus per nacia lingvo, estus facile varbi taŭĝan laboranton! Fakte ni ricevis ofertan de iu usona

universitato kun tia kondiĉo. Sed tiam la afero perdis sian intereson.”

La intervjuo fluas facile. Frank parolas verve, preskaŭ torente; liaj manoj gestas dirigente al iu nevidebla orkestro. Nur hardita cinikulo povus rezisti lian nevenkeblan optimismon. “Nuntempe nia Internacia Scienca Kolegaro kreskas per deko da novaj anoj monate. Tio estas malmulte – sed ju pli da ili, des pli da personoj aŭdos pri ni kaj proponos sin. Fine venos eksplodo. Jam ni komencas vidi tute novajn vizaĝojn el reformeŭropaj landoj. Kaj ni komencas ricevi tre interesajn proponojn de kunlaboro. Vi scias jam pri Bjalistoko; sed ekzemple ankaŭ la universitato de Debrecen pretas pagi duonon de la kostoj de AIS-filio. Mi bremsas iomete, ĉar ĝis ni ricevos oficialan rekonon en Hungario ni ne povos enspezi tie. Modelon nun provizis Rumanio, kie ni ricevis ĉiujn rajtojn – nia plej granda sukceso ĝis nun, kiu ankaŭ tre utilis al la rumana Esperanto-movado.”

Ne mono sed honoro

En Rumanio fakte temis parte pri personaj kontaktoj inter Frank kaj la vicministro pri edukado, malnova studento lia. AIS grandparte konstruiĝis sur reto de kibernetikistoj – anoj de ankoraŭ relative nova kaj malgranda scienca branĉo, kiun interalie Frank pioniris ĉe sia instituto, iam en Berlin kaj nun en Paderborn. En la nova rumana universitato de Sîbiu fondiĝos la unua plena kibernetika fakultato en la mondo, en kies kadro situos la unua rumana AIS-filio. Frank antaŭvidas similan evoluon en la universitato de Prago. Sed la kibernetika sekcio estas jam nur unu el pluraj funkciaj en AIS, kaj fariĝas pli urĝa demando, kiel kreskigi la nombron de partoprenantoj.

“Titoloj estas multe pli gravaj por ni ol por aliaj universitatoj. La atesto pri fina ekzameno en nacia universitato donas laborrajton; kion ni donas? Nu, nia solvo estas tiu de Schopenhauer, kiu diris: Se iu ŝtato ne havas sufiĉan monon, ĝi devas anstataŭe doni honoron. Tial nia formaleco rilate la titolojn. Laŭ decido de nia Senato, la kondutnivelo en aranĝoj de AIS ne malsuperu tiun en iu ajn nacia medio. Tio plivalorigas la akiron de titolo.


“Ni devas batali por forigi du timojn. Unue, kelkaj opinias ke ni aŭtomate donas titolon kontraŭ peto. Iuj aferoj estas ja pli facilaj ĉe ni: ekzemple, por diplomiĝi pri kibernetika pedagogio oni ne bezonas trovi tri tiufakajn profesorojn en la sama nacia universitato – tre malfacila tasko – sed povas ekzameniĝi per tri profesoroj el diversaj

landoj kaj fakoj. Nia sistemo aparte taŭgas por ‘interfakaj’ studoj, laŭ mi la vojo de vera progreso en la scienco, kiuj tamen malpli kaj malpli facile trovas lokon en la naciaj universitatoj. Sed ni ne faciligas laŭ la nivelo de la akirita grado. Dekomence ni akceptas kiel profesorojn nur tiujn, kiuj jam akiris la plenan rangon en sia nacia medio. Nur kelkaj atingis tiun rangon ene de AIS mem – unu ekzemplo estas Maitzen, kiu fariĝis unue profesoro ĉe ni kaj poste promociiĝis samnivelen ĉe sia universitato en Vieno.

“La dua timo estas la alia ekstremo: ke nur profesia akademika esploristo rajtas aliĝi al AIS. De jaroj mi klopodas trovi vorton, kiu signifas ‘homo, kiu akiris sciencajn konojn per minimume ĉ. 15-jara laŭregula studado ekde la

por aludoj al la verda geto? Frank mem ne vidas kontraŭdiron. “Ni ja klopodas kunlabori kun la institucioj de la movado. Ekzemple kun ISAE mi negocas pri aŭtomata membreco por la anoj de la ISK. AIS proponis la samon por niaj plenrajtaj profesoroj kaj Akademio Comenius, kies anoj preskaŭ ĉiuj membras en AIS; tamen post la morto de Neergaard estas dubo, ĉu Comenius havas estontecon. Ankaŭ por la fakaj asocioj mi vidas daŭran rolon.

“Ni devos lerni el la funkciado de la Universalaj Kongresoj. Ne el la UEA-kunsidoj, kie oni ofte nur babilas. Sed el la amaseco, el la kapablo imponi. Tion oni ne atingas per sciencaj prelegoj solaj – oni devas danci kaj kunkanti. Per kanzonoj la angla fariĝis ŝika, ĉu ne? Tial ni fondis nian Artan Sektoron.”



*“Oni malofte sukcesas foti min sen kravato!”
Helmar Frank ĝuas kelkajn tagojn da ripozo en Playa Girón.*

elementa lernejo kaj ricevis pri tio ateston”. Ĝuste tiaj homoj estas nia celgrupo por aligo al nia Internacia Scienca Kolegio (ISK). Laŭ la ĝisnuna sperto, duono el la ISK-anoj estas pretaj adapti sian gradon kaj duono el tiuj pretas transpreni taskon, do fariĝi adjunkto aŭ docento. Tial mi ĉiam revenas al tiu cifero de du mil. Kvincent docentoj estus sufiĉaj por malgranda universitato. Eblus atingi tion en unu jaro, se nur la movado koncentrus siajn fortojn.”

Pli kaj pli mi ricevas la impreson, ke la ideoŝprucanto apud mi troviĝas pli proksime al la movado, ol li mem ŝatas konfesi. Ĉu ne temas pri la homo, kiu insiste parolas pri Internacia Lingvo aŭ ILo kaj rezervas la terminon Esperanto

La angla. Neevitebla temo, se oni parolas pri Esperanto en la scienco. Kial reputaciĥava sciencisto okupiĝu pri alternativo, se la anglan li jam regas? Frank: “Oni postulis internacian mezursistemon unuafoje en 1670, kaj finfine ĝi estis enkondukita du, tri jarcentojn poste. Nu, la reguloj de la fiziko ne dependas de la mezurunuoj, sed la fizikistoj ja bezonis rimedon por kunlabori. Same ni nun devas esti pretaj elspezi iom da sciencaj fortoj por rekrei la sciencajn tradiciojn en la internacia lingvo. Tio estas inda celo – sed mi ne povas atendi kelkajn jarcentojn. Mi volas progreson nun, ne en iu fora estonteco kiun mi ne vidos. Do necesas fari ĉion fareblan per la nunaj fortoj.”

intervjuis Mark Fettes



konstante

Esperantotur-direkcio, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando

Internacia Kultura kaj Kleriga Centro, Sobotské namestie 6, CS-058.01 Poprad, Ĉeĥoslovakio

Espertur, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario; tel. (1) 156-0244; telekso 226490 "Műszaki Könyvkiadó/Espertur"

Esperanto-sekcio de Vojaĝoficejo Express, Pf. 567, H-1395 Budapest 62, Hungario; tel. (1) 132-3945 kaj 131-7777/22; telekso 225384 turex h; telefakso (1) 153-1715

Kultura Centro Esperantista (KCE), Pf. 771, CH-2301 La-Chaux-de-Fonds, Svislando
Esperantoturist, str. Positano 40, BG-1000 Sofio, Bulgario; tel. (003592) 882472; telekso 23599 kabini bg

Esperanto-Vojaĝoservo de Usono, p/a Howard Travel Service, 578 Grand Avenue, Oakland, CA 94610, Usono; tel. (415) 836-1707; telekso 49573388 htv l ui; telefakso (415) 834-1019

oktobro

25-28: Internacia Muzika Renkontiĝo, Ostrava, Ĉeĥoslovakio (Ĉeĥa E-Junularo, str. Jilska 10, CS-110.01 Praha 1)

26-28: Akademio Landegg (Esperanto-semajnfino), Wienacht, Svislando (Akademio Landegg, CH-9405 Wienacht; temo "Paŝoj al tutmonda socio")

27-29: 1-a Esperanta Renkontiĝo de Rio de Janeiro, Tres Rios (RJ), Brazilo (Organiza Komitato, Rua Moreira Cesar 220, BR-25850 Paraiba do Sul (RJ))

novembro

02-04: 13-a Belga Aŭtuna Semajnfino, Godinne, Belgio (J.-C. Somer, Marnixln. 105, B-1900 Overijse; celata al junularo)

05-11: 8-a Internacia Metodika Seminario, Kaunas, Litovio (Litova E-Asocio, Pk. 167, SU-233000 Kaunas; temoj "Psikaj faktoroj en fremdlingva instruado; Enlingvaj interferoj en Esperanto; La rolo de la lernolibro"; limdato 1 sept.)

09-11: Internacia Tradukista Seminario, Bučovice (Vyškov), Ĉeĥoslovakio (Miroslav Malovec, Charkovská 7, CS-625 00 Brno)

10-23: Amikeca Turismo por Pliaĝuloj, Zagreb, Jugoslavio (Internacia Kultura Servo, Amruševa 5/1, Pf. 499, YU-41000 Zagreb)

22-02: Internacia Konferenco "Paco, Homo, Kulturo", Tomsk, Sovetunio (Aleksandro Ŝljafer, Pk. 261, SU-634041 Tomsk-41, Siberio)

23-25: Kulturaj Esperanto-Tagoj, Poprad, Ĉeĥoslovakio (IKKC, adreso supre)

decembro

07-09: 36-a Kultura Semajnfino, Kardinal-Wendel-Haus, Homburg/Saar, FR

Germanio (Sarlanda E-Ligo, Querstr. 11, D-6607 Quierschied; temo "Japanio kiel mez-zono inter okcidento kaj oriento"/Yosimi Umeda; prezento de la muzikgrupo "Kajto")

07-10: Esperantaj Tagoj de Krakovo, Pollando (Esperantotur, adreso supre)

09-16: 6-a Internacia Simpozio "Eŭropa Esperanto-Turismo", Moskvo, Sovetunio (Junulara Centro "Intero", Ŝmitovskij proezd 2a, SU-123100 Moskvo; tel. 205-7872; telefakso 975-2029; aliĝo ĝis 20 nov.)

21-22: 9-a Landa Kongreso de Sovetrespublikara Esperantista Unio, Moskvo, Sovetunio (SEU-Kongreso, Esperanto, ul. Volhonka 13, SU-121019 Moskvo)

23-05: Familia Esperanto-Renkontiĝo dum Kristnasko kaj Novjaro, Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, adreso supre)

26-03: Vintro-Feriado, KCE, Svislando (KCE, adreso supre)

27-02: Unua Afrika Kongreseto, Lomé, Togolando (Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; kun ekskursoj la postan semajnon al Benino, Ganao, Ebura Bordo)

27-03: Internacia Seminario de GEJ, Finnentrop, Germanio (Matthias Funke, Carl-Duisberg-Centrum, Mecklenburgering 1, D-6600 Saarbrücken 3; tel. 0681-815 045; temo "Mezeŭropo – kien vi iras?"; celata al junularo)

27-03: 7-a Internacia Festivalo, Sensenstein, Germanio (Hans-Dieter Platz, Maimkammerer Str. 21, D-6731 St. Martin; tel. 06323-5982; temo "La komuna eŭropa domo"; celata speciale al familioj kaj homoj 25- ĝis 50-jaraj)

28-02: 20-a Vintra Esperanto-Ferio, Budapest, Hungario (Budapeŝta Komitato de HEA, Pf. 143, H-1443 Budapest; limdato 30 novembro)

29-04: 12-a Novjara Junulara Renkontiĝo, Zakopane, Pollando (Grażyna Mirkiewicz, ul. Hubska 119/34, PL-50-501 Wrocław; tel. 688 232)

1991

januaro

03-04: Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI, KCE, Svislando (KCE, adreso supre)

07-19: Aŭstralia Esperanta Somer-Lernejo, Adelaide (Sud-Aŭstralio) (Office of Continuing Education, University of Adelaide, Box 498, GPO, Adelaide, South Australia 5001; telefakso 618-22-40464; telekso 618-univad-aa-89141; limdato por aliĝo 1990-12-10)

27-10: Internacia Kurso por Vojaĝgvidantoj, Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, adreso supre)

februaro

Internaciaj Esperantlingvaj Kursoj de Akupunkturo, Bygoszcz, Pollando: 3-foje po du semajnoj en februaro kaj marto, sub gvido de ĉina fakulo Zhu Bin (Esperantotur, adreso supre)

marto

29-01: Paska Renkontiĝo de NEJ, Roden, Nederlando (Ron Doesborg, Nederlandplein 41, NL-5628 AE Eindhoven; tel. 040-412 890; temo "Ĉio en historia perspektivo"; celata al gejunuloj)

29-05: Printempa Semajno Internacia, Jünkerath/Eifel, Germanio (Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 11, D-5483 Bad Neuenahr; tel. 02641-4885; feriado celata speciale al familioj)

aprilo

03-07: TEJO-PSEK-seminario, Zielona Góra, Pollando (Jerzy Rządski, Węgierska 32/5, PL-65-001 Zielona Góra; celata al junularo)

majo

03-05: 12-a Ĝenerala Konferenco de Mondpaca Esperantista Movado (MEM), Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, adreso supre; kun antaŭkongreso, 1-3 majo, kaj postkongresa vojaĝo tra Pollando, 5-9 majo)

05-12 kaj 12-19: Internaciaj Tenisaj Feriadoj, Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, adreso supre)

17-20: Germana Esperanto-Kongreso, München, Germanio (E-Klubo München, Pf. 20 08 03, D-8000 München 2)

junio

30-14: Internacia Pedagogia Kurso por Esperanto-Instruantoj, Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, adreso supre)

julio


02-11: Esperantlingva Skolta Tendaro, Bielsko-Biała, Pollando (Georgo Handzlik, str. Braterska 41, PL-43-346 Bielsko-Biała)

05-14: 3-a Verda Ŝakolimpiko, Podebrady, Ĉeĥoslovakio (Václav Štěpánek, Macurova 16, CS-143 00 Praha)

20-26: 47-a Internacia Junulara Kongreso, Karlskoga, Svedio (47-a IJK, Box 4532, S-102 65 Stockholm; temo "Mondaj movadoj")

26-04: Kampado 91 (por mondpaco, medikonservado, malarmigo per regione aŭtonoma monddemokratio), Zürich, Svislando (Junaj Esperantistoj, Pf. 639, CH-8201 Schaffhausen; tel. 01-383 55 25)

27-03: 76-a Universala Kongreso de Esperanto, Bergen, Norvegio (76-a UK, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando)



1825: Komploto. E. Dobrovolskij, Yu. Makarov. El la rusa trad. E. Ševčenko, L. Novikova. Moskvo: Progreso, 1989. 160p. ISBN 50 1001 860 8. 24cm. Ilustris V. Alekseev. Bildlibro pri la "decembriŝtoj", kiuj provis reformi la caran Rusion. 9,00 gld.

Akademaj studoj 1988-1990. Red. R. Eichholz. Bailieboro: Esperanto Press, 1990. 560p. ISBN 09 1916 637 8. 21cm. Pli ol kvindek recenzoj, komunikaĵoj kaj eseoj pri lingvaj temoj: plej ofte pri aspektoj de terminologio, inkluzive de landonomoj, biologio, kemio, kaj diversaj ĝeneralaj principoj. 33,00 gld.

Almanako Lorenz 1990. Div. aŭtoroj. Petrópolis: Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz, 1990. 138p. 20cm. Fotoj. Artikoloj, rakontoj k.s. pri spiritismo kaj aliaj religiaj kaj filozofiaj temoj. 9,00 gld.

Amuzaj karikaturaj. Komp. kaj ilus. Peng Guoliang. El la ĉina trad. Dai Song-en. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1990. 18p. ISBN 75 0520 054 0. 20cm. Disney-ecaj rakontetoj. 2,10 gld.

Ĉina antologio (1949-1979). Div. aŭtoroj kaj tradukintoj, komp. Zhao Musing. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1989. 418p. ISBN 75 0520 040 2. 22cm. Bind. Kvardeko da noveloj, eseoj kaj poemoj montras, laŭ la enkonduko, "ke la ĉina nacio iris vojon suferegan kaj severan en strebado al modernigo de la lando kaj liberigo de spirito." Kun zorgaj notoj kaj biografietoj. 21,00 gld.

Debato pri la "Praga Skolo". Eli Urbanová, Giorgio Silfer k.a. Svislando: LF-Koop, 1989. 59p. 21cm. Plurflanka diskuto pri la uzado de neologismoj/nekomunizaj vortoj en beletro. 24,00 gld.

Dekdu noktoj de Satano, La. Emiano Imby (ps. de K. Kalocsay). Prilly: Kooperativo de Literatura Foiro, 1990. 130p. ISBN 39 0659 01 3. 21cm. Poemciklo "naŭzige erotika kaj ofende blasfema" laŭ iuj, samtempe karakterizata de perfekta kaloĉaja lingvoriĉo. Malpli ŝokan, pli idilian etoson prezentas la ligita prozaĵo *La dektria nokto*. 49,90 gld.


Dioj de Izraelo, La. La vera naturo de la Biblia dio. André Cherpillod. Courgenard: la aŭtoro, 1990. 24p. ISBN 29 0613 413 9. 21cm. Argumento surbaze de la originala hebrea teksto, ke la Malnova Testamento parolas pri "kosmonaŭtoj de ekstertera deveno". 6,30 gld.

Divenu, kion mi faras! Matsuoka Kyôko k.a. Ilustris pli ol kvindek artistoj. Esperantigis Izumi Yokio. Tokio: Libroteko Tokio, 1990. 48p. 21x30cm. Belega bildlibro por infanoj, eldonita okaze de Internacia Alfabetiga Jaro. Oni renkontas dek unu geknabojn el diversaj mondopartoj. 24,00 gld.

Enkonduko al problemsolva originala KJ-metodo. Kawakita Jiro. El la japana trad. Yosimi Umeda k.a. Tokyo: Japana Esperanto-Instituto, 1989. 48p. 21cm. Skizo pri ĝenerale aplikebla metodologio por iri de unuopaj observaĵoj ĝis fruktodona teorio. 8,50 gld.

Esperanto: Língua sem fronteiras. Método de aprendizagem. Alves de Moura. Lisboa: O Livro, 1989. 56p. 21cm. Konkiza portugallingva lernolibro. 8,40 gld.

Gustumu vinojn! Kiel oni parolas pri vinoj. Saint Aubin de Luigne: Les Nids, 1990. 16p. 21cm. Paralelaj franca kaj Esperanta terminaretoj, kun kelkaj konsiloj por vingustumantoj. 3,30 gld.



Internacie kuiri. Red. Maria Becker-Meisberger. Antwerpen: Flandra Esperanto-Ligo, 1990 (neindikita). 186p. ISBN 90 7120 534 7. 21cm. Ilus. de Hugo Fontyn. Plej diversaj receptoj proponitaj de la legantoj de *Monato*, elprovitaj kaj sistemitaj de la redaktinto. 30,90 gld.

Interveno ĉe la generado. Etika vidpunkto. G.M.W.R. de Wert. El la nederlanda trad. Gerrit Berveling. Breda: Voĉoj Kristanaj 20, 1990. 28p. 21cm. Klera prezento de la komplekso de etikaj demandoj rilate al koncipoj kaj nasko. 4,80 gld.

Lajos Tárkony kaj la Budapeŝta Skolo. István Ertl. Vieno: Pro Esperanto, 1990. 47p. 30cm. Detale referencita studo pri la "triplej grava figuro de la budapeŝta skolo", dediĉita precipe al analizo de liaj poemoj. Kun bibliografio kaj aldona studeto de Vatré. 24,30 gld.

Maria kaj la grupo (1936). Emba (ps. de Imre Baranyai, 1902-1961). Vieno: Pro Esperanto, 1990 (2-a eld.). 180p. 21cm. La unua kaj ĝis nun la sola romano, kiu pritemas

ekskluzive la vivon de Esperanto-klubo. Foja sukereco tamen ne malhelpas la disvolviĝon de interesa intrigo kun multaj amuzaj scenoj. 25,50 gld.

Pekinaj vidindaĵoj. El la ĉina trad. Mollum. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1989. 144p. ISBN 75 0520 044 5. 26cm. Multaj koloraj fotoj kun mapo kaj mallongaj klarigoj. 36,00 gld.

Profilo de Zhou Enlai. Percy Jucheng Fang, Lucy Guinong, J. Fang. El la angla trad. Wang Chongfang. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1989. 36+254p. ISBN 75 0520 038 0. 20cm. Populara, facilflua biografio pri la ĉefministro de Ĉinio inter 1959 kaj 1976, elstariganta la politikan disvolviĝon de la Popola Respubliko. Kun 36 paĝoj de fotoj. 18,00 gld.

Vortoj de Profesoro Th. Cart (1927). Vieno: Pro Esperanto, 1990 (represo). 140p. 21cm. Elegantaj eseetoj pri lingvaj kaj aliaj temoj, de unu el la plej influaj intelektuloj de la frua movado. 21,00 gld.

Zamenhofa radikfarado, La. André Cherpillod. Courgenard: la aŭtoro, 1990. 32p. ISBN 29 0613 411 2. 21cm. Analizo de la manieroj, laŭ kiuj Zamenhof transskribis etnalingvajn fonemojn por konstrui la bazan Esperantan vortprovizon – kvazaŭ eta etimologia konkordanco. 8,10 gld.

DIVERSAĴOJ

Disketo: Amplifiki + La Rozmariaj Beboj. Donneville: Vinilkosmo, 1989. 18cm, 45t/m. Kvar rok-kantoj; kun tekstfolio. 12,00 gld.

Filatelaĵo Bulgario: Poŝtmarko 100 jarojn Esperanto-movado en Bulgario. 1989. 3,00 gld.


Insigno Eroŝenko. 3x3cm. 1990. Bronzkolora reliefo de la kapo de Eroŝenko, kun liaj nomo kaj vivodatoj. 3,00 gld.

Kasedo: Saskia Veen kaj Edward Hoepelman. Tilburg: Kordo, 1990. Konataj harpisto kaj tenoro prezentas kantojn de Fauré, Debussy, Duparc, Strauss kaj Britten; kun tekstfolio. 24,00 gld.

NEJ-kalendaro 1991. Nederlanda Esperanto-Junularo, 1990. 54p. 21cm. Ŝirkalendaro (po unu paĝo por semajno), ilustrita per datrevenoj, proverboj, ŝercoj kaj aliaj interesaĵoj. 9,00 gld.

Ŝlosilringo kun monero 75-a UK, 1990. Kupronikela unupesa monero emisiita honore al la 75-a UK en Havano, muntita en ĉeno kun ŝlosilringo. 12,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18,5% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!



Pacaj batalantoj

Ni ĵus legis, ke s-ano Fidel Castro asertis sin "soldato de Esperanto". Ni ne tiom famas kiel li, sed ni ŝatus sciigi, ke ni restas, espereble kun la plejparto de l' esperantistaro, *civiluloj* de Esperanto.

István Ertl (Hungario), Cynthia Libby (Usono), Ionel Onet (Rumanio)

La belo de (ne-)Ruslando

Mi miris pri la foto de Bjalistoko (junio, p. 127): "litovaj kaj *rusaj* landlimoj"? Rigardu atlasojn! Eĉ angloj estas pli bone informitaj: la revuo *Granta* (n-ro 30) ĵus aperis kun bonega artikolo pri *belorusoj* tie. Eble la problemo kuŝas iom ĉe Zamenhof, kiu ne rimarkis belorusojn ĉirkaŭe: renaskiĝo de ilia nacia konscio venis nur iom post liaj jaroj tie.

Kris Long (Britio)

Sensolve

Bonega ideo aperigi mozaikon de artikoloj pri la movadaj problemoj post la gravaj politikaj ŝanĝoj okazintaj en orienta Eŭropo. [Sed] nekomprenebla estas la prezento pri la situacio en Jugoslavio, kiu komenciĝas per la bruta ofendo direktita al ĉiuj gvidantoj de la societoj, titoli ilin "mediokruloj". Jes, ili ĉiuj estas simplaj homoj, por societaj funkcioj tre malfacile troveblaj, ĉar ĉiam pli kaj pli malmultaj homoj volas foruzi sian liberan tempon por ia societa laboro. Ĉie en la movado same. . . .

Ĉu en aliaj sferoj de la homa vivo regas geniuloj? Ĉu en politiko? Eĉ ne unu tago post 1945 estis sen milito en iu mondoparto. Ĉu en ekonomio? Tri kvaronojn de la homaro strangolas la ekonomia krizo, miloj da homoj ĉiutage mortas pro malsato. Ĉu en profesiaj Esperantaj organizaĵoj? La zagreba Internacia Kultura Servo ekzistas pli ol 20 jarojn . . . [sed ankoraŭ] solas sur la jugoslavia "mediokra" Esperanta scenejo. IKS dum ĉiuj siaj ekzistojaroj vivis de subvencioj, kiuj ebligis ĝian eldonan aktivadon kaj organizon de PIF-oj, cetere nun reduktitaj al nur parte Esperantaj. Librojn eldonas pluraj aliaj Esperantaj organizaĵoj en Jugoslavio, kiuj ankaŭ organizas kongresojn kaj internaciajn renkontiĝojn, kvankam nur per helpo de "mediokraj" neprofesiaj funkciuloj.

Jes, en Jugoslavio la movado stagnas. La ekzisto de IKS neniom helpas mildigi tion. Neniu iam montris reziston turni sin al la merkata monhavigo, sed

mankas scio kiel tion fari en cirkonstancoj tre malfavoraj ne nur por la Esperanto-movado. . . . [Jen] la demando al kiu la profesia esperantisto Zlatko Tišljar ne respondis, kvankam apartenanta al la genia homspeco.

Emilija Lapenna (Jugoslavio)

Reakciaj konkludoj

Kun aprobo mi legis la verajn se tabuajn vortojn de Zlatko Tišljar, ke la supozeble humanisma, pacama Esperanto-movado estas fakte "alloga komunumeto, en kiu la mediokruloj . . . povis trovi bonegan kuŝejon por kontentigi siajn tropufitajn ambiciojn. . . . Interne la movadon firme kuntenis hierarkia piramido de malkapablulkratio (en lokaj kluboj diktatoris plej ofte mediokruloj kun senfinaj mandatoj, ili elektis el inter si mediokrulojn por la landaj asocioj kaj tiel plu)." Dum momento mi pensis, ke Tišljar iam loĝis en Usono, ĉar lia takso trafis la esencon de la usona Esperanto-movado!

"Mi esperas ke UEA ne kompromitos sin per tendenca promociado de la novaj oportunistoj."

Sed – kia surprizo! – li tuj asertas: "En okcidentaj landoj tian movadeton neniu subtenas." Pardonu, kara adoranto de la kapitalisma merkato, sed vi estas naiva! Se movadon sen ekonomia utilo aŭ politika karaktero, kiu similas al "eta religia sekto", subtenas [nur] privataj subvencioj, kiuspeca movado tiu devas esti, aparte se la plej mediokraj homoj estas riĉuloj, kiuj ne havas ion seriozan por fari per sia libertempo kaj kiuj fincas, do regas, la movadon?

Ne nur la komand-ekonomio, sed ankaŭ la merkato estas speco de tiraneco. En Usono, kie la merkato moŝtas, regas eĉ pli mediokreco, ankaŭ en la Esperanto-movado, ol vi orienteŭropanoj povas imagi. Oni serioze esploru, kiel ekz. la (libro)merkato de Esperantujo bremsas la kvalitojn de nia intelekta kulturo kaj instigas sektulojn, mediokrulojn, religiajn fanatikulojn kaj ceterajn strangulojn.

Maltrankviligas min la ekstremaj denuncoj de T. Tybłewski kontraŭ Kubo kaj ĉiuspeca marksismo. Tybłewski deziras la baldaŭan neniigon de socialismo en Kubo, sed ĉu li komprenas la danĝeron kiu minacas Kubon de la usona registaro, kiu ankoraŭ malrespektas la suverenecon de Kubo, kiu ankoraŭ malpermesas ke usonanoj vizitu Kubon? . . . Mi ja komprenas la koleron de orienteŭropanoj kontraŭ la stalinisma sistemo, sed mi ne povas akcepti la reakciajn socipolitikajn konkludojn de Tišljar kaj Tybłewski. La naiveco de ilia mondbildo sugestas, ke kapitalismemaj orienteŭropanoj estas eĉ pli mediokraj ol la stalinistoj! Mi esperas ke UEA ne kompromitos sin per tendenca promociado de la novaj oportunistoj.

Ralph Dumain (Usono)

Ankoraŭ kelkaj . . .

Finfine numeroj 1014-1015 de *Esperanto* donis ŝancon al esperantistoj esprimi siajn suferojn kaj tiujn de samsortuloj. Mi legis kelkajn konfesojn kun profunda emocio. Sed mi ne forgesas, ke ankoraŭ estas landoj en kiuj esperantistoj ne rajtas publike esprimi tion, kion ili profunde pensas – i.a. landoj kie ni kongresis.

Louise Marin (Francio)

Demokrataj denuncoj

Olga Kerzjuk priploras la fiagadon de esperantistoj, kiuj insultas, kalumnias kaj denuncas aliajn esperantistojn (junia numero, p. 109-111). Ŝi, same kiel Lins, pritraktas persekutadon kontraŭ esperantistoj en reakciaj kaj totalismaj landoj en Eŭropo kaj Azio. Tamen, ni ne forgesu, ke simila agado, malpli grandskale, okazis ankaŭ en lokoj, kie la registaroj nomas sin demokrataj. . . .

Grava ĉapitro en tiu historio [koncernas] eventojn en la usona provinco de Esperantujo en la jardeko post la dua mondmilito, kiam regis en la interna politiko la makartiismo. La tiutempa ĉefmotoro de la agado kontraŭ komunisma influo estis G. A. Connor, la ĝenerala sekretario de Esperanto-Asocio de Norda Ameriko (EANA), kiu en 1956 estis eksigita el UEA. Poste EANA mem eksigis. Connor kaj kelkaj aliaj membroj de EANA en la kvindekaj jaroj organizis kampanjon de kalumniado kaj denuncado, kiu ne limiĝis al Usono sed atingis la sekretan policon de aliaj landoj.

Tiutempe mi frekventis kunvenojn de la novjorka Esperanto-klubo kaj aŭdis el la buŝoj de la denuncitoj la malkuraĝigajn faktojn pri atakoj kontraŭ esperantistoj fare de aliaj esperantistoj. Ekzemple, la mondfama

aktivulo de SAT, Ralph Bonesper el Hungario, ne estante usona civitano, estis minacata de deportado pro la denunco kontraŭ li, kiun la registaro ricevis de Connor.

Connor jam mortis, sed povas esti, ke li postlasis dokumentojn, kiuj havas historian valoron. Eble usonaj esperantistoj en la ŝtato Oregono povas informi pri tio. Laŭ *Esperanto en perspektivo*, abunda dokumenta materialo pri la kampanjo de Connor troviĝas en la arkivo de CED kaj en la protokoloj kaj aliaj dokumentoj de UEA el tiu periodo. . . . Mi ne scias, kiom da partoprenintoj ankoraŭ vivas, kiuj povas, en ĉi tiu periodo de *glasnost*, malkaŝi la verdajn krimojn de la pasinteco.

Bernard Golden (Hungario)

Kelkaj korektoj

Mi trovis du korektendaĵojn en lastaj numeroj de via ŝatata revuo *Esperanto*:

Akiko Ŭusink-Nagata (feb.) estis 29-jara kaj laboris kiel oficistino en la universitato de Hokkaido, sed ne mezlerneano, kiam ŝi gajnis la unuan premion en japana, ne monda eseokonkurso verkinte pri la armeo de UN, kiun organizis la japana filio de la movado por "Monda Federacio".

Eroŝenko (mar.) verkis unue en la japana lingvo, kaj iom poste en Esperanto. Li verkis malmultajn rakontojn en la rusa lingvo (nekonatajn ekster Rusio), dum la japanlingvaj rakontoj estas tradukitaj en la ĉinan lingvon fare de Lusin kaj aliaj liaj ĉinaj amikoj, kaj ankaŭ en Esperanton fare de Miyamoto Masao kaj aliaj. Cetere, li nenion verkis en la ĉina lingvo. Li vivis en Ĉinio nur inter tiuj, kiuj parolis aŭ la japanan aŭ Esperanton.

Mine Yositaka (Japanio)

Sur paĝo 134 de la junia numero troviĝas ĝena eraro. Sur la bildo kun la subskribo "La eldonado de SAT iom viglas" vidiĝas la libro *Sennaciece tra nia mondo* de G. R. Ledon. Tamen tiu libro ne estas eldonaĵo de SAT, kontraŭe SAT rifuzis ĝin eldoni!

Rejna de Jong (Nederlando)

Ĉe la recenzo pri la romano *Adolesko* (aprilo, p. 76) vi notis, ke ĝin eldonis Hungara Esperanto-Asocio. Fakte ĝin eldonis kunlabore kaj HEA kaj Mendoservo. Tion vi povas tutfacile legi ankaŭ en la libro mem. Via misinformo kaŭzas al ni ekonomiajn perdojn, ĉar la libroservoj, sen plia cerbumado, direktas siajn pograndaĵmendojn al HEA – eĉ en tia okazo, ke ili samtempe sendas mendilon de aliaj libroj al Mendoservo.

Lasse Kivistö (Finnlando)

Membrokampanjo:

Anojn plej sukcese varbas . . . anoj!

Pasis nun unu jaro ekde la lanĉo de la membrokampanjo de UEA (*Esperanto* 1989, p. 178-9). Taŭga okazo por raportoj pri ĝi kaj rekonsideri ĝian strategion.

Unue, kion ni faris? Pere de la Centra Oficejo, UEA kaj TEJO presis kaj dissendis milojn da varbiloj pri sia strukturo kaj agado. Pluraj naciaj kaj internaciaj kongresoj disdonis ilin inter siaj partoprenantoj. Ni faris specialan oferton al la esperantistoj en Germana DR okaze de la konvertebligo de ties valuto, kaj aparte klopodis por ligi la renaskitan movadon en Rumanio kun UEA per donacitaj membrecoj. Estraranoj persone leteris al siaj samlandanoj. Unuopuloj en diversaj landoj grave kontribuis; aparte menciindas la atingoj de esperantistoj en Itabuna, Brazilo, kie kvar homoj sukcesis triobligi la lokan membraron.

Nova postmilita rekordo?

La rezultoj por la unua jaro ankoraŭ ne estas definitivaj, sed la tendenco jam klaras. La kampanjo portis pozitivan efikon, eĉ se ne tiugrade kiel ni esperis. UEA gajnis inter 200 kaj 300 membrojn kompare kun la antaŭa jaro, precipe en la kategorio Membro-Abonanto. Kun iom da helpo – *via helpo!* – ni povos ankoraŭ superi la postmilitan rekordon de 7542 individuaj membroj, establitan en 1957. Tio estos signifa atingo!


Sed la respondo tamen multe postlamentas nian celon de plia milo. Estas interese konstati, ke en 1966 UEA lanĉis

similan kampanjon kun similaj rezultoj. Tre pensiga estas ankaŭ la fakto, ke la tuta gajno forfalis la sekvan jaron kiam oni altigis la kotizojn. Evidente ni devos zorgi ne nur pri la varbado de novaj anoj, sed ankaŭ pri ilia kontentigo. Ambaŭrilate povus gvidi nin rerigardo al la postmilita evoluo de la UEA-membraro, montrita en la akompanaj grafikaĵoj, kompilitaj el duona jarcento da membrostatistikoj.

De kvarono ĝis kvinono

Rimarku unue la kreskon de aligitaj membroj post 1980 – t.e. anoj de la aliĝintaj landaj asocioj, kiuj pagas por ili po 2 procentojn de individua UEA-kotizo. Tiu kresko signifas, ke en la pasinta jardeko UEA fariĝis multe pli universala, sed tamen ne sukcesis allogi proporcian nombron de individuaj membroj. Tra la periodo 1960-1980, individuaj membroj nombris ĉ. kvaronon de la aligitaj; nun ili nombras nur kvinonon. Principe, do, kaj eĉ post konsidero de valutaj kaj aliaj malhelpoj, ekzistas nun pli granda rezervo de aktivaj esperantistoj en la aliĝintaj asocioj, kiujn ni povus varbi por individua membreco.

La statistiko montras duan tendencon, iom surprizan. La kresko en la individua membraro, kiu iom post iom riparas la damaĝon kaŭzitan de la gvidkonfliktoj en 1973-74, okazas preskaŭ sendepende de la revuo *Esperanto*, kies abonantaro restas ĉ. kvin mil jam de 1975. Se paroli denove pri proporcioj, en la sesdekaj jaroj pli ol 85% de la individuaj membroj estis abonantoj, nun temas pri malpli ol 65%. Sen tro ideumi pri la kialoj de tio, eblas konkludi ke la revuo povus profiti el pli vasta reklamado; efektive, se ni volos atingi ok, naŭ, dek mil membrojn, ĝi nepre devos



allogi pli grandan publikon. Tiurilate indas ankaŭ esplori la demandon, kiel bone la revuo respondas al la postuloj de la Esperanta merkato.

Membroj pere de membroj

La revuo, la Jarlibro kaj la nova, furore sukcesa librokatalogo estas servoj, la plej videblaj kaj allogaj varbiloj por UEA. Sed laŭ profesiaj esploroj pri membriĝo en asocioj, gravan rolon por allogi membrojn ludas aliaj aferoj krom servoj: la kontaktoj kun aliaj membroj, la ŝanco mem kontribui al la asocio kaj – simple sed nemalhaveble – la ricevo de invito por aliĝi.

Tiurilate UEA malpli bone fartas. La problemoj de izoliteco estas parte solvendaj per organizaj ŝanĝoj en UEA mem: pri tio alifoje. Sed grandan kontribuon povas jam nun fari niaj membroj. Esperantistoj en Berlino organizis lokan renkontiĝon de UEA-membroj antaŭ la lastaj elektoj, kun granda sukceso: la partoprenantoj ĝojis pro la ŝanco kundiskuti la farojn kaj planojn de la asocio kaj la meritojn de la kandidatoj. Similajn kunvenojn organizis ankaŭ la brazila ĉefdelegito antaŭ du-tri jaroj. Kial ne aranĝi ion tian en via regiono? Diversaj temoj proponas sin: la Strategia Plano (senpage havebla de la CO), la jarraporto, la aspekto kaj enhavo de la revuo kaj Jarlibro, la organizo de la Universalaj Kongresoj ... Sed ankaŭ, nepre: la bezono de novaj membroj. Iu ajn, kiu rigardis la spezokonton de la Asocio, devas konstati la urĝecon de tiu demando.

Se ĉiu membro de UEA parolus regule al siaj esperantistaj konatoj pri sia membreco, tio jam plifortigus la asocion. Ne bezonas eĉ temi pri varbado! Sufiĉas diskuti novaĵojn el la revuo, menciinformojn el la Jarlibro aŭ librokatalogo, por altigi la konscion ke UEA ekzistas, agas kaj dependas de siaj membroj por sia ekzisto. Kompreneble, por homoj jam aktivaj kaj interesitaj, plej efika estas rekta invito: "Kial vi ne faru kiel mi?" Finfine, sen tia helpo de niaj membroj, neniun membrokampanjo povus kontakti kaj konvinki du aŭ tri mil homojn.

Pasis nur unu jaro. Dum la venonta jaro ni daŭrigos la kampanjon. Ni elprovos novajn metodojn, produktos novajn materialojn kaj espereble denove plibonigos niajn servojn. Sed granda parto de la sukceso dependos de vi. Ni fidas, ke per via helpo ni povos atingi la ciferon de dek mil membroj, se ne post du jaroj, tiam kelkan tempon pli malproksime. Sed ni restu ĉe la realigeblo kaj realigindo de tiu celo.

Mark Fettes

KOTIZTABELO DE UEA POR 1991

Lando/valuto	MG	MJ(-K)	MA(-K)	SA	Kto	SZ
Argentino/guldeno	7	17	42	25	13	84
Aŭstralio/dolaro	9	21	52	31	16	104
Aŭstrio/ŝilingo	75	185	465	280	140	930
Belgio/franko	225	560	1400	840	420	2800
Brazilo/guldeno	7	17	42	25	13	84
Britio/pundo	4	9	22	13	7	44
Bulgario/guldeno	9	21	52	31	16	104
Ĉeĥoslovakio/krono	45	110	275	165	85	550
Danlando/krono	45	110	265	155	80	530
Finnlando/marko	27	65	165	100	50	330
Francio/franko	40	90	225	135	70	450
FR Germanio/marko	12	29	72	43	22	144
FRG (eksa GDR)/marko*	9	22	54	32	16	108
Greklando/drahmo	640	1600	4000	2400	1200	8000
Hinda Unio/rupio	32	80	200	120	60	400
Hispanio/peseto	550	1380	3450	2070	1040	6900
Hungario/forinto	290	720	1800	1080	540	3600
Irlando/pundo	4	8	20	12	6	40
Islando/guldeno	13	31	77	46	23	154
Israelo/guldeno	10	25	63	38	19	126
Italio/liro	7500	18 500	46 000	27 500	14 000	92 000
Japanio/eno	960	2400	6000	3600	1800	12 000
Jugoslavio/guldeno	7	17	42	25	13	84
Kanado/dolaro	8	18	45	27	14	90
Korea Resp./guldeno	10	25	63	38	19	126
Nederlando/guldeno	13	31	77	48,75**	24,40**	154
Norvegio/krono	40	100	250	150	75	500
Nov-Zelando/dolaro	11	26	65	39	20	130
Pollando/guldeno	7	17	42	25	13	84
Portugalio/eskudo	590	1480	3700	2220	1110	7400
Soveta Unio/guldeno	10	23	59	36	18	118
Sud-Afriko/guldeno	12	29	72	43	22	144
Svedio/krono	40	100	250	150	75	500
Svislando/franko	11	27	66	39	20	132
Usono/dolaro	7	16	39	23	12	78
TARIFO A / guldeno	8	20	50	30	15	100
TARIFO B / guldeno	7	17	42	25	13	84

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio; San-Marino laŭ Italio.

TARIFO A: Honkongo, Kuvajto, Malajzio, Malto, Singapuro, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

Por ĉiu validas la nuna loĝlando. Ĉiuj kotizoj supre menciitaj validas por la kalendara jaro.

* Pro la neegala ekonomia situacio en unuiĝinta Germanio, UEA ankoraŭ dum 1991 proponas pli malaltajn kotizojn al la eks-GDR-anoj.

** inkluzivas la enlandan imposton de 6%.

- MG:** Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado
- MJ(-K):** Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo *Kontakto* sen plia abonpago)
- MA(-K):** Individua Membro-Abonanto: kiel MJ(-K) plus la revuo *Esperanto*
- DM:** Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon *Kontakto*.
- SA:** Simpla abono al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA
- Kto:** Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en UEA/TEJO
- SZ:** Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA)
- PT:** Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-K) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon *Kontakto* kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO.



Aŭstrio:

Hungaraj lernejoj kunbiciklas

Praktikan helpon al la (deviga) instruado de Esperanto en hungara mezlernejo Thuri György, Várpalota, provizis en junio Aŭstria E-Junularo. Laŭ favoraj kondiĉoj, grupo de 15-jaraj hungaroj povis partopreni en internacia tritaga biciklado apud Danubo. Tio cetere estas la unua vivosigno de la aŭstria junulara movado en pluraj jaroj.

Baltio: Forlaso de la tendoj

Pli ol 400 homoj aliĝis al la 27-a Baltia E-Kongreso, kiun organizis Latvia E-Asocio en la agrikultura akademio de Jelgava. Inter la 10-a kaj 19-a de julio okazis kursoj, somera universitato, movadaj prelegoj, latva, litova kaj estona vesperoj ktp. La nomŝanĝo de la ĝisnunaj Baltiaj E-Tendaroj spegulas, laŭ la organizantoj, "pliserioziĝon" de la baltia movado.

Bharato: Viglo en Bangaloro

Post sia sukcesa inaŭgura kurso, kie instruis Joachim Werdin (*Esperanto* 1989, p. 85), Bangalora Esperanto-Centro organizis gazetaran kampanjon kaj korespondan kurson, kiun finis jam 115 homoj el diversaj urboj en suda Bharato. D-ro P. V. Ranganayakulu, el Tirupati, poste gvidis dektagajn parolajn kursojn por 75 lernantoj. Oni taksas, ke pliaj centoj da homoj atendas la haveblon de koresponda kurso en la angla (la ĝisnunaj kursoj uzis la kannadan lingvon).

Bangalora E-Centro, p/a S.S. Pradhan, 97, III Block E., Jayanagar, Bangalore 560 001.

Ĉinio: Tria junulara ligo

En la provinco Anhui, okcidente de Ŝanhajo, fondiĝis la tria provinca E-junulara asocio en Ĉinio. Anhuja Junulara E-Ligo membras en la provinca federacio de junularaj organizaĵoj kaj kunlaboras kun Anhuja Ekstera Komerca Turismo-Firmao. Ĝi proponas turisman servon al vizitantoj esperantistoj kaj deziras kunlabori kun similcelaj grupoj.

AJEL, p/a Wang Xigen, Shitai-xian, Ren-shi-ju, Anhui.

Germanio: Liberty aŭ libereco?

Junulara politika grupo en Paderborn, FRG, antaŭnelonge lanĉis lernejan revueton sub la nomo *Liberty* (la angla vorto por "libereco"). Protesto

de prof. Helmar Frank, el la Instituto por Kibernetiko, tamen konvinkis ilin, ke pli konvenas la Esperanta vorto por esprimi liberecon ankaŭ de lingva kaj kultura altrudiĝo. Jam de la dua numero la revuo portas la titolon *Libereco*.

Hispanio: Kulturplena jubileo

En la 50-a Hispana E-Kongreso, 11-16 julio en Sant Cugat del Valles, partoprenis 240 kongresanoj. Inter pli ol 20 prelegoj kaj kunvenoj elstaris la prezento de Miguel Fernández pri García Lorca, la koncerto de Melle Ludmila kaj Joan Manau, kaj omaĝoj al pioniroj Petro Nuez kaj Fernández Jurado. La kongreson patronis la prezidanto de la kataluna parlamento, Jordi Pujol.

Israelo: Kursoj (re)viviĝas

Laŭ iniciato de E-Ligo Israela, la grava teknika altlernejo en Haifa reenkondukis E-kurson en la fakon de ĝeneralaj studoj. Instruos s-ino Anat Zajdman, kiu antaŭ deko da jaroj gvidis dujaran kurson en la sama institucio. En la kibuco Sde-Elijahu, klaso de sesdek lernantoj faris projekton pri Esperanto kaj, entuziasmiĝinte, aliĝis al la koresponda kurso de ELI.

Japanio: Kaŝtanklasanoj

En Gubernia Altlernejo Tondabajaŝi, Osako, la Klaso 2-C decidis unuanime uzi sport-ĉemizon kun la Esperanta vorto "Kaŝtan-Monto". Tiu vorto estas traduko de la familia nomo de ilia ĉef-instruisto Kurijama.

Jugoslavio:

Kvin landoj ĉe Adriatiko

La 2-a junulara renkontiĝo de Alpoj-Adrio, de la 11-a ĝis la 17-a de julio, allogis kvindek da partoprenantoj el Italio, Hungario, Jugoslavio, Germanio kaj Nederlando al la malgranda ĉemara urbeto Fažana (Kroatio). Oni traktis la temon "Ekologio", diskutis pri regiona kunlaboro kaj pasigis multan tempon sur la plaĝo. Ok homoj trapasis la Internaciajn Ekzamenojn de ILEI/UEA, kadre de ties unua sesio en orienta Eŭropo. La organizantoj intencas fari la Ekzamenojn konstanta ero de la ERA-AROJ.

Kubo: Plentempa E-eldonisto


De la 1-a de aŭgusto, la ŝtata fremdlingva eldonejo José Martí havas plentempan deĵoranton pri eldonado en Esperanto. Orlando Raola petas kunlaboron de librofakuloj el ĉiuj landoj por "transformi la E-fakon en aŭtentikan E-kulturejon".

Eldonejo José Martí, Esperanto-fako, Calzada 259 I/kaj J, Vedado, C-10400 La Habana.



Vjetnamio: Hoĉiminanoj en Hanojo

La 24-an de junio, Hanoja E-Klubo organizis renkontiĝon por pli ol 80 esperantistoj el la vjetnama ĉefurbo, ĉe kiu gastis ankaŭ kvar aktivuloj el fora Ho Chi Minh-urbo (foto). En la renkontiĝo partoprenis i.a. esperantistoj-oficistoj de Hanoja Turisma Asocio (malferminta Esperanto-fakon) kaj formiĝis laborgrupoj pri medicino, fervojo, junularo kaj instruado. Urbaj ĵurnaloj raportis pri la aranĝo. *Hanoja E-Klubo, 46 str. Trần Hưng Đạo, Hanoi.*



Ekologio: Ankaŭ TEJO estis en Bergen

Anna Ritamäki (Finnlando) reprezentis TEJO-n en eŭropa junulara konferenco pri ekologio, prepare al la konferenco de la mediprotektaj ministroj de Eŭropo kiu okazis maje en Bergen, Norvegio. TEJO kaj la aliaj organizaĵoj akceptis du deklarojn pri ekologio en sia propra agado kaj en Eŭropo.

Komerco: Esperanto ĉe Siemens

En la 5-a numero 1990 de *Siemens Mitteilungen*, la interna informrevuo de la grandega germana elektronika firmao, aperis artikolo pri la vizito de kvarpersona ĉina delegacio el Shen-zhen. Ĉiuj intertraktoj, kiujn gvidis Du Shou He ĉe la ĉina flanko kaj Rudolf Koppel ĉe la germana, okazis en Esperanto.

Konstruado: Por komuna E-domo

Michel Basso, direktoro de entrepreno pri konstruado, lanĉis novan fakan asocion por konstruistoj. Krom faciligi la kontaktojn inter masonistoj, ĉarpentistoj, tegmentistoj, gipsistoj, lignaĵistoj, elektristoj, kahelistoj, farbistoj, entreprenistoj, teknikistoj, arkitektoj, inĝenieroj, urbanistoj ktp tra la mondo, la asocio celas: ellabori ilustritan plurlingvan terminaron, organizi fakajn staĝojn, disvastigi informojn pri novaj teknikoj, stimuli komercan kaj trejnan interŝanĝon pere de Esperanto. Sendu jam nun artikolojn por la unua numero de *La esperantistaj konstruistoj*.

Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj (TAKE), rue de Lucchina – Doumer, F-68 920 Wintzenheim, Francio.

Lingvistiko: Ŝancoj por interlingvistoj

La 1-a *Language International*-Konferenco okazos inter la 31-a de majo kaj 2-a de junio, 1991, en Helsingör, Danio. Oni invitas proponojn de 30-minutaj prelegoj pri tradukado kaj rilataj temoj. Sendu titolon kaj unupaĝan resumon al prof. Cay Dollerup, Centre for Translation Studies and Lexicography, University of Copenhagen, Njalsgade 80, DK-2300 Kopenhago S.

Speciala numero de la revuo de la Unuiĝo de Internaciaj Asocioj estos dediĉita al internacia lingva komunikado en la praktiko. Oni invitas artikolojn, aparte tiujn, kiuj koncernas internaciajn asociojn, informretojn k.s. La artikoloj estu angla- aŭ franclingvaj, kaj ampleksu inter 10 kaj 30 paĝojn. Sendu du ekzemplerojn al Paul Ghils, Editor, Transnational Associations, UAI, Rue Washington 40, B-1050 Bruselo, Belgio, antaŭ la fino de oktobro.

Mondanismo:

Prelegontoj serĉataj

La Instituto de Mondanismaj Studoj en Tours, Francio, organizos de la 20-a ĝis la 28-a de julio 1991 sian 13-an sesion pri la temo "Eŭropo de la civitanoj". Ĝi serĉas homojn kapablajn prelegi Esperante je universitata nivelo pri jenaj aspektoj de la temo: kulturoj, popoloj, ekonomio, sindikatoj, homaj rajtoj, asocioj, federigo, kresko de EK, Eŭropo en la mondo kaj el la vidpunkto de aliaj kontinentoj. Vojaĝkostoj kaj restado estas pagotaj de la organizo. *IMS, Isabelle Hannequart, 65 rue du Commerce, F-37000 Tours.*

Regionaj informiloj: Ĉu kunlabori?

Esperanto-Ligo Berlin invitis du-dekon da aktivuloj pri loka kaj regiona

informado partopreni konferencon pri tiu temo dum la Berlina Arbara Renkontiĝo en septembro. Montriĝis, ke la kunlaboremo estas malgranda: nur unu invitito konfirmis partoprenon. ELB tamen lasas la inviton malferma por la sekvonta BARO en majo 1991.

Tradukado: Esperanto en monda kongreso

W. A. Verloren van Themaat (Nederlando), la tradukinto de *La infana raso* kaj aliaj verkoj en la nederlandan kaj kunredaktinto de *Nederlanda antologio*, prelegis kadre de la monda kongreso de tradukistoj en Beograd, Jugoslavio, 2-9 aŭgusto, pri la temo "Esperanto kiel literatura tradukilo".

Verkistoj: Auld nova EVA-prezidanto

Esperantlingva Verkista Asocio kunvenis en Havano kaj elektis novan estraron, tiel finante dujaran periodon de necerteco post la forpaso de Tibor Sekelj (prez.) kaj demisio de Ada Csiszár (sekr.). Prezidanto fariĝis William Auld, sekretario Willem Verloren van Themaat, vicprezidantoj Julius Balbin kaj Marjorie Boulton, kasisto Alec Venture. Gaston Waringhien estis unuanime elektita Honora Prezidanto.

Persone

Fettes: Pli sukcesa en la angla

Mark Fettes, la redaktoro de *Esperanto*, gajnis nur honoran mencion en la eseobranĉo de la ĉi-jaraj Belartaj Konkursoj, sed kompanse venkis en anglalingva esekurso por la Premio Maxwell – konkurso aŭspiciata de komunikil-barono Robert Maxwell. Lia eseo pri la temo "La eŭropa Babelo: al unu lingvo por Eŭropo?" estis unu el du, kiujn internacia ĵurio elektis el 14 konkursaĵoj. La premio konsistas el mil usonaj dolaroj kaj publikigo en la fakrevuo *History of European Ideas*.

Matte: Por minoritataj rajtoj

Intervjuo kun esperantisto Guy Matte aperis en la somera numero de *Langue et société/Language and Society*, organo de la Komisiito pri Oficialaj Lingvoj de Kanado. Matte estas prezidanto de la kanada Federacio de Franclingvanoj Ekster Kebekio, en kies kadro li aktivas por la protekto kaj progresigo de franclingvaj komunumoj en regionoj ĉefe anglalingvaj. En la intervjuo li esprimis optimismon pri la estonteco de du- aŭ plurlingveco en Kanado.

Kongresa komuniko 1

76-a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO,
Bergeno (Norvegio),
27-a julio – 3-a aŭgusto 1991

Konstanta adreso:
Nieuwe Binnenweg 176,
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Adreso de LKK:
76-a UK de Esperanto,
Boks 3160, Arstad,
N-5029 Bergen, Norvegio

Kongresejo: La kongresejo de la 76-a UK estos la moderna Grieg-halo, nomita laŭ la mondfama bergena komponisto E. Grieg, konata kiel okazejo de la Bergena Muzik-Festivalo. Oni uzos ankaŭ kelkajn malpli grandajn salonojn en la apuda muziklernejo kaj en la Studenta Centro.

Loĝado: Ekzistos vasta gamo de loĝeblecoj, laŭ ĉies gusto. Krom la lokoj en luksaj kaj mezkategoriaj hoteloj estos sufiĉe da lokoj en la studenta kaj junulara hoteloj (du-, tri-, kvar- kaj kvin-litaj ĉambroj) kaj du amasloĝejoj, kontraŭ favoraj prezoj. La Dua Bulteno, kiu aperos jarfine, alportos ĉiujn detalojn.

Ekskursoj: La programo de la kongresaj ekskursoj estos tia ke ĝi ebligas konatiĝon kun ĉiuj plej gravaj vidindaĵoj de la regiono: mirindaj fjordoj kaj la pitoreska montaro, historiaj kaj kulturaj vidindaĵoj.

Antaŭkongreso en Oslo: Norvega Esperantista Ligo organizas dutagan antaŭkongresan viziton al vidindaĵoj de la norvega ĉefurbo Oslo, 25-27 julio, kaj trajn-vojaĝon al Bergeno, tra la pitoreska norvega pejzaĝo.

Postkongresoj: Oni planas organizi postkongresajn ekskursojn en Norvegio (kvartagajn) kaj eventuale en Islando kaj Finnlando. Definitivajn informojn donos la Dua Bulteno.

Internacia Infana Kongreseto (IIK): Post paŭzo en Havano, la IIK okazos en Bergeno, en tre konvena ejo kaj sub la gvido de kompetentaj prizorgantoj. Aliĝo por unu infano kostos 300,00 ned. gld. Ĉiuj aliĝoj kaj informpetoj direktiĝu al la UEA-komisiito pri infanaj aferoj: Christopher Fettes, St. Columba's College, Rathfarnham, Dublin 16, Irlanda Respubliko.

Vidbendo: Vidbendo pri Bergeno en Esperanto estas havebla ĉe la adreso de la LKK kontraŭ 150 norvegaj kronoj (50 gld.), sendokostoj inkluzivitaj.

Invitleteroj: Oficialajn invitleterojn prizorgas nur la Centra Oficejo de UEA, ne la LKK en Bergeno.

Aliĝoj: Aliĝiloj kun pago estas sendendaj al landaj perantoj aŭ al la CO en Roterdamo. Nur norvegoj sendu siajn aliĝilojn al la LKK. Aliĝojn sen kotizpagoj oni ne traktas. Oni notu ke Membroj kun Gvidlibro ne rajtas je kotiz-rabato.

Senpaga aliĝo por gejunuloj: Laŭ la ŝanĝita kongresa regularo, gejunuloj ne pli ol 19-jaraj je la 1-a de januaro 1991 rajtas je senpaga aliĝo, senkonsidere ĉu ili aliĝas al la IJK aŭ ne. La junula kategorio en la aliĝilo koncernas gejunulojn, kiuj je la 1-a de januaro estos inter 19- kaj 29-jaraj.

Aliĝilo kaj Unua Bulteno: Aliĝiloj estas jam senditaj al ĉiuj individuaj membroj de UEA, kaj al ĉiuj perantoj kaj landaj asocioj. Baldaŭ dissendiĝos ankaŭ la Unua Bulteno akompanata de aliĝilo. En la Unua Bulteno troviĝas bazaj informoj pri la kongresaj urbo, lando kaj E-movado, kun pluraj aliaj utilaj informoj.

Kotizoj: Ĝis la fino de la jaro validas la sekvaj kotizoj (ĉiuj en nederlandaj guldenoj; parenteze aperas la sumoj validaj por la netranspagipovaj landoj): individua membro de UEA (IM): 180 (90); ne-IM: 225 (112); kunulo/handikapulo/junulo 19- ĝis 29-jara, mem IM: 90 (45); kunulo/handikapulo/junulo 19- ĝis 29-jara, ne-IM: 136 (68).

Oficiala informilo

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Britio: Y. K. Knowles. Nederlando: C. C. M. Tan.

DONACOJ 1990 (gld.) ĝis la 31-a de aŭgusto

FONDAĴO AFRIKO: Belgio: L. Dreze 100,00; R Lecat 92,22. Finnlando: S. S. Mynttinen 477,41. Francio: J. Beau 200,00. Italio: F. Carlucci 42,91; Aldo Foa 300,00; Silicia Nostra 19,76. Meksikio: E. Mustea 50,00. Svedio: J. Hammarberg 42,13. Diversaj malgrandaj 8,00. Sumo ĉi-jara 3526,56.

FONDAĴO AZIO: FR Germanio: M. Schäffer 61,86. Meksikio: E. Mustea 30,00. Nederlando: R. Moerbeek 300,00. Sumo ĉi-jara 587,33.

FONDAĴO CANUTO: Belgio: S. De Weerd 46,35. Meksikio: E. Mustea 40,00. Nederlando: E. M. Maasbommel 250,00. Svedio: L. Nordenstorm 150,00. Sumo ĉi-jara 5129,14.

ĜENERALA KASO: Britio: A. E. Rennie 11,20. Nederlando: R. Slot 27,23; Fam. Bossong 18,25; E. M. Maasbommel 250,00. Svedio: S.

Sundin 591,74. Diversaj malgrandaj 28,56. Sumo ĉi-jara 2738,63.

ASOCIA KAPITALO: Heredaĵo Edla Nilsson 17417,50. Heredaĵo D-ro M. Sancho Izquierdo 1432,76. Sumo ĉi-jara 19850,26.

RUMANIO: Brazilo: Marija Almada 382,25. Finnlando: T. Tyynelä 47,74; E-Klubo de Jyväskylä 47,74; S. S. Mynttinen 477,41. Meksikio: E. Mustea 300,00. Nederlando: A. Schouten-Buys 15,00; S. Kingma 15,00. Norvegio: E. Matland 28,92; D. Draper 28,92; Aase 28,92; K. Gustavsen 28,93; I. Gustavsen 29,28; O. Prytz 29,20. Diversaj malgrandaj 5,85. Sumo ĉi-jara 3228,46.

FONDAĴO SCIENCO KAJ TEKNIKO: Belgio: G. Pirlot 54,56. Novzelando: Auckland E-Forumo 55,65. Sumo ĉi-jara 206,36.

FONDAĴO WÜSTER: anonime 1675,43. Sumo ĉi-jara 9272,50.

FONDAĴO AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Belgio: L. Dreze 50,00. Sumo ĉi-jara 50,00.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

LUKTOJ

*“Mi kaptis inter astroj fajr-inspiron,
kaj per scienco strikta kaj arkana
elskribis brule scintilantan miron
– profeto kaj eksperto fratarana.*

*Tamen, serĉante nun kre-o-deliron
sur paĝo kliŝe, senkadence vana
mi vidas perfidita la aspiron
– retoro kaj pedanto ĉarlatana.”*

*“Sed gravas tra fiaskoj la spirito
en eĉ novico de l’ ordeno suna,
flam-ĉampiono, lum-anĝelo nuna.*

*Celante, tial, rekte al l’ okulo
de l’ multmaskita rega troglodito,
radiu fride sagojn – ribelulo!”*

LA ALVOKO

Subnaze de l’ dogano mens-glacia
printempo siajn sorĉojn kontrabandas;
afiŝonubojn, kiuj propagandas,
li ŝiras per lazuro anarkia.

Malgraŭ skeleta modo konvencia
li, burĝonbunta, kun aŭdaco dandas.
Dum mamonistaj ombroj treme bandas,
la libertino mokas, hel-ebria,

al mi dirante – “For de proz-miopo
trans horizontojn ĉielarken flosu;
sur karuselo, tra kalejdoskopoj

miraklojn per poemoj gaje glosu;
kaj ĝoju, bardo, ke, ĉu gajne-perde,
vi verkos, amos kaj batalos verde.”

KONKURSE

Verdigas flagoj tutan stadionon;
la spertaj partizanoj, mareg-horo,
ĵargonas, kantas, ĉantas, kun fervoro,
ŝatonte la novegan Apolonon.

Ĉi tiu celas eĉ la panteonon,
– kik-spita, ŝot-impeta trobadoro.
Laŭ fifroj kaj tamburoj tra l’ rumoro
la muzoj ekvidigas la kalsonon.

Kaj tuj per jambosprintoj, rimodribloj
– “Hura”-oj – la plejadon li ekregas.
Sed aj! neologisme faŭlas – sibloj!

Fendante la ĉielon tropo-salte,
la reton li golfrapas ekzaltiĝe.
Denove l’ arbitracianto NEGAS!

Poezio, Unua Premio:

El “La vivo de poeto”

KRITIKE

“Ŝveligu la beletran regimenton!
Per tia poezio aŭtentika
vi iĝos standardisto plej efika.”

“Vi nepre havas iun verŝalenton

– tehnikon krom imago – sed atenton
ankaŭ al la leĝaro gramatika.”

“... poeto? Ne! poego dinamika.”

“Vi fantazie riskas tro – prudenton!”

“Li maĉas metaforojn brontosauĝe,
inter toreadoroj skandas taŭre,
rim-muĝas elefante – primitiva!”

“Jen perspektivoj brave adoleskaj;
lingvaĵo resonance elvokiva,
elanoj kaj defioj inkandeskaj.”

de

Timothy Brian Carr (Britio)

POETIKO

*Nun, kiam klikas tiom da utiloj;
dum komputoroj anstataŭas lerni,
kaj eblas lukse en aŭtomobiloj
polui kaj masakri sen konsterni,*

*kaj ĉien anesteze elsendiloj
en mensojn povas varojn, verojn sterni;
en la epoko de ŝaltifaciloj
ĉu rajtas la poeto malmoderni?*

*Jes! poetikojn pigrajn li kontestu!
Pululas paĝoj vakaj, lamaj, plataj
– de l’ nuna mondo nur speguloj flataj.*

*Kontraŭ erao fia li tempestu!
Kaj krom pasio, vervo kaj animo
instigu pulsa ritmo, flusa rimo.*

NOTOJ

Ĉiuj vortoj uzitaj en la teksto aperas en PIV kun suplemento, 1987.

Aparte notindas:

Luktoj: “troglodito” – en la unua senco “pra-homo”

Konkurse: la radikoj “kik-”, “ŝot-”, “dribl-”, “faŭl-”, “gol-” estas futbalaj terminoj

Kritike: “dinamika” por “dinameca” – troviĝas inter aliaj ĉe ROSSETTI

Solidareco: “liristoj” por “lirikistoj” (jam en PIV “lirismo” por “lirikismo”)

La manio: “stileto” – malgranda ponardo; “Hipokreno” – fonto sur la monto Helikono, dediĉita al la Muzoj

SOLIDARECO

*Liristoj, prisilentu primaveron;
ne kapriolas koroj sane plastaj.
Rapsodoj alstrebantaj la eteron,
la maroj, firmamento jam malvastaj*

*nun dronas, sufokiĝas en inferon.
Revoluciuloj kun vizioj drastaj,
ni plu alfrontas burĝan malliberon,
premataj, tamen, ja ikonoklastaj.*

*Ĉu vi fenikse, ardegintaj fratoj,
revivas sur sublima stelo dista?
Ĉi tiun profanatan ni per beno*

*animas. Nun poetoj, ter-soldatoj,
konfliktas kun homaro egoista
por fari la naturon suvereno.*

LA MANIO

Iam mi vante nomis min “poeto”;
kolportis min tra landoj sen diskreto.
Naivan muzon iel mi kaĵolis,
kaj mistifike, hiperbole, rolis.

Mi semis fruajn florojn el soneto;
rikane epigramis per stileto;
revante nur, urbegon aŭreolis;
diarojn kaj reĝimojn mi abolis!

Kaj prave! ĝis mi aŭdis, denuncite,
la muzon min kondamni: “Kun vi kvite!
Ĉifonon metis vi sur Parnas-pinto!

Ĉe Hipokreno pisis! sed, trompinto,
malpion vian akre vi bedaŭros,
ĉar, sen plenumi, verkmanio daŭros.”

Kia la semo

Estimata kolego kaj amiko,

kvankam nek vi nek mi kato-likas, bonvolu akcepti ĉi leteron kiel konfeson de faro inda je kontricio, samkiel montron de fundamenta leĝo natura, nome, ke akaparemo kaj envio motoras ĉiujn homajn decidojn. Mi ne petas de vi absolvon, sed konsilon kaj konsolon aŭ, almenaŭ, sinceran skoldon, eĉ se vanan.

Antaŭ tri jaroj, kiam mi eksedziĝis, mi volis apartiĝi de tiuj sesdek procentoj de la homaro, mi deziris forgesi por eterne ĉiujn surmondajn inojn, kiuj dum tridek kvin jaroj min ĝenis, ĉagrenis, ĉikanis kaj rikanis.

Resume, se por iĝi islamano sufiĉas laŭti solsolecon de Dio kaj profetecon de Muhamado, ankaŭ por mizogino nur memkonscio necesas.

Por povi vivi ermitan vivon mi plene dediĉis ĉiun minuton je mia dispono al esploroj pri mia fako: entomologio aŭ insektiko, laŭ via

plaĉo. Espereble vi, renoma astronomo, perfekte komprenas, ke katalogado de etaj bestoj same vanas kaj esencas, kiel inventaro de forforaj astroj aŭ bibliografio de volapukaj eldonaĵoj.

Cetere, por ŝpari al vi idiotajn penojn, sekvalinie mi laŭeble evitos pedantajn insektikajn terminojn.

Mi trovis idealan izolejon, mediteranean insuleton, sur kiu staris modesta senluma lumturo, miniatura faroso, mia loĝejo dum dek kvin monatoj. Mi hipotezis, ke, ĉar la insulo distas tridek kilometrojn de marbordo, certe ĝia lili-puta faŭno stabilas kaj konstantas, kvankam

mistralo povus inviti tien kelkajn flugivajn unuopuletojn. Pri insulaj birdoj, pri rampaj, ronĝaj kaj aliaj bestoj mi indiferentis. Kaj nur mi senplumis dupiede, kiel diris Markso. Aŭ eble tion diris Sankta Petro. Nu, fidu ne memoron, sed agendon.

Moderna robinsono, mi instalas en la tureto donacitan komputilon kaj aldonajn japanajojn facili-

guntajn mian laboron . . . Ja ĉiu prudentulo bone scias, ke ankaŭ maŝino estas ino, sed al ĉevalo rabatita oni buŝon ne esploras.

Mi neniam komprenos, kial en Usono vivas preskaŭ kvardek milionoj da hejmaj hundoj, tiuj stulte servilaj bestoj, ne kapablaj fari ion por aŭ pro si mem. Se hundoj parolus nian lingvon, sendube ili

agnoskus neerarivecon de papoj kaj, bave kaj sklave, kanonizus ĉiujn mortintajn homojn, senescepte de la unua neandertalano ĝis plej . . . Nu, mi tamen ĉesu babili pri hundoj, kvankam ne pro nenio mi adoras, kiel praaj

egiptoj, nigrajn, sveltajn katojn, senkompare sendependajn kaj sagacajn. Samtial mi


abelojn abomenas: kiu havas abelojn, havas mielon. Ke tiuj zumemaj mikrobovinoj mortas, kiam ili pikas homon, jen destino inda je ŝlemilaj bestoj: prave punite laŭmerite!

Vespojn mi ŝatas, vespojn mi amas, vespojn mi kultas. Insekto arte tornita, ĝia facila kaj gracia flugo logas min jam de infanaĝo. Anakorete ĝi evitas svarmojn, esamenojn, naturajn manifestiĝojn de faŝismo aŭ – ŝafismo.

Plaĉas al miaj manoj, se vespo surpromenas, tien kaj retro. Nur kretenoj timas ilin, nur ili jen kaj disaeron frapas, skuas la kapon kaj plendaĉas, kvazaŭ postulante pikon.

Mia laboro konsistis en kapto de insektoj per diversaj paperoj, kovritaj per nektara gluo, por altiri kaj surglui ilin sen mortigo. Mi klasis ilin kaj laŭe makuletis iliajn flugilojn per respektiva fotomagneta farbo importita el Tokio: sl55 por strepsipteroj, d22 por dipteroj, el03 por himenopteroj kaj tiel plu. Poste mi liberigis ilin kaj kluĉis la komputilon al insektoserĉa radar-aparato. Post du


monatoj da pionira, senprecedenca laborego, mi ekzemple povis tuj scii, kie iu muŝo vivas kaj je kioma horo ĝi ekzumas matene. Evidente min interesis nur vespoj, ĉar la eksperimento celis pruvi ekziston de vespa lingvo,



multe pli evoluinta kaj subtila ol la abela. Vespoj vivas same en Maroko, kiel en Suomio aŭ Hungario; ilia lingvo estus do, krom riĉa je nuancoj, ankaŭ inter-

nacia. Mi supozis, ke vespinoj kaj vespiĉoj (aŭ virvespoj) parolas malsamajn, se tiel nomi ilin, “seksolektojn”, kaj miaj komencaj esploroj surbaze de tiuj premisoj kaj de la radaraj datenoj ebligis indukti la dek ses fundamentajn regulojn de ĝia gramatiko.

Unu vesperon mi trovis sep insektojn sur la centdek-dua glupapero. Mi facile klasis kaj fotomagnete farbis ses el ili: unu tabanino, du taba-



niĉoj, unu burdiĉo kaj du formikinoj. Sed la sepa, kio damne ĝi estis? Post plurhora konsultado la dudek kvin volumoj de *Dictionary Entomologicum* (insektika vortaro) solvis la problemon. Antaŭ miaj okuloj baraktis eta ortoptero, ido, nome manto, laŭseksse mantiĉo. Kial mi ne povis rekoni, klasi lin unuavide? Nu, tiun mantiĉon mutacio deformis, difektis: lian kriplesanan torakon kun atrofiataj flugiloj





kronis enorma kapo, aĉa kaj turpa, dum, malantaŭe, lia abdomeno, kun saltopretaj postaj membroj, ekspoziciis kolosan elstaradon, titanan apendicon, ciklopan muskolegon simbolantan vilendorfan generivon. Mirigis min, ke lia korpo ne verdas, sed prezentas koloron plej similan al forpuŝa kaj naŭza ekimozo. La monstra insekto vekis kompaton en mi . . . Mi baptis lin Priapo.

Verŝajne li aĝis nur du aŭ tri tagojn, post unu semajno li seksumos kun mantino kaj, certe vi konas la fenomenon, dum li ejakulas spermon por fekundigo de pli ol ducent ovoj, ŝi komencos formanĝi lian kapon, tiel, ke lia perfekte dizajnita abdomeno plu pumpos spermon aŭtomate en ŝian malsatan ovujon. Tiel, agamemnone, mantiĉoj ĉesas vivi, nutrante sian idaron.




Priapo gastis ĉe mi kun abundaj ambrozioj kaj nektaroj, ĝis lia groteska korpaĉo plene maturiĝis. Intertempe la komputilo sufloris al mi, kie “paŝtiĝas” mantinoj sur la insuleto. Tie mi lasis Priapon, kiun mi spionis



per reto da kameraoj, preta por vidi la spektaklon de lia morto.

Priapo frandis formikon meze sur la areno, kiam elvenis majesta mantino el inter rosaj herberoj. Eble ankaŭ mantoj komunikiĝas per propra lingvo, ĉar ambaŭ komencis eltri vortojn kaj gestojn, aŭ tiel mi supozas. Al mi ĉiam ŝajnis, ke la mantino ridetas mal-estime kaj moke.




Instinkte li saltis kaj lokis sin inter ŝiaj karesinde verdaj gamboj. Rapide li kupliĝis, la smeraldaj facetoj de ŝiaj okuloj glimis kaj humidis pro tia penetro, neniam antaŭe spertita. Li



surrajdis ŝin kaj ekpumpis, lantritme sed akcele. Kia kosmoskua sceno! Li tiktakis ŝin pli kaj pli aŭdace, en kaj el, en kaj el, kaj tiam ŝi subite turnis sian hipnotan


rigardon al li: ŝi lin appetitis, appetitegis, siajn falĉilajn krurojn ŝi etendis al li,



predocele. Priapo jen orgasmis, ŝi preskaŭ krevis pro la sizigia tajdo kaj, ĉefe, pro kolero, pro neeblo pinĉi lian tro grandan kaj tro distan kapon. Li, drone en volupto, ne atentis ŝiajn klitemnestrajn vanajn provojn, li daŭre ejakulis, kvazaŭ li konfesus siajn pekojn al pornema sacerdote. Fininte sian taskon, Priapo elŝovis la kirlilon kaj forsaltis ale al herbera tufo, dum la mantino kuŝis senpova kaj senhelpa, sen venko, sen orgojlo, sen supeo.



Unuafoje en mia vivo mi ekscitiĝis sekse antaŭ telebildo de du geumantaj insektoj. Kore kaj cerbe mi aplaudis Priapon, eskapintan el fatalo komuna al ĉiuj liaj masklaj antaŭuloj. Malkiel milojn kaj milionojn da pramantiĉoj, orgasmo ne sukcesis lin gilotini, sarkasmo devis turniĝi en humilon, timon.



La morgaŭon mi avide serĉis Priapon per la komputila radaro. Apudis lin du brunverdaj, laŭkanonaj man-

tiĉoj, kiuj evidente lin ignoris. Priapo saltis sur proksiman ŝtoneton kaj ekkuŝis, simila al putra betula folio.



Kiam li rigardis retro, li vidis veneran mantinon interherbe. Tro malfrue: unu el ambaŭ maskloj jam alflugis ŝin sentime, kamikaze. Ripetiĝis sama danco, samaj takto kaj taktiko, sama tiklo. Antaŭ la facetoj de Priapo du gemantoj, geamantoj, ritis eternan ceremonion, kies finon li ne konis. Instinktoj dekretis, ke, samkiel taŭro kontraŭ toreisto, la mantiĉo mortu. Tiel okazis. La celon li plenumis, la celo lin konsumis. Tiel.


* * *

Malfacilas priskribi postajn eventojn, kara kolego. Verke mi ja amatoras kaj, aldone, mi rimorsas. Mi sentas min kaino (minuskle, jes, minuskle), kovarda protokanajlo... Mi tamen revenu al nia historio. Kio do sekvis?




Nu, kvarvorte, Priapo ne volis viktimi. Kaj, ĉar li tute ne abstinis, la insuleto iĝis litomiŝla ĝardeno de delicoj, se paroli laŭ manta vidpunkto.


Mantinojn tuj panikis lia malbela, malhela kaj forpela figureto, sed li lernis ruzi. Li ekzemple embuskis malantaŭ ĉampinjono, ĝis li flaris erotogenan parfumon.




Ĉi tiam li elsaltis, lascive sturmis, sufikse kroĉis sin kaj ekkoitis. Unu, du, tri, centfoje. Neniu mantino povis rezisti, ĉiujn li dekameronis. En li kuniĝis moralo, ĝentilo kaj - folo! Priapo pretervole ludis nemezan rolon; li estis laŭdestine misproporcia, sed senmorta (ĉi-kaŭze la inaro hatis kaj rankoris lin, la renversinton de natura ordo), kaj li kondukis al ili ne kiel al dupinoj, sed kiel al dukinoj indaj je sensa apoteozo. Kiel Seneko skribis, *beata est vita conveniens naturae suae*,



alivorte, feliĉa estas vivo konvena al sia naturo, kio resume vortigas vivprincipojn de Priapo, la motivon de liaj fatamorganaj faroj.




Unu vesperon, videante liajn aventurojn, mi konstatis, ke mi ne plu estas tia, kia mi estis. Jes, ĉiam eblas diri, kun Horacio, tiujn kvar lakone latinajn vortojn: *non sum qualis eram*. Priapo, kiu ĉiutage aktoris nove, diverse kaj



varie, ekvekis en mi envion pli teruran ol ajna ĵaluzo, pli korodan kaj koruptan. La matriarka kaj patrina Blanka Pradiino, ne-

videble senvuala, elektis min (ateiston, animiston, paganon) por restaŭri, restitui, restarigi ŝian regnon. La morgaŭon mi, eleŭzisa pastro, plukis Priapon el lia haremo kaj venenis lin. Ankaŭ mia pankreato sekreciis venenon, guton post guto.

Jen ĉio. Mi plenigis flakonon per formolo kaj tien metis lin, ke li ŝvebu. La flakono staras inter libroj kaj libretoj, apud la Insektika Vortaro. Mia libroteko iĝis kiblo; la flakono, lia vitra tombo, iĝis konvekso mihrabo; Priapo mem - idolo, ĝino kaj dieto, senbarba hermo, kiu nenion, neniun riproĉas.



Rigardu la frukton de mia vivo: kadavron de insekto...

Malgraŭ tio, mi ankoraŭ kovas esperon. Kiom da miloj da ovoj li sukcesis fekundigi? Eble dek, dudek, tridek mil ovoj. Ĉu herede kaj hazarde renaskos lin gamo de kromosomaj kaj genaj kombinoj? Ĉu ieletrapele, kvazaŭ klone kaj ciklone, rekreos lin gameto plus gameto?



Mi povas dume nur atendi. Mi devas, kiel Kandido, kultivi plu mian ĝardenon. Ŝoife, ĉar mankas al mi cisterno, el kiu mi trinkus.

Tia la rikolto. Kia la semo.

George Kamaĉo (Hispanio)

ĉies vivo, ankaŭ mia, estas
unuverta palindromo.

oni
vidas nure tion, kion vorte
oni volas, povas.

intertempe
mi promenas lude de sakstrato
al sakstrato.

nude.
ignore
de homaj kaj horloĝaj siluetoj

mi paŝas trankvilpaŝe.

mi konversas
kun luno, kiu blankas sur lazuro,
kun osceda eta hundo, kun la
silento de tumulta urbo.

morgaŭ
mi decidis, ĉu komenci jam
rutini verbe, aktive kaj pasive,
aŭ vagi plu, en dolĉa farniento
de svagaj minaretoj.

Georgo Kamaĉo

Rezolucio 11.59.h

aprobata de la tera vivantaĵaro dum ĝia Unua Ĝenerala Konferenco
okazinta en sekreta regiono en 1999

La Ĝenerala Konferenco,

Elirante de la ĉiopotenco de la kunvenintaj specioj reprezentantaj ĉiujn ankoraŭ vivantajn speciojn de flaŭro kaj faŭno krom la homo, de protozooj ĝis mamuloj, de musko ĝis baobabo, de algo ĝis aglo,

Memorigante pri la daŭra mortado de ĉiujare kelkcent kunvivintaj specioj pro la ŝanĝigantaj naturaj kondiĉoj, kaŭzantaj malekvilibron en la hejmaj biotopoj,

Agnoskante la altan signifon de la eksperimento Tero en la kosma evoluo,

Rekonante la kulpon de la evoluanta biosfero produktinta la homan konscion kaj

Konkludante el ĉio ĉi ke la mamulara sekcio antaŭ miliono da jaroj elektis malĝustan vojon kaj nun ne kapablas mem korekti tiun ĉi devion, tiel endanĝerigante spiradon, nutradon, regenerigon de ĉiuj,

1. **Gratulas** ĉiujn ĉeestantojn pro ilia daŭra kaj ĝis nun sukcesa lukto transvivi;

2. **Petas** la Ĝeneralan Naturan Konsilantaron starigi planon por urĝa fondo de biotopaj kaj speciaj atakkapablaj armeoj kun tempe kaj cele akordigitaj batalinstrukcioj, kaj ekagantaj tuj post la establo, ĝis la neniigo de la homo en la difinitaj batalregionoj;

3. **Alvokas** la biotopestrojn kaj estontajn armeestrojn lanĉi edukprogramon por plantoj kaj bestoj kiuj tro emocie al kutimiĝis al la homoj kaj tial ne konscias pri ilia danĝero por sia pluekzistado, precipe por: lekantetoj, domkatinoj, vertagoj kaj pudeloj, ciklamenoj, rozoj kaj kanarioj;

4. **Rekomendas** jam nun al la ĉeestantoj eluzi siajn naturajn fortojn, venenojn kaj aliajn rimedojn kontraŭ la homo: balenoj komuĝe renversu boatojn kaj ŝipojn kaj piranoj ilin akompanu, aglaroj ataku vilaĝojn, vivdanĝeraj bakterioj pli

rapide generu idaron kaj indulgu ĉiujn aliajn mamulojn ol homoj, ĉiuj plantoj blovigu sian semon en domfendojn, tegmentotruojn kaj akvodefluilojn por enpenetri la homajn konstruaĵojn kaj krevigi ilin, kuloj ne solaj pikuj, sed svarme ataku unuopulojn, kaj ĉiuj ajn malsanaj, mortantaj estaĵoj serĉu kaŝitajn lokojn en urboj por amase produkti epidemiojn. La nedanĝeraj, junaj kaj sanaj bestoj kaj plantoj atendu la instrukciojn de la Ĝenerala Natura Konsilantaro.

La Ĝenerala Konferenco decidis okazigi sian duan kunvenon meze de 2001 por raporti pri la fino de la militaj agadoj kaj solene kaj pace festi sian liberigon de la genro homo. Krome estas proponite ke la simioj redonu la komision evoluigi altan kaj ĝenerale utilan konscion el sia genro, ĉar ili plene fiaskis. La Dua Ĝenerala Konferenco decidis, kiu alia genro aŭ specio transprenos la taskon.

(akceptita unuanime dum sekreta voĉdonado)

Ulrich Becker (Germana DR)

Ĝoje sonu mia kanto: La vivo kaj verkoj de Marie Hankel

Enkonduke

Se la nomo de Marie Hankel ankoraŭ ne tute forglitis el la historio de Esperanto, tio estas precipe ĉar oni proklamis ŝin Reĝino de la Floraj Ludoj dum la unua okazo de tiu literatura konkurso en Barcelono, 1909. Prave oni rigardas ŝin kiel la unuan Esperanto-poetino. Samtempe, tamen, etikedi ŝin ekskluzive poeto lasas al ŝi iom post iom droni en la anonimon de la ne tiom elstaraj antaŭparnasismaj versistoj. Tiel, maljuste, restas neglektataj la tutaj personeco kaj agado de unu el la plej fervoraj kaj fidelaj esperantistoj. Honore al la sesdeka datreveno de ŝia morto, ĉi tiu eseo celas prezenti Marie Hankel, la homon, la movadanon, la verkiston.

Marie vivis en tempo, kiu estis tempesta por Esperanto. Tial validas resumi la historian fonon, surbaze de la skizo de Waringhien¹. La movado tiam spertis “tri el la plej gravaj battoj, kiujn oni povus imagi por ĝin neniigi: la Ido-skismon, la morton de la fondinto kaj dissplitiĝon de la jaroj 1914-1918.” Dum la unuaj jaroj de la dudeka jarcento floris la mistiko de “la interna ideo”, kiu nutris la animojn de la samideanaro ĝis tiu grado, ke Waringhien parolas pri “speco de vera religio”. Ekde 1920, tamen, ĝi “flugis for, aŭ en pure religian movadon, Bahaismon aŭ Oomoton . . . aŭ en pure social-politikan movadon, SAT aŭ IPE”. Preskaŭ samtempe, la Esperanta poezio, kiu longe modeligis sur la verkoj de Zamenhof, trovis novan dinamikon post la apero de Kalocsay kaj Baghy, kiuj heroldis la transformiĝon de la primitiva romantismo en maturan romantismon kaj poste en parnasismon².

Persone

La *Enciklopedio de Esperanto*³ apenaŭ informas pri la privata vivo, krom sciigi nin, ke Marie naskiĝis la 2an de februaro 1844 en Schwerin, kaj mortis la 15an de decembro 1929 en Dresden. En la jaro 1868 ŝi edziniĝis al universitata profesoro Hermann Hankel, sed jam post kvin jaroj vidviniĝis. Ŝi estis patrino kaj ŝi aludas “gajan familian vivon” kun la infanoj⁴. En alia prozaĵo ŝi mencias nepojn⁵. En la familia domo en Tübingen ŝi loĝis

tridek jarojn⁶, kaj tiam, estante jam sola, translokiĝis al Dresden.

La demandaro, respondita okaze de ŝia kandidatiĝo al la Lingva Komitato⁷, montras kulturen virinon, kiu scipovas Esperanton, la francan kaj la anglan (“la francan ne senerare”), kiu deklaras intereson pri literaturo kaj amon al la artoj (ŝi aranĝis kursojn pri la historio de la pentrado), kaj kiu “tre ŝatas natursciencan”. Cetere, ŝiaj “specialaj priokupoj estas filozofiaj, socialaj kaj etikaj (moralaj) demandoj”, kaj ŝi “partoprenas al la virina demando”.



Marie Hankel.

Tiuj interesoj evidentiĝas en ŝia prozo. La arĥitekturo de feridomoj spegulis pli larĝe por Marie la tutan tiaman artan movadon en Germanujo⁸. Verkante nekrologon pri la bakteriologo Robert Koch⁹, ŝi klarigas lian laboron kun kompreno, regante la rilatajn Esperantajn fakvortojn. La emo al naturscienco plie montriĝas en la detala kaj observema priskribo de la rilatoj inter diversaj bestoj kaj plantoj en ŝia ĝardeneto⁴.

La situacio de virinoj ŝajne tre gravis. Dum la sesa UK Marie prezentis paroladon pri “la balotrajto por virinoj”¹⁰. En raporto pri la valoraj kontribuoj de diverslandaj virinoj al Esperanto¹¹ ŝi parolas pri la “malnova tempo, en kiu oni opiniis virinojn malaltrangaj estaĵoj. Tio devas ŝanĝi!” [tiele!] Tamen, la virinoj mem devas akiri egalecon per kuraĝo kaj iniciatemo tiel, kiel akiris ĝin la pioniraj koloniantinoj en Ameriko. Jen, laŭ Marie, taŭga modelo por esperantistinoj, kiujn ŝi admonas al sindono, energio kaj kuraĝo. Sed samkiel pluraj nuntempaj feministoj, ŝi opinias, ke ankaŭ la ĉiutaga vivo de virinoj povas esti fieriga kaj kreiva. Ŝi finas raporton¹² pri ekspozicio pri germanaj virinoj jene:

“la virinoj rigardas per fieraj, feliĉaj okuloj la ekspozicion, kiu la unuan fojon montras, kion kreis virina[j] diligenteco, laboremo kaj intelekto.”

Estas klare, ke ŝi priskribas la propran reagon al la ekspozicio. Tamen, kiel multaj tiamaj aktivulinoj, Marie ne rekonas iun rilaton inter la situacio de virinoj kaj pli ampleksaj politikaj demandoj. Ŝi restas solide burĝa, asertante, ekzemple, ke tiuj, kiuj apartenas al la meza klaso “ja estas por ni [t.e. por Esperanto] la plej dezirinda anaro.”¹¹

Kelkaj el la prozaĵoj montras ŝian meditemon. Bona ekzemplo, kiu klarigas ŝian filozofion, estas la eseo “Ĉu la homo amas la naturon?”¹³ Marie asertas, ke la primitiva homo taksis la naturon minaco, mistero, demono. Kun la ekesto de religio venis eĉ pli da mallumo:

“La diablo! Kiam li eniris la naturon, la lasta brilo de ĝojo aŭ kompreno eliĝis el la nin ĉirkaŭanta mondo!”

La savo el tiu malfeliĉo venas por Marie el nekutima apudigo de la arto kaj la racio:

“la homoj kune trovis la ĝustan vojon per siaj poetoj kaj scienculoj.”

Kvankam la poetoj pioniris, kiam

“ili kovris per rozkolora vualo la teruraĵojn, ili riskis ŝercan rakonton, ili revivigis la pli gajajn opiniojn . . . parolis pri feinoj kaj nimfoj . . . La suno estis nomita ‘nia patrino’, la luno ‘amiko de la medito’, la steloj ‘niaj gefratoj’”

necesis ankaŭ, ke la sciencistoj perspire malkovru la naturajn leĝojn,

tiel ke

“la lumo de la scienco forigis la timon, nun la poetoj povas senlime kanti pri belaĵoj de la mondo. Ankoraŭ plu – ĉiu koro fariĝis nun poeta!”

El tio estas klare kial Marie “tre ŝatas natursciencon”, kvankam ŝia frapa optimismo pri la rezultoj de la scienco ne tiom taŭgas al nia tempo. Sed laŭ Marie senlaca esplorado nepre gvidos al la unusola vero, kiu “neniel . . . estas terura”, sed “bela kaj trankviliga feliĉo”.¹⁴ Evidentiĝas ankaŭ, ke la poezio tre gravas al ŝi. Plie, montriĝas tuta manko de tradiciaj religiaj sentoj. Fakte, dum la kvara UK, Marie ĉeestis la kunsidon de la liberpensuloj kaj parolis germane al invititaj Dresdenanoj pri la temo: “Ĉu la lingvo Esperanto estas grava por la liberpensularo”.¹⁵

La malŝato al religio eksplikiĝas en la prozaĵo “Mia balkono”.⁶ Ni ekscias, ke jam frue Marie amis florojn, kaj ke la ĝardeno estis “la paradizo de mia infaneco”. En ŝia oka jaro, tamen, la paroĥo nuligis la lukontrakton kaj repostulis ŝian gepatran domon por la pastro. Marie suferis pro la perdo de la ĝardeno:

“Se la posedanto estus estinta unu homo, mia sento kontraŭ li certe havus mortigan karakteron. Sed . . . la domo apartenis al la ‘katedralo’ . . . , kiu forprenis parton de l’ sunbrilo al miaj floretoj . . . la tutan ĝardenon kaj ankaŭ la domon! . . . mi sekrete havis mian venĝon; neniam mi poste aŭdis unu el la predikoj de la uzurpa pastro, do li kaj la katedralo ili ambaŭ havis sian rekompencan.”

Kiel edzino, ŝi denove havis en Tübingen domon kun amata ĝardeno, sed post tridek jaroj Marie sentis, ke “vivadi sola en Edeno / Estus por mi nur korĉagreno” kaj serĉis loĝejon, nepre kun balkono, en Dresden. Ŝi priskribas sian kutimon sidi sur balkone ĉirkaŭata de floroj por rigardi kaj mediti ĝis la “animo trankviliĝas, sentas konsolon en peza tempo”. El tiu meditado fontis la inspiro por ŝiaj verkoj kaj la trankvila optimismo, kiu regis ŝian vivon.

Kosmopolita sento estis forta: “Mia hejmo estas: ‘Tero’, / La patrujo mia: ‘Mondo!’”¹⁶ kaj sendube gravis en la esperantistiĝo de Marie, kvankam certagrade skuis ĝin al naciismo la Unua Mondmilito, kiam la Fera Kruco fariĝis por ŝi “sankta signo de amo, de sufero, de gloro”.¹⁷

La preskaŭ universala bezono al religio en la plej larĝa senco, plenumiĝis por Marie en Esperanto, kies tiama etoso celis ĝuste tion. Ŝiaj priesperantaj verkoj abundas je religiaj entuziasmo kaj simboloj, ekzemple: la flamoj de Pentekosto;¹⁸ Zamenhof la “ĉiela sendito”, kies “verko havas eternan daŭron, ĝi nek estas detruenda, nek perdeva”;¹⁹ la simileco inter la lasta distiko de *Konstruestro Zamenhof*²⁰ kaj la 24a Psalmoj²¹:

Vidu pordegojn jen, malfermiĝante:
Venu, eniru, la Majstron
laŭdante.²⁰

Levu, pordegoj, viajn kapojn;
Kaj leviĝu, pordoj antikvaj,
Por ke eniru la Reĝo de gloro.²¹

Tamen, eĉ rilate aferon tiel sanktan al ŝi, ne mankis humuro; vidu la sinmokan konfeson de la nekuraĝebla vortarmaniulo,²² kiu sukcesis ĉarmi eĉ la kritikeman Kalocsay.²³

Aldonoj al la portreto venas el la plumoj de aliaj, kaj indikas homon amindan. Oni nomis ŝin “avinjo”²⁴ kaj laŭdis ŝiajn fortan personecon, profundan patrinecon, senlakan afablon kaj ardan deziron por paco inter la homaro.²⁵ Marie amis infanojn, fariĝante “la gardaĝelo de la Esperanto-lernejinfanoj”, kaj estis virino “kun la pura infana animo, kiu tamen por Esperanto povis esti vire energia kaj plena de sankta fervoro”.²⁴ Laŭ Cart²⁶ “por ŝi ne ekzistis la vorto malamo”, ŝi estis plena de “neŝancelebla optimismo. ‘Ĉarma’ estis unu el la vortoj, kiujn ŝi plej ofte uzis. Ĉarmon . . . ŝia serena animo sciis trovi en ĉio kaj ĉe ĉiuj.” Ŝi estis “idealista kaj meditema, vere homa, de ĉiuj amata kaj sekvata.”²⁷

Movade

Siajn lastajn 25 jarojn Marie Hankel dediĉis al Esperanto, kiel “la plej fidela amikino de la Majstro”²⁶, “samideano en la plej profunda senco”²⁵. Ŝi esperantistiĝis en februaro 1905⁷ (laŭ la propra respondo de Marie Hankel – la *Enciklopedio*³ kaj poste Courtinat²⁸ citas, eble erare, la jaron 1903) kaj en 1906 fariĝis unu el la fondintoj de “Societo Esperanto Dresden”. En 1907 ŝi raportis pri la grupo en *Lingvo Internacia*²⁹, por kiu ŝi verkis raportojn pri la germana movado ekde 1907 ĝis 1910, kiam la revuo ĉesigis tiun rubrikon.

Ŝi rakontas, ke troviĝis nur ses esperantistoj inter la 500 000 enloĝantoj de Dresden. Ili ne sukcesis varbi pliajn anojn kaj finfine, mal-

kuraĝiĝante, la 14an de novembro 1905 fermis sian lastan kunvenon kaj enskribis “Nenian celon! Ripozu en paco.” en la grupan kajeron. Tamen, en la aŭtuno de 1906 nova samideano, d-ro Schramm ekaktivis kaj baldaŭ havis 80 anojn kaj 100 lernantojn. Intertempe Marie enloĝis la urbon kaj fariĝis unu el la pioniroj de tiu nova grupo. Ĝia viglo kaj entreprenemo apogeis en la sukcesa organizado de Universala Kongreso jam en 1908. Sendube la etoso de tiu elstara grupo nutris la fervoron de Marie al Esperanto. Same nutris ĝin ŝia partopreno en la tria UK en Cambridge, kio igis ŝin eldoni germanlingvan broŝuron pri la kongreso.³⁰



Foto de kongresanoj el la 4-a UK en Dresden, kiun kunorganizis Marie Hankel. De tiu tempo multe ŝanĝiĝis la mondo, pri kiu ŝi verkis.

Ricevante el la loka grupo, Marie tutkore kontribuis al ĝi, eĉ post kiam aliaj aferoj okupis ŝin kaj portis al ŝi eminentecon. Ekde januaro 1909, ĝis la lundo antaŭ sia morto, ŝi gvidis kunvenojn de la Orienta Grupo en Dresden ĉiusemajne “kun ĉiam samaj fervoro kaj lerteco kaj multa, multa amo!”²⁴ Ŝi fariĝis konsilanto de la Germana Esperanto-Asocio, prirespondante la fakojn literaturan kaj virinan.¹¹

Unu el la “Kvaro por la Kvara”, Marie prirespondis la korespondadon

kaj artajn aranĝojn. Al ŝi Zamenhof³¹ konfidencis siajn dezirojn, ke la kongreso estu kvazaŭ religia “manifestacio kontraŭ ĉiuj herostratoj, kiuj penas ruinigi kaj senkreditigi nian aferon ...”, ke “grandaj imponantaj ĥoroj kantu la himnon ‘La Vojo’”. Lia fido je Marie ne surprizas, ĉar ŝi jam skribis antaŭe al li pri sia maltrankvilo rilate la reforman krizon.³²

Kvankam la Kvina UK en Barcelono 1909 memorindas precipe rilate la verkistan triumfon de Marie, dum tiu kongreso oni ankaŭ elektis ŝin en la Lingvan Komitaton, kiam entute 51 el la 86 LKanoj voĉdonis, kaj 42 aprobis ŝian kandidatigon.³³ Jam en Barcelono, esperantisto de nur kvar jaroj, ŝi



estis rekonata spertulo pri la gramatiko, tial ŝi kune kun profesoroj Cart kaj Corret prizorgis tiun fakon en la juĝantaro por la internaciaj ekzamenoj.³⁴

Responde al la demandaro por LK-kandidatoj⁷, Marie identigas sin gardisto de la lingvo:

“Lingvaj demandoj treege interesas min. Mi ĉiufanke provadis Esperanton ... Laŭ mia firma konvinko nur energia protesto kontraŭ ŝanĝemo kondukos nin al la fina venko. Mi ĉiam helpas gardi, protekti, ŝirmi kaj konservi la nunan formon de Esperanto.”

Al demando pri speciala spertado: “Mi esploris la demandon de la neŝanĝebleco de lingvo internacia.” Ŝi

volas kiel LKano esplori “la vortfaradon el la radikoj ... la fakesprimojn”.

Ŝajnas, ke Marie ja “energie” batalis por sia vidpunkto en la LK, kaj ricevis riproĉon de Zamenhof pri “dekleracioj”, kiujn ŝi dissendis meminitate al LKanoj sen peti la permeson de la prezidanto.³⁵ (La temo de la disputo ne evidentiĝas el la letero de Zamenhof.) Ŝi pledis en la LK, ke necesas havi plenan oficialan gramatikon,³⁶ kaj poste sensukcese provis persvadi Zamenhof verki tian.³⁷ Instigis ŝin la timo, ke la gramatikistoj tro ŝarĝas la lingvon, kiun ŝi reprezentis kiel junan knabon, al kiu la gramatikistoj

“alportis multajn teksaĵojn ... La junulo nun ne plu fluge marŝadis ... li malrapide kaj pene iradis ... Eble li ian belan tagon forĵetos la superflujajn kovrojn, en sia primitiva vesto, taŭga, daŭra kaj nedisŝirebla, gaje ridetante li staros antaŭ la mirigitaj okuloj de la gramatikistoj.”³⁸

Ŝia opinio, la lingvo devas disvolviĝi rilate la gramatikon al “ĉiam pli bela, eleganta, simpla kaj facile uzebla” stilo.³⁹ La evoluo, tamen, devas resti en la Zamenhofa kadro, kaj Marie kontraŭstaris ĉiujn reformojn proze^{40,41} kaj verse^{42,43}. Ni rimarku, tamen, ke la akuzativo, kiun la reformemuloj volis forigi, vekis en Marie ne entuziasmon, sed rezignacion!

“Malbona la akuzativo
En sonĝo neniel ekzistas,
Ho, bela en sonĝo la vivo
El pura korĝojo konsistas.”⁴⁴

Marie kontraŭstaris la enkondukon de neologismoj, ĉar gravis al ŝi, ke Esperanto restu facila kaj ĝenerale uzebla. Tamen, ŝia sinteno varias. Foje montriĝas dogmemo, kiel en ŝia propono al la Akademio:⁴⁵

“La Akademio, malaprobante energie la enkondukon ... de superflujaj, kaj per tio mem, nebonaj vortoj ... la danĝero de degenerado”,

kaj en ŝia respondo al ies komparo, ke neologismoj estas kiel birdoj, kiuj ĉirkaŭflugas rokon (la Fundamenton) kaj poste forflugas:

“birdoj ne ĉirkaŭflugas rokon sen la intenco tie nesti kaj loĝi ... trudema birdaro povas fariĝi danĝera”.⁴⁶

Foje tamen evidentiĝas la kompreno, ke necesas havi novajn vortojn, ne nur rilate fakesprimojn, sed ankaŭ “por

plej delikata esperantigado de ia anima ideo”.⁴⁷ Parenteze, validas ankoraŭ hodiaŭ el la *Propono Hankel* ŝia admono al vortaristoj,

“ke ili sin konformigu al la universala kutimo de la naciaj vortaristoj ... fidele prezenti la lingvon, kiel ĝi efektive estas kaj ne kiel la aŭtoro volas, ke ĝi estu”.

Taŭgan podion por eldiri siajn opiniojn pri la lingvo Marie trovis en la rolo de prezidanto de la Internacia Unuiĝo de Esperantaj Verkistoj (poste la Esperantista Literatura Asocio), kiun ŝi fondis dum la sepa UK en Antverpeno, por ke verkistoj interkonatiĝu, profitu el reciprokaj helpo kaj kritikado, kaj difinu racian eldonpolitikon.⁴⁸ En la oficialaj raportoj de tiu asocio ŝi, en la opinio de Kalocsay,²³ “publikigis siajn admonojn kaj avertojn iel instruistino”. Tamen, eĉ en oficialaj rondoj speguliĝis ŝiaj pozitivaj trajtoj:

“sian devon kiel L.K.-anino ŝi, eĉ laca, eĉ malsana, ĉiam plenumis plej konsciencie, profitante ĉiun oficialan okazon por aldoni kelkajn amikajn vortojn”.²⁶

Sendube tre gravis al Marie la korespondado kun Zamenhof ekde aprilo 1907 ĝis lia morto post precize dek jaroj. Krom la jam supre menciitaj leteroj, notindas, ke Zamenhof petis ŝian helpon rilate la disvastigon de lia ideo pri Homaranismo, kvankam li ne estis tute certa pri ŝia reago:

“Se vi persone ne aprobas la Homaranismon, mi kompreneble ne volas peti de vi ian laboron por afero, kiun vi ne aprobas”.⁴⁹

Ne estas indiko, almenaŭ ne en la *Originala verkaro*, ke ŝi komplezis al li, sed la korespondado daŭris. Zamenhof skribis pri sia proponata plena vortaro germana-Esperanta.⁵⁰ Lia lasta nefinita letero estis al Marie kaj ĝi traktis la saman temon.⁵¹ En ĝi evidentiĝas, ke Marie sukcesis persvadi la Germanan Esperanto-Asociacion subvencii la eldonon, inkluzive de pago al Zamenhof. Fakte, temis pri pago sufiĉa por vivteni lin – plej grava kontribuo, kiu tamen ne realiĝis pro lia morto.

Marie aktivis ne nur sur la nivelo de eminentaj movadanoj. Ŝia dediĉo al la loka grupo estis traktata supre. Jam tre maljuna, ŝi helpis esperantistajn militkaptitojn dum la Unua Mondmilito,²⁸ kaj sendube ŝiaj energiaj klopodoj kontribuis al la fakto, ke la UEA-delegitoj en Dreseno aparte

menciindas rilate la peradon de korespondado inter malamikaj landoj.⁵²

Eĉ postmorte, Marie servis la movadon per funebra soleno kun ĉerko kovrita per la verdstela flago, akompanata de Esperantaj kantoj. Ĉiu ĉeestanto ĵetis florojn miksitajn kun verdaj steloj sur la ĉerkon, kaj oni adiaŭis al

“la plej nobla kaj bona, la plej modesta kaj dankema, la plej esperplena kaj persista, la plej fervora kaj diligenta, la plej entuziasmigita kaj entuziasmiganta el ĉiuj, kiuj iam portis la verdan stelon”.²⁴

Literature

Neniu kontestus la sindediĉon de Marie al Esperanto. Estas tute klare, ke la verkado estis nur eta parto de ŝia agado. Tamen ŝajnas, ke oni juĝas ŝin specife kiel verkiston, kaj pli precize kiel poeton. Tial necesas ankaŭ ĉi tie konsideri tiun flankon.

Siatepe, Marie estis unu el la plej popularaj Esperantaj poetoj. Atestas tion la entuziasmo, kun kiu oni proklamis ŝin Reĝino de la Unuaj Internaciaj Floraj Ludoj en 1909:

“Rektoro Boirac . . . anoncas, ke la venkinto estas venkinto, nome Sinjorino Marie Hankel.

“Oni longe aplaŭdas kaj aklamas la nomon de la Reĝino dum ĉiuj eminentuloj eliras por ŝin alkonduki. Procesie ili revenas . . . dum ne ĉesas la varma aplaŭdado.”³⁴

Inter la eminentuloj troviĝis ankaŭ Zamenhof, kiu, prezidante la disdonon de literaturaj premioj dum la sekvanta UK en Vaŝingtono, invitis Marie alparoli la ĉeestantojn.¹⁰ Jam tio indikas, ke li respektis ŝin kiel verkiston. Kiam aperis *Sableroj* en 1911, Zamenhof taksis la verkon “interne kaj ekstere tre bela”.⁵³

Privat, kiu ricevis la duan premion sub Marie en Barcelono, konatiĝis kun ŝi unu jaron antaŭe, kiam li estis 19-jara. Premiito mem, li tamen multe imponiĝis pri ŝi:

“ricevi, sur genuoj, la premion el la manoj de la nobla grizhara reĝino de poezio. Jam tio estis tre timiga malgraŭ ŝia bonvola rideto.”⁵⁴

Poste, li petis ŝin verki antaŭparolon por la dua eldono de *Karlo*.⁵⁵ En sia nekrologo pri Sebert, li trovas ankaŭ neceson agnoski, ke la morto de Marie estis grava perdo por Esperanto, ĝuste rilate ŝian verkadon:

“Ni ĵus perdis poetan avinon . . . Kiu prenos ŝian liron?”⁵⁶

Lia uzo de la vorto “avino”, kaj la fakto, ke li mencias Marie en nekrologo pri alia homo sugestas, ke li esprimis sin tiel el personaj respekto kaj ŝato, kaj ne pro devosento.

Leginte la poemon *Desperanto*, en kiu Schulhof esprimas dubon ĉu la universala akcepto de Esperanto rezultigus pli homan mondon, Marie skribis al la aŭtoro, ke “feliĉe, la vorto ‘despero’ ne ekzistas”. Sendube ŝi reagis ne nur el vortarista vidpunkto rilate neologismon, sed ankaŭ kontraŭ la herezo, kiu kontraŭis ŝian idealismon pri Esperanto. Schulhof nek ignoris nek mokis ŝin, sed respondis verse,⁵⁷ kaj se iom ironie ankaŭ kun kavalira ĝentileco.

En sonĝo.

En sonĝo mi bone parolas
La lingvon sen ia eraro,
Dirante mi, kion deziras,
Kaj ĉiam sen help' de vortaro.
Facile la vortoj alvenas,
La frazojn mi formas fluante,
Neniam pri „sia“ mi penas,
Mi ĉiam komprenas „aŭdante“.

Malbona la akuzativo
En sonĝo neniel ekzistas,
Ho, bela en sonĝo la vivo
El pura korĝojo konsistas.

En sonĝo . . . ho ne, mi ne dormas:
Mi vidas la helan matenon,
Kaj tamen la vortojn mi trovas, —
Nun fine, mi rompis katenon!

Mi nun efektive parolas,
Kaj jen babiladas fluege,
Dirante mi, kion deziras,
Mi estras la lingvon ĝojege! (1907)



Tiuj ekzemploj montras, ke Marie stimulis la admiron kaj la respekton de literatoroj. Ankoraŭ la *Ora Libro*²⁷ en 1937 nomis ŝin “la Esperanta najtingalo”.

Kun la ekflamo de parnasismo, tamen, ĉio ŝanĝiĝis. La poezia voĉo de Marie silentiĝis — ĉu pro ŝia granda maljunaĝo, ĉu pro la fakto, ke ŝi konsciis, ke la postmilita Esperanto jam tre malsimilis el la literatura kaj la movada vidpunktoj, kompare kun la medio de ŝia esperantistiĝo. Al la parnasistoj kaj postparnasistoj, la verkoj de Marie fariĝis tre kritikendaj. Tiel Waringhien⁵⁸, laŭdante ŝian “naturan, senperfortan uzon de la lingvo”, tamen plendas, ke

“tiu lingvo estas tiel senverva, neoriginala, la poezia inspiro tiel diluita, ke la rezulto senkuraĝigas la bonvolan admiron. La ‘Rozujo sovaĝa’ [premiita en Barcelono] ŝajnas nun al ni senparfuma kaj ftiza”.

Postaj kritikoj plejparte similas, ekzemple:

“Tre atente mi serĉis iun poemon . . . kiu apud pli freŝaj verkoj restus freŝaspekta, sed vane.”⁵⁹

“Marie Hankel ne havis poetan talenton.”⁶⁰

“Al ni ŝi povas plu nenion diri. Ŝiaj poemoj . . . enhavas nur tre ĝeneralajn emociajn konceptojn . . . en formo iom primitiva.”⁶¹

“Hankel ne tre bone regas la versan formon kaj ŝiaj poemoj tedas per ĝeneralaj emociaj konceptoj.”⁶²

“Ŝiaj poemoj — vere ne digesteblaj por la hodiaŭa gusto — estas kiĉtonaj, mallertaj stile kaj ritme . . .”⁶³

Kalocsay²³, agnoskante la neceson konservi verkojn, kiuj spegulas la “heroajn tempojn” de Esperanto, tamen insistis pri la neceso “traduki” el la lingvo de la fruaj poetoj, kiuj ne havis la eblecon lerni la metion de la poezio. Sub tiu preteksto, li faris al Marie la plej grandan maljustaĵon, kiun eblas fari al poeto: li reverkis kelkajn poemojn ŝiajn por tiel indigi ilin al la nuntempa leganto. Estas interese momente deflankiĝi por vidi kial li ŝanĝis *Konstruestro Zamenhof*:²⁰

“Oni devas tiujn versojn pli strikte alĝustigi, ĝian senforman formon ŝanĝi je fiksjaj kvinjamboj, kaj — se eble — almeti rimojn. Plej bone estus, se tiel estiĝus soneto.”

Oni rajtas konjekti, ke laŭ tiuj kriterioj Kalocsay estus hodiaŭ tre okupita!

Kelkiuj, tamen, malkonsentis juĝi Marie el parnasista vidpunkto, kaj ie-tie troviĝas defendanto. La nuda aserto, ke Marie “ne havis poetan talenton” stimulis unu recenzanton respondi, ke

“la vero estas ĝuste inversa . . . Marie Hankel havis nur poetan talenton, sed nesufiĉan scion . . . ŝiaj poemoj kvazaŭ servis kiel modelo por formi la difnon ‘primitiva romantismo’.”⁶⁴


Alia komentas:

“Ne malmulte da poezia talento . . . Briletas spertlingveco kaj signifa verskapablo . . . [tamen estas ankaŭ kritiko] . . . ŝi entuziasmiĝas kaj per tiu sento ofte dronas [tiele!] iun tre perlan penson.”⁶⁵

Antaŭ ol prikomenti tiujn prijuĝojn, necesas rimarkigi, ke oni plejparte traktas la *poemojn* kaj ignoras la *prozon* de Marie. Sed ĝuste en la prozo troviĝas ŝia plej atentinda lingvouzo. Distingas ĝin vigla simpleco; kaj simpleco ja estis por Marie unu el la celoj de bona stilisto.³⁹ La vortoj fluas, kuntrenante la leganton en la temon. Pro manko de afektado la stilo estas travidebla kaj ne trudas sin inter la leganto kaj la ideoj esprimitaj de la aŭtoro. Tia maniero verki plej sukcesas rilate priskribajn, preskaŭ ĵurnalmajn artikolojn (la plej bona ekzemplo estas *Mesoletero el Leipzig*⁶⁶, sed estas aliaj^{4,5,12}), rakontstilajn biografiaĵojn (ekzemple, “Mia balkono”⁶) kaj argumentojn (ekzemple, “Ĉu la homo amas la naturon?”¹³). “Energio”, “kuraĝo”, “laboro” estis ŝatataj temoj de tiu energia kaj laborema samideanino, kiu ofte verkis kuraĝige kaj instige, semante multon da krisignoj. Novelon ŝi neniam verkis, kaj la provoj komuniki vidpunkton per fabeloj estas malpli sukcesaj. Tamen, en rekta komunikado de ideoj kaj impresoj ŝi brilas kaj meritas la atenton de aspirantaj Esperanto-ĵurnalistoj.

La poemoj de Marie nepre ne brilas. La plej akraj kritikantoj tamen agnoskas, “ke antaŭ ŝi ekzistis preskaŭ nenio”.⁶³ Kiam Auld, malgraŭ sia pli frua opinio⁵⁹ iel cedis kaj enlasis Marie en la duan eldonon de la *Esperanta Antologio*, ŝi okupis nur la naŭan lokon en la kronologia vico de poetoj. Siatempe ŝi gajnis la respekton de eminentuloj kaj venkis ĉe la Floraj Ludoj, kvankam rilate versteknikon la venkita poemo de Privat multe superas ŝian. Privat verkis klasikan ampoemon; Marie verkis pri la ideo de Amo. Ekestas la demando, ĉu ĝuste la “ĝeneralaj emociaj konceptoj”, kiujn nia pli individualisma epoko kritikas, imponis la tiaman juĝantaron kiel indiko pri pli larĝvida sinteno ol la pure personaj versoj de Privat?

La poemoj de Marie estis tre popularaj ankaŭ inter ordinaraĵoj esperantistoj. Ĉi-rilate sendube gravis la simpleco de la stilo kaj la evito de neologismoj, kio stimulis unu recen-zanton laŭdi, ke la poemoj



*Kritikaj okuloj de la parnasismo:
Kalocsay reverkis la poemojn de Marie kvindek jarojn poste.*

“estas kompreneblaj, kaj ĉiu ja scias, ke versoj kompreneblaj estas maloftaĵoj, indaj de la plej grandaj gratuloj . . . Ni rekomendas . . . al ĉiuj, kiuj ŝatas kaj amas la vere fundamentan esperantan literaturon.”⁶⁷

Estis precize la ordinaraĵoj esperantistoj, kies fideleco subtenis Esperanton tra la Ido-krizo: apostatis 20% el la gvidantoj, sed nur 3-4% el la “simplaj” anoĵ.⁶⁸ Por tiuj Marie verkis simple, por kuraĝigi, inspiri kaj admoni ilin reteni la fidon. La antaŭa komparo inter unu ŝia poemo kaj psalmoj ne estis hazarda; iusence oni povas rigardi ŝin kiel la psalmiston de Esperanto.

Marie ne estis la geniulo, kiu eltrovas novajn vojojn por evoluigi la arton. Ŝi verkis kadre de la kulturnivelo de sia tempo. Tial oni ne rajtas juĝi ŝin laŭ postaj kriterioj. La verdikto de Emilja Lapenna⁶⁴ estas la plej taŭga: Marie difinas por ni la “primitivan romantismon” de la fruaj tagoj. Se la mankoj en ŝia tekniko ĝenas niajn pli rafinitajn sentojn, ni respektu almenaŭ la celon, pro kiu ŝi verkis.

Konklude

Tute konvenas, ke kelkaj poemoj de Marie troviĝas en la antologio *Guto post guto* (P. Hitrov, 1923), ĉar ĝi estas laŭ Carlevaro⁶¹ “verko, kiu konkludis la unuan periodon sed malfermis ankaŭ novan”. Marie staras inter du literaturaj epokoj, kiel unu el la lastaj reprezentantoj de la pli frua. Simile, ŝi staras inter du grupoj: la literatoroj kaj la amaso. Estas grave por ĉiu arto ne tute malproksimiĝi for de la amaso, ĉar arto, kiu dependas nur de siaj adeptoj, fariĝas hermetike kaj elitisme dekadenca. Marie estis ponto, per kiu simpla esperantisto de tiu tre verda tempo povis renkontiĝi kun la poezio. Jam tio laŭdindas. Sed necesas memori ankaŭ ŝian sindediĉan laboron. La amo, kiun ŝi havis por Esperanto, kaj la amo, kiun ŝia personeco vekis inter esperantistoj estas pliaj atestantoj, kiuj pledas, ke ŝia nomo ne estu forgesota.

Ŝia kanto daŭre sonadu:

Ĝoje sonu mia kanto,
Entuziasme kun adoro,
Por la kara Esperanto,
Nia beno kaj trezoro.⁶⁹

Krys Ungar (Britio)

BIBLIOGRAFIJ NOTOJ

- 1 G. Waringhien, Historia skizo de la Esperanta Movado. *Lingvo kaj vivo: Esperantologiaj eseoj*, p. 397-423. La Laguna de Tenerife; Stafeto (1959).
- 2 W. Auld, Postparolo. *Esperanta Antologio: Poemoj 1887-1981*, 2a eldono, p. 835. Rotterdam; UEA (1984).
- 3 H. Dresen, Marie Hankel. *Enciklopedio de Esperanto*, L. Kökeny kaj V. Bleier (red.), Vol. 1 p. 208. Budapeŝto; Hungara Esperanto-Asocio (1986, represo de la eldono el 1933).
- 4 M. Hankel, La batalo pro la vivo. *Sableroj* (Internacia Librotrezoro: Kajero IIa/IVa) p. 37-39. Leipzig; Deutsche Esperanto Buchhandlung: Germana Esperanto-Librejo (1911). Unue aperis en *La Revuo*, III:412-413. (1908-1909).
- 5 M. Hankel, Taŭra kurado. *Sableroj* p. 77-83. (1911).
- 6 M. Hankel, Mia balkono. *Germana Esperantisto*, 13(6B):64-65. (1916).
- 7 Demandaro respondita de M. Hankel okaze de ŝia kandidatigo por la Lingva Komitato en 1908 (troviĝas en la kolekto de s-ro J. Amouroux, Perpignan, Francujo).
- 8 M. Hankel, El la artista movado en Germanujo. *La Revuo*, II:302-303. (1907-1908).
- 9 M. Hankel, Robert Koch. *La Revuo*, IV:567-568. (1909-1910).
- 10 J. M. Warden, La Sesa Universala Kongreso de Esperanto. *Lingvo Internacia*, XV(9[201]):387-430. (1910).
- 11 M. Hankel, Virina agado en Esperantujo. *Kongresa libro de la VI Germana Esperanto-kongreso en Lübeck* p. 99-110. (1911).
- 12 M. Hankel, La ekspozicio "La virino en domo kaj profesio" en Berlin. *La Revuo*, VI:473-475. (1911-1912).
- 13 M. Hankel, Ĉu la homo amas la naturon? *Sableroj* p. 33-36. Aperis ankaŭ en *La Revuo*, V:465-466. (1910-1911).
- 14 M. Hankel, La vero. *Sableroj* p. 43. Unue aperis en *La Revuo*, V:186. (1910-1911).
- 15 C. Bourlet, La Kvara Kongreso. *La Revuo*, III:77. (1908-1909).
- 16 M. Hankel, Mia hejmo. *Sableroj* p. 23. (1911).
- 17 M. Hankel, Kristnaska ĝojo 1914. *Germana Esperantisto*, 12(1):3-4. (1915).
- 18 M. Hankel, Post la unua kongreso. *Sableroj* p. 8. Aperis unue en *Lingvo Internacia*, III(8[176]):348. (1908).
- 19 M. Hankel, Meditoj. *Sableroj* p. 60-61. (1911).
- 20 M. Hankel, Konstruestro Zamenhof. *Sableroj* p. 16-17. Unue aperis en *Lingvo Internacia*, XIV(12[192]):538. (1909).
- 21 L. Zamenhof (traduk.), Psalmoj 24. *La sankta biblio* p. 473. London; Brita kaj Alilanda Biblia Societo. (1960).
- 22 M. Hankel, Sapiro. *Sableroj* p. 72-73. (1911).
- 23 K. Kalocsay, Variantoj pri la temaro de Marie Hankel. *Norda Prismo*, n-ro 4: 213-217. (1958).
- 24 J. K. [J. Karsch], Nia danko al Marie Hankel. *Germana Esperantisto*, 27(1): 12-13. (1930).
- 25 H. Arnold, Marie Hankel [germanlingva nekrologo]. *Germana Esperantisto*, 27(1):11-12. (1930).
- 26 T. Cart, Marie Hankel L. K. *Oficiala Bulteno de la Esperanto-Akademio*, II(februaro):31. (1930).
- 27 V. Bleier kaj E. Cense (red.), *Ora libro de la Esperanto-movado 1887-1937* p. 47. [Budapeŝto?]; LKK de la XXIX UK de Esperanto. (1937).
- 28 L. Courtinat, *Historio de Esperanto: Movado kaj literaturo 1887-1960*, Unua volumo p. 239-240. [Parizo?]; [s.n.] [1964?]
- 29 M. Hankel, Movado Esperantista: Germana. *Lingvo Internacia*, XII(12[168]): 558-559. (1907).
- 30 M. Hankel, *Bilder vom 3. Esperanto-Kongress*. [Dresden] (1907).
- 31 L. Zamenhof, n-ro 315. *Originala verkaro*. J. Dietterle (red.). Leipzig; Ferdinand Hirt (1929).
- 32 L. Zamenhof, n-roj 313, 314. *Originala verkaro*.
- 33 —, *Oficiala Gazeto Esperantista*, 2(2[13]):24. (1909).
- 34 P. Corret, La kvina kongreso. *Lingvo Internacia*, XIV(9[189]):410. (1909).
- 35 L. Zamenhof, n-ro 326. *Originala verkaro*.
- 36 —, *Lingvo Internacia*, XV(9[201]): 410. (1910).
- 37 —, n-ro 329. *Originala verkaro*.
- 38 M. Hankel, Fabeloj. *Sableroj* p. 64-65. Unue aperis en *Lingvo Internacia*, XV(4[196]):172-173. (1910).
- 39 M. Hankel, Dr. Esperanto. *Sableroj* p. 57-59. (1911).
- 40 M. Hankel, Kial ni ne devas ŝanĝi Esperanton. *Sableroj* p. 66-68. (1911).
- 41 M. Hankel, Nia lingvo. *Sableroj* p. 69-71. (1911).
- 42 M. Hankel, Nia lingvo. *Sableroj* p. 11. Unue aperis en *Lingvo Internacia*, XII(12[168]):536. (1907).
- 43 M. Hankel, La bukloj de Simson. *Sableroj* p. 14. Unue aperis en *Lingvo Internacia*, XIII(7[175]):303. (1908).
- 44 M. Hankel, En sonĝo. *Sableroj* p. 10. Unue aperis en *Lingvo Internacia*, XII(8[164]):352. (1907).
- 45 M. Hankel, Konsiloj pri enkonduko de novaj vortoj en la komuna lingvo (Propono Hankel). *Lingvo Internacia*, XVII(1[217]):21-22. (1912).
- 46 M. Hankel, 8a raporto de IUEV. *Oficiala Gazeto Esperantista*, 5:36-43. (1912-1913).
- 47 M. Hankel, Interkonsento. *Sableroj* p. 74-76. unue aperis en *Lingvo Internacia*, XV(7[199]):324-325. (1910).
- 48 —, Diversaĵoj. *La Revuo: roza suplemento*, VI:63. (1911-1912).
- 49 L. Zamenhof, n-ro 334. *Originala verkaro*.
- 50 L. Zamenhof, n-ro 336. *Originala verkaro*.
- 51 L. Zamenhof, n-ro 337. *Originala verkaro*.
- 52 I. Lapenna, Uzo por praktikaj celoj. *Esperanto en perspektivo*, I. Lapenna (red.). p. 345-368. London; Rotterdam; UEA – Centro de esploro kaj dokumentado pri la monda lingvo-problemo. (1974).
- 53 L. Zamenhof, n-ro 331. *Originala verkaro*.
- 54 E. Privat, *Aventuroj de pioniro* p. 38-41. La Laguna, Tenerife; J. Régulo. (1963).
- 55 E. Privat, *Karlo*, dua eld. Berlin; Esperanto Verlag. (1922).
- 56 E. Privat, Generalo Sebert. *Esperanto*, 26(354[2]):16. (1930).
- 57 St. Schulhof, Respondo. *Lingvo Internacia*, XVI(6[210]):260-261. (1911).
- 58 G. Waringhien, La lingvistika valoro de la poezio. *Eseoj 1: Beletro* p. 73-90. La Laguna, Tenerife; Stafeto. (1956).
- 59 W. Auld, Enkonduko. *Esperanta Antologio: Poemoj 1887-1957* p. 24. La Laguna, Tenerife; Stafeto. (1958).
- 60 H. Vatré kaj K. Kalocsay, Literaturo. *Gvidlibro por supera ekzameno*. Pechan (red.).
- 61 T. Carlevaro, Originala beletro. *Esperanto en perspektivo*, I. Lapenna (red.), p. 122-189. London; Rotterdam; UEA – Centro de esploro kaj dokumentado pri la monda lingvo-problemo. (1974).
- 62 G. Miĥalkov, La poezia mondo de Esperanto-poetinoj. *Beletrajeseoj* p. 30. Sofio; Bulgara Esperanto-Asocio. (1987).
- 63 —, K. Kalocsay kaj Marie Hankel. *Informilo de la Internacia Esperanto-Muzeo Wien*, 40(154):2-6. (1989).
- 64 E. Lapenna, Meditado pri grava instruilo. *Norda Prismo*, n-ro 1:57-58. (1968).
- 65 D. Kralj, *Kvar prelegoj pri Esperanta literaturo* p. 29-30. Ljubljana; Slovena Esperanto-Ligo. (1969).
- 66 M. Hankel, Mesoletero el Leipzig. *La Revuo*, VI. (1911-1912).
- 67 D-ro N., [recenzo pri *Sableroj*]. *La Revuo*, VI:287. (1911-1912).
- 68 U. Lins, Analiza skizo pri la historio de la monda organizo. *Esperanto en perspektivo*, I. Lapenna (red.), p. 413-446. London; Rotterdam; UEA – Centro de esploro kaj dokumentado pri la monda lingvo-problemo. (1974).
- 69 M. Hankel, Adiaŭa vorto de la reĝino. *Sableroj* p. 21-22. (1911).

Komputilaj tradukprogramoj mal-multekostaj. Trans S-E tradukas el la sveda en Esperanton. Trans E-S tradukas el Esperanto en la svedan. Ĉiu el la programoj kostas nur 950 svedajn kronojn aŭ egalvaloron. Pagu al sveda poŝtkonto 56 67 86 0 aŭ pere de via banko al la adreso de nia kompanio: Tramond KB, Box 65, S-666 01 Bengtsfors, Svedujo.

El Niĝerio: Instruisto 30-jara, ne jam finlerninta Esperanton, deziras korespondi (Yemi Awotunde, Ajara Grammar School, P.O. Box 19, Badagry, Lagos State, Niĝerio). La E-grupo de la sama urbo tre deziras ĝemeliĝi kun E-klubo ie ajn en la mondo (ĉe Anagovi Seraphin, sama adreso).

Elementa lernejo, nomita laŭ Ludoviko Zamenhof la 3-an de junio 1990, petas salutleterojn, bildkartojn ktp el la tuta mondo. Lernejo "Ludoviko Zamenhof", Zagórnik, PL-34-120 Andrychów, Pollando.

Vicdirektoro de la merkata fako en turisma firmao deziras korespondi, provizi turisman servon al esperantistoj, interŝanĝi poŝtmarkojn. Li Jing-yi, Peace International Tourism Corp., Room 3212, East Building, People's Hotel, 319 Dong Xin, Xi'an, Ĉinio.

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas unu guldenon (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la ripeto de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj, bonvolu vidi la kolofonon.

Anoncetoj

Kara amiko, mi sendas saluton kaj bondeziron el Kanado. Mi loĝas en Hamiltono, urbo de 300 000 loĝantoj, kie oni produktas ŝtalon. Mi estas 29-jara verkisto kaj interesiĝas pri literaturo. Mi deziras korespondi kun esperantistoj el Sovetunio, prefere kun tiuj, kiuj havas saman aĝon aŭ saman intereson. Mi estas komencanto. Ĉu estas tia persono en via klubo? Skribu al: John Taylor, 404 – 400 East 42nd St., Hamilton, Ont., Kanado L8T 3B1.

Pedagogiaj problemoj en ĉiuj instru-niveloj formas la temaron de semajna gazeto en Litovio. Instruistoj bv. skribi al ĵurnalisto Arvydas Kasperis, PO Box 1472, SU-232040 Vilnius.

Kun Britio, Kanado, Irlando dez. kor. Julia Dmitirevskaja, Janovskogo 3-a kv. 29, SU-169900 Vorkuta, Sovetunio.

Mi aĉetas internaciajn respondkuponojn. Hobby Samleren, PO Box 1099, N-5001 Bergen, Norvegio.

Apud la Mediteranea Maro mi donas dum monatoj/jaroj pensionon al gemaljunuloj. Rigardu: UEA-Jarlibro, p. 211.

Eksstudentino 19-jara kiu malŝatas la usonan edukadan sistemon deziras atingi edukadon per problemsolvaj metodoj (esplorado) kun komputilaj sistemoj inĝeniaj; studi/labori kune kun aliaj samideanoj; helpi homojn, la Esperanto-movadon; havi geamikojn; ricevi informojn, kiel ŝi povos atingi siajn celojn. Molekula biologio, komputiloj, ideoj bonaj, kaj multaj fakoj de scienco interesas ŝin. Ŝi havas du jarojn ĉe supera lernejo sed ne lernis laŭ sia prefero – multe kaj rapide. Ŝi volonte transloĝiĝos al alia lando por realigi siajn dezirojn. Filisa VISTIMA, 20 Westland St., Worcester MA 01602-2129, Usono.

Pri filatelo dez. kor. Zhou Zhiqi, Lian Sheng Jie 2, Changsha, Hunan, 410005 Ĉinio.

UEA kultivas ankaŭ la teorion!

Klubo, informaktivulo, interlingvistoj, ne maltrafu la jenajn verkojn:

Plurilinguisme et communication

red. F. Lo Jacomo (1986)

Dudek kvin ekspertoj konfrontas la tutan vastan gamon de lingvaj problemoj, en seminario de UEA kaj Unesko. 329p. 24cm. 80% franca, 20% angla. 57,00 gld.

Socilingvistikaj aspektoj de la internacia lingvo

komp. Yosimi Umeda (1987)

Japanaj, ĉinaj kaj alilandaj fakuloj diskutas simpozio pri la eŭropeco kaj aliaj trajtoj de Esperanto. 205p. 25cm. Japana kaj Esperanta. 27,00 gld.

Studoj pri la internacia lingvo

red. Michel Duc Goninaz (1987)

Naŭ aŭtoroj aplikas la ilojn de moderna lingvo- kaj sociscienco al la fenomeno Esperanto. 155p. 24cm. Franca, germana, angla, Esperanta. 39,00 gld.

Language in religion

red. Humphrey Tonkin kaj Allison A. Keef (1989)

Deko da studoj pri teologiaj, praktikaj kaj sociaj aspektoj de la uzo de lingvoj en religio. 122p. 23cm. Anglalingva (E-resumoj). 42,00 gld.

Haveblas dekoj da aliaj studoj, inkluzive de jenaj valoraj kompilaĵoj:

Interlinguistics.

Aspects of the science of planned languages

red. Klaus Schubert (1989)

Ampleksa, ĝisdata superrigardo de la interlingvistiko, speciale taŭga por bibliotekoj kaj kiel enkonduko por profesiaj lingvistoj. 348p. 24cm. Anglalingva. 105,00 gld.

Acta interlinguistica. Referaĵoj el la 11-, 12- kaj 13-a Scienca Interlingvistika Simpozio (1983, 1984, 1985)

red. Ryszard Rokicki

Entute pli ol 40 studoj pri sociaj, politikaj, strukturaj kaj aliaj aspektoj de Esperanto kaj lingvoplanado, el la plej regula internacia forumo por interlingvistoj. Averaĝe 175p. 20cm. Nur Esperanto. Po 18,00 gld.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA.

Por la unuaj kvar verkoj validas triona rabato ekde tri ekzempleroj; por la aliaj, sesona rabato.

Bulgara Esperantisto

monata organo de BEA

- varia kaj intereskapa enhavo, riĉe ilustrita per bonkvalitaj fotoj kaj grafikaĵoj;
- aktualaj artikoloj kaj informaĵoj pri la bulgara kaj tutmonda E-movadoj;
- legindaj publikaĵoj en la rubrikoj: "Originala verkaro", "Esperantologio kaj interlingvistiko", "Lingvaj demandoj", "Juna esperantisto", "Verdaj steletoj" (porinfana), "Leteroj de korespondamiko", "Dezirata korespondi", "Distra paĝo" k.a.
- legantoj en pli ol 51 landoj.

Jarabono: 32 ned. gld. aŭ egalvaloro. **Abonebla** ĉe la Libroservo de UEA, naciaj poŝtoj kaj ĉe perantoj en multaj landoj. **Petu prov-ekzempleron** ĉe la Redakcio: Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofio.

Ĉu vi jam konas tiujn librojn?

Rikardo Ŝulco: *La sesa regulo*, kajeroj 1 kaj 2;
100 p., sume 16 DM

(funda kaj detala traktado de la verbosistemo en Esperanto)

Rikardo Ŝulco: *Pirano Klaŭdo kaj la malbona lingvo*;
28 p., 5 DM

(sobra kritiko al la libro "La bona lingvo" de Claude Piron)

Johano Volfgango Fongojto: *La fabelo*; 32 p., 5 DM
(J.W. v. Goethe: *Das Märchen*; modele tradukita de Alfredo Refeldo)
(Ĉiuj libroj lingve kontrolitaj laŭ la principoj de la Analiza Skolo)

Mendu ĉe UEA, ĉe via libroservo aŭ rekte ĉe la eldonejo.

Esperanto-Centro Paderborn
D-4790 Paderborn, Poŝtfako 1450

Inter pli ol 3300 titoloj ĉe la Libroservo de UEA, ne troveblas pli valora libro kontraŭ pli bagatela prezo!

Doña Bárbara

fama romano de famaj aŭtoroj kaj tradukinto

"La traduko estas rara juvelo, de kiu ekzistas en nia literaturo tre malmulte da ekzemploj." (Waringhien)

"La tradukinto atingis la plej altan rangon de nia traduka prozo..." (Régulo Pérez)

"La traduko impresas mininde klara kaj posedas la netan rigoron de la kabea stilo en 'La faraono'." (Vatré)


Doña Bárbara (1929), Rómulo Gallegos (1884-1969). El la hispana trad. F. de Diego. Karakaso: Venezuela Esperanto-Asocio, 1975. 264p. 21cm. ISBN 84 399 2885 8. Prezo: 16,20 gld. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj!



Japana eksperto Masayuki Saionji klarigas la sekretojn de lia koksosto-ĝustiga prem-kneda terapio, per kiu li resanigis jam milojn da homoj – plej laste ĉe la Universala Kongreso en Havano!

190 p. Ilus. 27,60 gld. ĉe la Libroservo de UEA.

Abonu



Nun komenciĝas abonvarba kampanjo 1991 por *El Popola Ĉinio*. EPĈ kun interesaj artikoloj kaj belaj bildoj raportas pri Ĉinio en diversaj flankoj kaj pri la Esperanto-movado en kaj ekster Ĉinio. Tiu, kiu abonas aŭ reabonas nian gazeton dum la kampanjo (de 1990.10.01 ĝis 1991.02.28), ricevos unu koloran kalendaron kun pejzaĝoj de vidindaj lokoj en Ĉinio. La abonvarbantoj ricevos ĉinstila(j)n memoraĵo(j)n laŭ sia kontribuo en la varbado.

Sendu la abonilon al nia peranto en via lando aŭ rekte al ni: Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

ABONTARIFO DE EL POPOLA ĈINIO

(ekvalidas la 1-an de oktobro 1990)

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	16.00	26.00	36.00
Aŭstrio	ATS	215	360	500
Belgio	BEF	620	1020	1400
FR Germanio	DEM	32.00	54.00	76.00
Britio	GBP	9.50	15.00	21.00
Finnlando	FEM	72.00	117.00	163.00
Francio	FRF	102.00	165.00	225.00
Hispanio	ESP	1550	2500	3500
Italio	ITL	20600	33500	46500
Japanio	JPY	3000	5400	7500
Nederlando	NLG	35.50	61.00	85.00
Nov-Zelando	NZD	21.70	36.00	50.00
Portugalio	PTE	1550	2500	3500
Svisio	CHF	26.80	44.00	64.00
Usono	USD	15.50	26.00	36.00
Kanado	CAD	15.00	25.00	35.00

Por aliaj landoj en Eŭropo:

USD	11.50	18.50	26.00
-----	-------	-------	-------

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

USD	7.80	12.40	17.50
-----	------	-------	-------

**La varbilon kaj senpagan specimenon
Guoji Shudian sendas laŭ peto.**

Okaze de la Jaro de EROŜENKO

aperis broĉo kun portreto de la talenta blinda soveta esperantisto (1890-1952). Mendu nun ekzempleron por vi aŭ por donaco, profite al la Eroŝenko-fondaĵo, kiu havigas librojn al netranspagipovaj blinduloj. Po 3,00 gld. (sesona rabato ekde tri ekzempleroj) ĉe la Libroservo de UEA.

